

世界語訳論語

ANALEKTOJ

DE KONFUCEO

ESPERANTIGITA DE SASAKI TERUHIRO

佐々木 照央 翻译

枣庄学院

ZAOZHUANG, ĈINIO

2017

01 XUE ER

0101

La Majstro diris: “Lerni, kaj ĉiam daŭrigi la studadon, ĉu tio ne estas ĝuo? Estas amiko, venanta de malproksime, ĉu tio ne estas ĝojo? Kvankam oni ne taksas vin, tamen vi ne indignas, ĉu tio ne estas digno de noblulo?”

0102

You-zi diris: “Inter homoj, respektantaj gepatrojn kaj pliaĝajn fratojn, apenaŭ troviĝas da ofendemuloj al supro. Inter neofendemuloj al supro neniam troviĝas ribelemuloj. Noblulo klopodas por fundamento. Sur la firma fundamento naskiĝas la vojo. Fila pietato kaj respekto al pliaĝuloj estas ja fundamento de bonvoleco, nomata Ren.”

0103

La Majstro diris: “Apenaŭ ekzistas bonvoleco en lertaj vortoj kaj afablaspekto.”

0104

Zeng-zi diris: “Ĉiutage mi reflektas min mem je tri punktoj: Ĉu mi ne estas lojala, klopodante por aliaj homoj? Ĉu mi ne estas fidela en interrilato kun amikoj? Ĉu mi ne praktikas ĉion, kio al mi estas transdonita?”

0105

La Majstro diris: “Regante la landon de mil-militĉaroj, respektu aferojn kaj konvinkiĝu je servado al aferoj; estu ekonomie ŝparema kaj amu homojn; uzu popolon ĝustatempe.”

0106

La Majstro diris: “Tenu en si filan pietaton interne hejme; estu respektema al pliaĝuloj ekstere; estu prudenta kaj fidela; Amu vaste popolamason kaj kutimiĝu al bonvoleco. Farante ĉion ĉi tion, se restas plia forto, tiam lernu literaturon.”

0107

Zixia diris: “Se preferi saĝan intelekton al sensaj plezuroj, dediĉi sian tutan forton por servi al gepatroj, dediĉi sian tutan korpon por servi al reĝo, interrilati sincere kun amikoj, parolante vortojn kun konvinkiĝo – mi nepre nomas tiun personon inteligenta, eĉ se li ankoraŭ ne lernas.”

Rim.: Troviĝas multe da diversaj opinioj pri la signifo de frazo 賢賢易色.

Rim.: Multaj esploristoj komprenas la frazon 致其身 kiel “morti”, laŭ kio estas tradukite en diversaj lingvoj. Sed mi ne konsentas.

0108

Noblulo ne singravigas, do nek arogantas. Kiu lernas, tiu ne malmolas. Estu ĉefe lojala kaj fidela. Ne amikiĝu kun tiu, kiu ne taŭgas al vi. Se eraris, ne hezitu korekti ĝin.”

Rim.: Multe da opinioj pri la frazo 不重不威, 不固. Mi ne prenas tian tradukon, aprobita de multaj esploristoj: “Noblulo ne aperas kiel impona, se ne tenas sin majesta.”

0109

Zeng-zi diris: “Se prudente funebri kaj memori forajn prapatrojn, popolo profunde inspiriĝas al virto.”

0110

Ziqin demandis al Zigong, dirante: “Vizitante ĉiun ajn landon, la Majstro nepre aŭdis pri tiea politiko. Ĉu li mem petis tion, aŭ oni donis al li scii?”

Zigong diris: “La Majstro estas milda, bona, humila, ĝentila kaj modesta, tial do li povis informiĝi. Serĉado far de la Majstro diferencis de la aliaj serĉantoj.”

0111

La Majstro diris: “Dum patro estas viva, observu la strebon; post la morto de la patro, observu la konduton. Se dum tri jaroj filo ne ŝanĝas la vojon de la patro, eblas konsideri lin homo kun fila pietato.

Rim.: Multe da esploristoj prenas “三年 Tri jaroj” pro “post tri jaroj”.

0112

You-zi diris: “En praktiko de decreguloj plej kara estas harmonio. En la vojo de antaŭaj reĝoj ĝi estis konsiderata kiel bela en ĉio ajn, ĉu granda aŭ malgranda. Sed okaze ĝi ne povas esti farata. Se, sciante nur harmonion por harmonio, oni ne disciplinas ĝin per decreguloj, tiam ĝi ne estas atingebla.”

0113

Kiam fido kompletiĝas per justo, la vorto dirita estas efektivegebla. Kiam ĝentileco

kompletiĝas per decreguloj, tiam honto kaj malhonoro estas forigitaj. Tiel do ne perdiĝas la korligo inter parencoj kaj la honoro de prapatroj.”

0114

La Majstro diris: “Noblulo ne serĉas satiĝon je manĝaĵo, nek serĉas komforton en sia stabila loĝado. Sed li estas rapida je aferoj, prudenta je vortoj, kaj rektigas sin laŭ la vojo. Povas diri, ke li estas ja lernemulo.”

0115

Zigong demandis: “Kiu, estante malriĉa, ne flatas, kaj kiu, estante riĉa, ne arogantas, tiujn vi taksas kiel?”

La Majstro respondis: “Pli bona estas tiu, kiu ĝuas, estante malriĉa, kaj tiu, kiu amas decregulojn, estante riĉa.”

Zigong diris: “Estas dirite en *Poezio*: “Jen tranĉas, jen glatigas, jen ĉizas, jen poluras”. Ĉu tia estas via eldiro?”

La Majstro diris: “Kara Ci-ĉjo, kun vi mi povas ekparoli pri *Poezio*. Vi deduktas plion el tio, kion mi diris.”

0116

La Majstro diris: “Min ĉagrenas ne tio, ke aliaj ne scias min, sed tio, ke mi aliajn ne scias.”

02 WEI ZHENG

0201

La Majstro diris: “Regado kun virto estas kvazaŭ la Polusa Stelo. Ĝi situas en sia loko kaj ĉirkaŭ ĝi iras komune amaso da aliaj steloj.”

0202

La Majstro diris: “En *Poezio* estas tricent poemoj. Se resumi ilin unuvorte, ili vokas al ni, - ‘Ne pripensu malbonon!’-”

0203

La Majstro diris: “Se gvidi per politiko kaj disciplini per puno, la popolo, obeante laŭjure, restas fakte sen hontosento. Se gvidi per virto kaj disciplini per decreguloj, la popolo havigas al si hontosenton kaj sin korektas.”

0204

La Majstro diris: “En 15-jara mi ekstrebis al la lernado de scienco, en 30-jara stariĝis, en 40-jara senŝanceliĝis, en 50-jara sciis la ordonon de la Ĉielo, en 60-jara havigis al mi la orelojn por aŭskulti, en 70-jara, sekvante ĉion, kion mi deziras, ne transpasas ajnan leĝon.”

0205

Meng Yi-zi demandis pri fila pietato. La Majstro respondis: “Ne devojiĝu.”

Sur revena vojo stiris la ĉaron Fan Chi. Majstro diris al li: “Kiam Meng Sun demandis al mi pri fila pietato, mi respondis: ‘Ne devojiĝu.’”

Fan Chi demandis: “Kion signifas tio?”

La Majstro diris: “Dum gepatroj vivas, servu ilin laŭ decreguloj; kiam ili mortis, funebru laŭ decreguloj; poste faru oferadon laŭ decreguloj.”

0206

Grafo Meng Wu demandis pri fila pietato. La Majstro respondis: “Ke la pleja maltrankvilo de gepatroj estu nur je malsano.”

Rim.: Pri kies malsano, ĉu de gepatroj aŭ de filo, diversas kompreno inter esploristoj, ekz-le Ma Rong, Zhu-zi k. a.

0207

Ziyou demandis pri fila pietato. La Majstro diris: “Nuntempe oni opinias la fila pietato kapablon nutri gepatrojn. Se tiel, ĉiu ajn povas nutri eĉ hundojn kaj ĉevalojn¹. Sen respekto, en kio estas diferenco?”

Rim. 1: Alia kompreno: “Eĉ hundoj kaj ĉevaloj kapablas nutri...”

0208

Zixia demandis pri fila pietato. La Majstro diris: “Malfacilo kuŝas en la mieno. Kaj kiam estas la afero, malpliaguloj estas ŝarĝitaj per diversaj servadoj. Je manĝado kaj trinkado unuenaskito oferas al gepatroj aŭ prapatroj. Ĉu tion oni povus konsideri kiel filan pietaton?”

Rim.: Kvar vortoj 色、會 malfaciligas komprenon. Multaj esploristoj prenas 色 por “mieno”, kaj 會 por konjunkcio. Mi komprenas ideoframon 會 kiel vapormilo 甑, simbolo de kuirado.

Inter esploristoj troviĝas du diversaj kompreno pri la mieno: mieno de gepatroj aŭ mieno de gefiloj. En la mieno esprimiĝas nature sento kaj animstato. Por infano teni afablan kaj obeeman mienon estas bona disciplino por kontroli senton per racio. Kaj oni devas kompreni anim- kaj san- staton de gepatroj-pliaĝuloj laŭ la mieno.

0209

La Majstro diris: “Mi kun Hui interparolis tutan tagon. Li esprimis sian opinion sensange, kvazaŭ stultulo. Post lia retiriĝo mi reflektis nian interparolon kaj sufiĉe inspiriĝis. Hui ne estas stulta.”

Rim.: Ĉiuj esploristoj prenas la vorton 不違 por “ne kontraŭi al Majstro”: “Li prezentis nenian kontraŭan opinion al ĉiuj miaj vortoj...”[WCf5]. Sed laŭ mi sen kontraŭo ne povus daŭri dialogo, sed estus nur monologo.

0210

La Majstro diris: “Rigardi, kion li faras; Observi, de kie venis la konduto; Konjekti, je kio li kontentiĝos. Tiam kiel li povus kaŝi sin? Neniel li povas kaŝi sin.”

0211

La Majstro diris: “Serĉante malnovon, sciu ion novan. Tion farante, vi povas fariĝi instruisto.”

0212

La Majstro diris: “Noblulo ne estas ujo.”

Rim. : 君子不器 – La klera noblulo ne estas vazo. (WCf5) Esploristoj komprenas la frazon, ke noblulo ne estas instrumento, kiu estas utila nur por limigita celo. Sed estas la frazo: 形而上者謂之道、形而下者謂之器 Metafizikaĵo estas vojo, fizikaĵo estas ujo. Metafizikaĵo estas nevidebla, sed fizikaĵo estas videbla. Tiel do la frazo 君子不器 signifas, ke la kapablo de noblulo estas nevidebla.

0213

Zigong demandis, kia estas noblulo. La Majstro diris: “Unue agu, poste sekvas la vorto.”

0214

La Majstro diris: “Noblulo ampleksas kaj ne partiemas, malgrandulo partiemas kaj ne ampleksas.”

0215

La Majstro diris: “Lernado sen pensado estas vana, pensado sen lernado estas dezerta.”

0216

La Majstro diris: “La studado de ekstremaj herezoj estas ja vere malutila.”

0217

La Majstro diris: “You-ĉjo, mi instruu al vi, kio estas scio. Diru, ke vi scias, kiam vi scias; kaj diru, ke vi ne scias, kiam vi ne scias. Tio estas scio.”

0218

Zigong volus lerni, kiel fariĝi salajrata oficiro. Majstro diris: “Multe aŭskultu, ne tro hastante forigi dubon. Koncernante ceterojn, paroladu prudente, tiel malmultas riproĉo. Multe rigardu, ne tro hastante fari sen kompreno. Koncernante ceterojn, kondutu prudente, tiel malmultas bedaŭro. Se malmultas riproĉo je parolado, se malmultas

bedaŭro je konduto, tiam estus per si mem enoficigite.”

0219

La duko Ai demandis, dirante: “Kion fari por obeigi popolon?”

Konfuceo diris al li: “Promociu rektulojn super malrektulojn, tiam popolo obeas. Se promocii malrektulojn super rektulojn, tiam popolo ne obeas.”

0220

Ji Kang-zi¹ demandis: “Kion fari por inspiri al popolo respektemon, fidelecon kaj entuziasmon?”

La Majstro diris: “Turnu vin kun digno al ili, ili iĝos respektemaj; kun fila pietato kaj kompatato, ili iĝos fidelaj; promociu bonulojn kaj trejnadu senkapablulojn, ili iĝos entuziasmaj.”

Rim. 1: Jisun Fei, la plej potenca ministro al la princo Ai de Lu-regno.

0221

Iu kritikis Konfuceon, dirante: “Kial vi ne okupiĝas pri politika afero?”

La Majstro respondis: “Estas dirite en *Libro*:

Havigu al vi en koro filan pietaton,

Rilatu al amikoj, kiel fratoj.

En tio kuŝas esenco de la politika afero. Kio estus ankoraŭ bezonata en la politika afero?”

0222

La Majstro diris: “Kies parolo ne estas fidinda, tiu povas atingi nenion. Oni ne povus veturigi ajnan ĉaregon aŭ ĉareton sen jugo kaj jungilaro.”

0223

Zizhang demandis: “Ĉu eblas antaŭscii pri estontaj dek generacioj?”

La Majstro respondis: “Yin-dinascio heredis decregulojn de Xia, eblas scii pri ties avantaĝo kaj malavantaĝo. Zhou-dinascio heredis de Yin la decregulojn, eblas scii pri ties avantaĝo kaj malavantaĝo. Do tiel povas esti sciataj eĉ cent generacioj, postsekvantaj de Zhou.”

0224

La Majstro diris: “Estas ja flatado fari oferadon al alies Spiritoj, fremdaj al sia familio. Estas senkuraĝe fari nenion, vidante juston.”

03 BA YI

0301

Konfuceo kritikis Ji-familion¹, dirante: “En lia korto oni aŭdacas okazigi dancon kun okoble ok vicoj². Se tio estus akceptebla laŭ dereguloj, kio do ne estus akceptebla?”

Rim.1: Ji-familio estis la plej potenca en Lu-regno, efektiva reganto. Familiestro estis 季桓子、季孫斯

Rim.2: 八佾舞 estas permesata nur por festo de la Ĉiela filo. Ji estas grand-oficisto, al kiu permesata la kolektiva danco kun kvaroble kvar vicoj.

0302

La Tri familioj¹ ludas muzikon de *Yong*² en la fino de oferado.

La Majstro diris: “Estas kantate – ‘Helpate de princoj-dukoj, la Ĉiela filo plenumis la oferadon solene.’³ Kial do tia kanto povus esti uzata en la haloj de Tri familioj?”

Rim.1: Tri familioj estis la plej potencaj en Lu-regno, t. e. Meng Sun 孟孫, Shu Sun 叔孫 kaj Ji Sun 季孫.

Rim.2: Yong 雍 estas eltiraĵo de *Poezio*, kies kantado apartenis al privilegio de Ĉiela filo de Zhou-dinastio.

Rim.3: Fragmento el *Poezio*, Zhou Song 周頌.

0303

La Majstro diris: “Se al homoj mankas bonvoleco, por kio estas dereguloj? Se al homoj mankas bonvoleco, por kio estas muziko?”

0304

Lin Fang¹ demandis pri la fundamento de dereguloj.

La Majstro respondis: “La demando estas granda. Ĉe dereguloj devas esti pli modeste ol pompe. Ĉe funebro devas esti pli kondolenc-plene ol detaleme je formalajo de meso.”

Rim. 1: Lu-regnano. Unu el lernantoj de Konfuceo.

0305

La Majstro diris: “En barbaraj landoj, norda kaj orienta, regas reĝoj, sed tiuj landoj estas nekompareblaj kun senreĝaj Zhu Xia¹.”

Rim.1: Civilizitaj landoj en Ĉinio.

0306

S-ro Ji pilgrimis al la monto Taishan.

La Majstro, kritikante, diris al Ran You¹: “Ĉu vi ne povis deadmoni lin?”

Li respondis: “Mi ne povis.”

La Majstro diris: “Ho ve! Ĉu Taishan estis konsiderata ne tiel alta, kiel Lin Fang?”

Rim. 1: Ran Qiu, Ziyou. Disĉiplo de Konfuceo. Li tiam servis al Ji-familio.

0307

La Majstro diris: “Inter nobluloj ne okazas konfliktoj. Eĉ koncernante arkpafadon, kie nepras konkurado, ili laŭdece salutas antaŭe kaj poste unu al la alia. Kaj poste venkinto drinkigas venkiton. Tia estas konkurenco inter nobluloj.”

0308

Zixia demandis, dirante: “Kio estas signifo de versoj en *Poezio* – ‘Ĉarme aperas ridkaveto; belas okuloj, klaraj je nigraj pupiloj sur blanka fono; blanko poste perfektigas diverskoloran desegnon.’¹

La Majstro diris: “En pentrado perfektigas poste la blanko.”²

Zixia diris: “Ĉu same postas ankaŭ decreguloj?”

La Majstro diris: “Shang-ĉjo, vi inspiras al mi. Mi povas interparoli kun vi pri *Poezio*.”

Rim.1 : La versoj troviĝas en *Poezio*, ĉap. “Wei-stilo”. Ili laŭdas belecon de s-ino Zhuang Jiang, edzino de landestro de Wei.

Rim.2 : Diversas opinioj pri vico de blanko inter esploristoj. Iuj sekvas la opinion de Zhu-zi, ke “sur fono de blanko estas aldonataj la koloroj.” Sed mi prenas la malnovan opinion, ke “postrestanta blanko perfektigas la pentraĵon”.

0309

La Majstro diris: “Mi povintus paroli pri decreguloj de Xia-dianstio. Sed en Qi-lando mankas atestoj. Mi povintus paroli pri decreguloj de Yin-dinastio, sed en Song-lando mankas atestoj. Ĉar mankas literaturoj en tiuj landoj. Se ili sufiĉus, mi povus atesti pri tio.”

Rim.: En Qi-lando estis feŭdita la posteuloj de Xia kaj en Son-lando – la posteuloj de Yin. Mi uzas us-modon, “povintus”, spite ke aliaj esploristoj uzas as-modon.

0310

La Majstro diris: “Mi ne volas jam spekti la feston de Supra Dio kaj prapatroj¹, post la oferado, kiam oni verŝis vinon sur pajlon por alvoki Dion kaj Spiritojn de reĝoj.”²”

Rim. 1: Mi konsideras ideogramon 禘 kiel oferadon al Supra Dio 上帝 kaj al Spiritoj de reĝaj prapatroj. Nur rekt-liniaj heredantoj de reĝoj de Zhou povas okazigi tian feston. Do Konfuceo kritikis privatan feston, oferatan de potenculoj en Lu-regno. Multaj esploristoj ne atentis pri la Supra Dio: [Ĉe la Granda Oferado, post la unua oferferŝo de vino, mi jam ne volas plu spekti. (WCf9)]

Rim. 2: Mi komprenas la ideogramon 往 kiel “alvoka ceremonio al Dioj kaj Spiritoj far de reĝo”. Vidu vortaron de Shirakawa (p.66; p.642)

0311

Iu demandis pri la festo de Supra Dio kaj tuta reĝa prapatraro.

La Majstro diris: “Mi ne scias. Se en la mondo estus iu, kiu povus paroli pri tio, troviĝus jen ĉi tie.” Dirante tiel, li montris sian polmon.

Rim.: Mi konjektas, ke tiu eldiro montras sintenon de Konfuceo al Dio kaj Spiritoj.

0312

La festado de prapatroj devas esti okazigita, kiel ili ĉeestas; la festado de Dioj devas esti okazigita, kiel ili ĉeestas. La Majstro diris: “Mi ne festas ilin, kiel ili ne ĉeestas.”

Rim.: Ĉi tie estas esprimita la sinteno al Dioj kaj Spiritoj, kiun Konfuceo traktis.

0313

Wangsun Jia demandis, dirante: “Kion signifas la frazo – ‘Se flatus, prefere flatu Spiriton de kuirforno, ol Spiriton de interna altaro.’?”

La Majstro diris: “Ne devas flati. Se farus tiel, oni ricevos punon de la Ĉielo¹ kaj ne havos jam preĝejon.”

Rim. 1: Konfuceo respektas nur la Ĉielon, ne tuŝante Diojn kaj Spiritojn.

0314

L Majstro diris: “La literaturo de Zhou, spegulante du antaŭajn dinastiojn, estas belege riĉa. Mi sekvas tiun de Zhou.”

0315

La Majstro eniris la grandan maŭzoleon kaj demandis pri ĉiu aferero.

Iu diris: “Kial oni diradis, ke la filo de Zou-ano konas decregulojn? Li, enirinte maŭzoleon, demandadis pri ĉiu aferero.”

Aŭdinte tion, la Majstro diris: “Tio ja estas laŭ la decaj reguloj.”

Rim.: Patro de Konfuceano estis Zou-ano. Li loĝis en Zou kiel loka oficisto.

0316

La Majstro diris: “Trafi la ledan celtabulon ne estas grava en la Pafarko-ceremonio, ĉar ĉiu homo diferencas unu de la alia je sia forteco. La antikva vojo estas tia.”

0317

Zigong volus forigi la oferadon de kapro en ceremonio por anonci la unuan tagon de la monato.

La Majstro diris: “Ci-ĉjo, vi ŝatas la kapron, sed mi ŝatas la decregulojn.”

0318

La Majstro diris: “Servadu al la suvereno per plenaj decreguloj. Eĉ se aliaj rigardus tion flatema.”

0319

La princo Ding demandis: “Princo uzas vasalojn kaj vasaloj servas al la princo. Kia estas la rilato?”

La Majstro respondis: “Princo uzas vasalojn laŭ decreguloj, vasaloj siavice servas al la princo per lojaleco.”

Rim.: La dukto Ding (surtrone 509 – 495 a. K.) estis la reĝo de Lu-regno.

0320

La Majstro diris: “En la poemo *Guan Ju*¹ estas ĝojo sen diboĉo, estas malĝojo sen korŝiro.”

Rim. 1: *Kvakantaj Pandionoj*, la unua poemo en *Poezio*.

0321

La princo Ai demandis pri sanktejo¹ al Zai Wo:

Zai Wo respondis: “Xia-familio konsideris pinon sankta, Yin-anoj – kverkon, Zhou-anoj – kaŝtano. Estas dirite, ke popolo estis timigita per kaŝtano.”

Aŭdinte tion, la Majstro diris: “Kio jam farita, tio ne dirata; kio jam plenumita, tio ne estas akuzebla; kio pasis, tio ne riproĉata.”

Rim. 1: La princo Ai estis filo de la princo Ding. Sanktejo por la dio de tero kaj greno 社稷. En antikva Ĉinio ĉiu ŝtato havis sian sanktejon, kaj la ŝtato restis sendependa dum ĝia reganto konservis la sanktejon. En la sanktejo ankaŭ estis juĝataj kaj punmortigitaj la krimuloj. Do popolanoj timis la simbolan arbon de la sanktejo. Zai Wo, t. e. Zai Yu, unu el disĉiploj de Konfuceo. Konfuceo estas malkontenta je la respondo de Zai Wo. Laŭ opinio de Fang Guanxu kaj Liu Baonan, per tiu eldiro Zai Wo rekomendis al la princo severe puni malbonajn subulojn. En la respondo de Konfuceo videblas lia sinteno negativa al severa legalismo, reganta popolon per timigo.

0322

La Majstro diris: “Guan Zhong¹ estis malgranda je personeco.”

Iu demandis: “Ĉu Guan Zhong estis ŝparema?”

Majstro diris: “Guan-familio posedis tri domojn por reveni, do liaj servistoj multobliĝis. Kial do li povus esti ŝparema?”

Iu demandis: “Ĉu Guan Zhong sciis decregulojn?”

La Majstro diris: “Landestro starigis septon ĉe sia pordo, ankaŭ s-ro Guan starigis la septon ĉe la pordo de sia domo. Ĉe la landestro estis la bonveniga tablo de vinpokalaj por akcepti alilandajn estrojn. Ankaŭ ĉe s-ro Guan estis tia bonveniga tablo. Se konsideri s-ron Guan scianta decregulojn, kiun do konsideru ne scianta?”

Rim. 1: Guan Zhong – kapabla ĉefministro al la princo Huan de Qin-regno.

0323

La Majstro parolis kun granda muzikisto de Lu-regno kaj diris: “Muzikon eblas percepti jen tiel – En la komenco eksonas kvazaŭ birdoj kune ekflugas; poste sekvas pura harmonio; sekve klaras ĉiu belsono; kaj libere fluante disvolviĝas la melodio; tiele

venas al perfekta fino.”

0324

Iu landlima gardisto de la urbo Yi en Wei-regno petis renkontiĝon kun Konfuseo, dirante: “Ĉiufoje, kiam nobluloj venas ĉi tien, mi nepre renkontiĝas kun ili.”

Sekvanto lasis lin vidi la Majstron.

Kiam la limgardisto eliris, li diris: “Karaj disĉiploj, al vi ne necesas ĉagreni pro via vagabondeco. Estas jam longe, post kiam la vera vojo perdiĝis sub la Ĉielo. Sed la Ĉielo ĝuste faros la Majstron heroldo, ligna sonorilo al al mondo.”

0325

La Majstro menciis pri Shao¹, dirante: “La muziko estas belega kaj bonega.”

Li menciis ankaŭ pri Wu², la muziko de la reĝo Wu, dirante: “La muziko estas belega, sed ankoraŭ ne bonega.”

Rim. 1: Shao – nomo de la muziko en la epoko de la reĝo Shun, surtroniĝinta per la abdiko de la antaŭa reĝo Yao.

Rim. 2: Wu, fondinto de Zhou-dinastio, akiris tronon per milito.

0326

La Majstro diris: “Kiel mi povus taksi tiun, kiu, estante en la supra posteno, estas ne tolerema, nek respektema en farado de decreguloj, nek kondolencplena je funebro?”

4 LI REN

0401

La Majstro diris: “Estas bele vivi kun bonvoleco. Sen strebo al bonvoleco ne eblas akiri scion.”¹”

Rim. 1: Multaj esploristoj prenas la frazon por la alia signifo:

“Se homo elektas por si loĝejon tie, kie ne estas virtuloj, kiel li povus esti rigardata kiel saĝulo?”[WCf12]

0402

La Majstro diris: “Homo sen bonvoleco ne povas vivi longe en malfavora medio, nek en favora cirkonstanco. Homo kun bonvoleco estas kontenta je bonvoleco en si mem, kaj saĝa homo faras bonvolecon profitdona.”

0403

La Majstro diris: “Nur homo kun bonvoleco povas ŝati homojn kaj povas malŝati homojn.”

0404

La Majstro diris: “Kiu strebas al bonvoleco, tiu almenaŭ ne faras malbonon.”

0405

La Majstro diris: “Tio estas riĉo kaj altrango, kion homoj dezirus. Sed se akirite ne per la justa vojo, ĝi ne restas longe. Tio estas malriĉeco kaj mizero, kion homoj ne amas. Sed se ne konkerate per la justa vojo, ĝi ne foriras. Kiel noblulo povus akiri renomon, forlasante bonvolecon? Noblulo senfine penas ne kontraŭi al bonvoleco eĉ dum manĝado, eĉ en urĝa okazo, eĉ en sia renversiĝo.”

0406

La Majstro diris: “Mi ankoraŭ ne vidis ŝatanton de bonvoleco, nek vidis malŝatanton de nebonvoleco. Neniu estas pli alta ol ŝatanto de bonvoleco. Malŝatanto de nebonvoleco plenumas la virton tiel, ke malvirtuloj ne tuŝu lin mem. Eble, oni dediĉus sin per sia tuta forto al bonvoleco almenaŭ unu tagon. Mi ankoraŭ ne rigardas homon senforta. Eble, oni havas forton, sed mi ankoraŭ ne vidas.”

0407

La Majstro diris: “Homo faras eraron laŭ sia partio. Observante la eraron, oni povas scii, kian bonvolecon¹ li havas.”

Rim. 1: Esploristoj inklinas anstataŭigi la ideogramon 仁 per homo 人. “Observante erarojn de iu, oni povas ekscii, kia homo li estas.”[WCf12-13] Mi ne konsentas kun tia anstataŭigo, ĉar ĉi tie kuŝas tre grava pensmaniero de Konfuceo, ke ankaŭ en eraro videblas bonvoleco. Tio estas doktorino de la bono de la homa naturo, kion heredis Meng-zi.

0408

La Majstro diris: “Se matene mi aŭdas la vojon, mi ne bedaŭras, eĉ se mi mortus vespere.”

0409

La Majstro diris: “Ne indas interparoli kun tia persono, kiu, strebante al la vojo, hontas pro mizero de siaj vestaĵo kaj manĝaĵo.”

0410

La Majstro diris: “Rilate al la monda vivo, noblulo nur sekvas la juston sen troa alteniĝo kaj sen troa deteniĝo.”¹

Rim. 1: 適、莫 Mi komprenis tiujn vortojn por la angla “attachment and detachment”.

0411

La Majstro diris: “Noblulo sopiras al virto, malgrandulo sopiras al tero; noblulo sopiras al leĝo, malgrandulo sopiras al favoro.”

0412

La Majstro diris: “Se oni lasu sin kondukti laŭ profito, multas rankoro.”

0413

La Majstro diris: “Se eblus regi la landon per decreguloj kaj intercedemo, kio malfacila estiĝus? Se ne eblus regi la landon per decreguloj kaj intercedemo, kio do estas tiaj decreguloj?”

0414

La Majstro diris: “Mi ne zorgas pri tio, ke mi ne havas postenon, sed zorgas pri tio, ke mi memstaru. Min ne afliktas tio, ke oni ne scias min, sed mi serĉas ion sciendan kaj scieblan.”

0415

La Majstro diris: “Shen-ĉjo, mia vojo estas trapenetrita per unu principo.”

Zeng-zi diris: “Vi pravas.”

Post kiam la Majstro foriris, aliaj lernantoj demandis: “Kion signifas tio?”

Zeng-zi respondis: “La vojo de la Majstro estas resumita nur per fideleco kun toleremo.”

0416

La Majstro diris: “Noblulo estas sentema al justo, malgrandulo – al profito.”

0417

La Majstro diris: Vidante saĝulon, strebu fariĝi egala al li. Vidante malsaĝulon, ekzameni vin mem en introspektado.”

0418

La Majstro diris: “En servado al gepatroj okazus, ke filo volus admoni ilin aŭ ne sekvus ilian volon. Tamen, helpante ilin, ne kontraŭstariĝu, laboru sen rankoro.”

Rim.: Multaj esploristoj prenas alie la sintenon de filo al gepatroj tiel, “ke filo devas milde admoni ilin de nebona ago...”[WCf14] Sed laŭ mia opinio, tia konduto kontraŭus al fila obeo al gepatroj.

0419

La Majstro diris: “Dum gepatroj vivas, filo ne devas vojaĝi foren. Se al filo neprus vojaĝi, la direkto de la celloko estas klare raportenda.”

0420

La Majstro diris: “Se filo ne ŝanĝas la vojon de patro dum tri jaroj post lia morto, tiun konduton eblas nomi fila pietato.”

0421

La Majstro diris: “Oni ne devas ne scii la aĝojn de gepatroj, ĉar unuflanke por ĝoji, aliflanke – por timi.”

0422

La Majstro diris: “Antikvuloj hezitis eldiri vortojn, ĉar ili hontis neefektigeblecon de eldiritaj vortoj pro sia nesufiĉa forto.”

0423

La Majstro diris: “Estas rare, ke perdas sobreculo-ŝparemulo.”

Rim.: Esploristoj komprenas alie: “Kiu tenas sin interne de la limoj de la dereguloj, tiu malofte eraras.”

0424

La Majstro diris: “Noblulo deziras, ke estu malrapida je la parolado kaj estu rapida je la agado.”

0425

La Majstro diris: “Virtulo ne estas soleca, nepre havas najbaron.”

0426

Ziyou diris: “Kiu tro ofte servas al la estro, tiu estos hontigita; kiu tro ofte proksimiĝas al sia amiko, tiu estos akceptata malfavore.”¹

Rim. 1: Temas ankaŭ pri alteniĝo kaj deteniĝo.

5 GONGYECHANG

0501

La Majstro parolis pri Gongye Chang¹, dirante: “Oni povas edzigi lin, kvankam li estas en malliberejo, spite ke li ne kulpas.”

Kaj la Majstro edzinigis sian filinon al li.”

La Majstro parolis pri Nan Rong², dirante: “Se en la lando estas la vojo, oni ne forlasos lin. Eĉ se mankas la vojo, li evitos punon aŭ persekutiĝon.”

Kaj Majstro edzinigis al li la filinon de sia pliĝa frato.

Rim. 1: Disĉiplo de Konfuceo. Estas dirite, ke li havis kapalon kompreni paroladon de birdoj.

Rim. 2: Nangong Kuo, disĉiplo de Konfuceo. Adoltiĝa nomo – Zirong.

0502

La Majstro parolis pri Zi Jian¹, dirante: “Li estas ja noblulo. Se mankus en Lu-regno nobluloj, kiel do tia homo aperus?”

1) 宓子賤 disĉiplo de Konfuceo, pli juna ol li je 49 jaroj. Administris gubernion 單父, ludis liron.

0503

Zigong demandis, dirante: “Kia estas mi laŭ via opinio?”

La Majstro diris: “Vi estas ujo.¹”

Zigon demandis: “Kia ujo?”

La Majstro diris: “Hulian².”

Rim.1 : Estas dirite en alia loko: “Noblulo ne estas ujo.”[0212] Tio, eble, signifas, ke noblulo ne estas limigita je malvasta specialaĵo, sed devas esti pli vasta kun ĝenerala scio.

Rim. 2: Jada vazo kun milio por oferaĵo al maŭzoleo. Konfuceo taksas specialan utilecon de la ujo. Ordinara homo devas fariĝi specialisto, utila ujo. Sed por fariĝi nobla, ne sufiĉas esti nur “ujo”.

0504

Iu diris: “Yong¹ havas bonvolecon, sed ne elokventa.”

La Majstro diris: “Por kio utilas elokventeco? Per tio oni trompas homojn, do ofte estas malŝatate. Mi ne scias, kia estas lia bonvoleco. Sed kial estus uzenda elokventeco?”

Rim. 1: Rang Yong, disĉiplo de Konduceo. Adoltiĝa nomo estas Zhonggong.

0505

La Majstro volis enoficigi Qidiao¹. La lasta respondis: “Mi ankoraŭ ne povas konvinkiĝi pri mia kapablo je la ofico.”

La Majstro ĝojis, aŭdinte tion.

Rim. 1: Qidiao Kai estas disĉiplo de Konfuceo.

0506

La Majstro diris: “Ne efektiviĝas mia vojo. Mi ekveturu per floso al maro. Kiu sekvos min, tiu estos You¹.”

Zilu, aŭdinte tion, tre ĝojis.

La Majstro diris: “You-ĉjo, vi estas multe pli kuraĝa ol mi, sed nenie akiri materialojn².”

Rim. 1: Zilu estas Zhong You.

Rim. 2: Mankas materialoj por fari floson.

0507

Grafo Meng Wu¹ demandis: “Ĉu Zilu atingis bonvolecon?”

La Majstro diris: “Mi ne scias.”

Meng Wu redemandis. La Majstro respondis: “Se temas pri You, al li oni povus komisii administri regnon de mil-militoĉaroj. Sed mi ne scias, kiomgrade li havas bonvolecon.”

Meng Wu demandis: “Kia estas Qiu?²”

La Majstro respondis: “Se temas pri Qiu, al li oni povus komisii regi urbon kun mil domoj kaj landon de cent-militoĉaroj. Sed mi ne scias pri lia bonvoleco.”

Meng Wu demandis: “Kia estas Chi?³”

La Majstro respondis: “Se temas pri Chi, al li oni povus komisii rolon ĉeesti en kortego, vestite en ceremonia formo, kaj akcepti gastojn de alilaj landoj. Sed mi ne scias pri lia bonvoleco.”

Rim. 1: Juna intendanto de Lu-regno.

Rim. 2: Ran Qiu. Adoltiĝa nomo estas Ziyou. Alie nomata ankaŭ Ran You. Tiam estis intendanto de familio Jisun.

Rim. 3: Gongxi Hua estas la plej juna el menciitaj tri disĉiploj. Adoltiĝa nomo estas Zihua.

0508

La Majstro parolis kun Zigong¹, dirante: “Kiu estas pli supera, vi aŭ Hui?”²

Zigong respondis: “Kiel mi, Ci¹, aŭdacas kompari min kun Hui? Li kapablas scii dek, aŭdinte nur unu. Mi povas scii nur du, aŭdante unu.”

La Majstro diris: “Vi neniel egalas al li. Ne nur vi, sed ankaŭ mi ne egalas al li.”³

Rim. 1: Plena nomo estas Duanmu Ci.

Rim. 2: Yan Hui. Yan Yuan, la plej ŝatata disĉiplo de Konfuceo.

Rim. 3: S-ro Wang Chongfang alie tradukis: “Mi konsentas kun vi, vi ne egalas lin.”, sekvante opinion de Zhu-zi kaj Huang Kan.

0509

Zai Yu¹ dormis tage. La Majstro diris: “Ne eblas skulpti el putra ligno, ne eblas almeti fek-teron al muro. Mi ne devus ne kritiki vin, Yu-ĉjo”

La Majstro diris pli: “Antaŭe, koncernante homon, mi kredis alies agon laŭ la dirita de li vorto, tamen nun, koncernante homon, mi aŭdas la vorton kaj poste observas la agon. Yu igis min ŝanĝi tiel.”

Rim. 1: Zai Wo, disĉiplo de Konfuceo. Zai Yu estis taksata je elokventeco. [Vd. 1103]

0510

La Majstro diris: “Mi ankoraŭ ne vidis personon kun firma karaktero.”

Iu diris kontraŭ al li: “Estas Shen Cheng¹.”

La Majstro diris: “Cheng estas pasia, kiel li povus esti firma.”

Rim. 1: 申榘 Iu konsideras lin disĉiplo de Konfuceo, alia nur Lu-regnano.

0511

Zigong diris: “Kiel mi ne deziras, ke aliaj altrudu al mi ion, tiel do mi deziras, ke ankaŭ mi ne altrudu al aliaj.”

La Majstro diris: “Ci-ĉjo, tio ankoraŭ al vi ne eblas.”

0512

Zigong diris: “Oni povas aŭdi opinion de la Majstro pri literaturo, sed oni ne povas aŭdi opinion de la Majstro pri naturo kaj Ĉiela vojo.”

0513

Zilu, aŭdinte, ne povas fari tion, kion li aŭdis. Do li nun timas aŭdi ion-ajn.

0514

Zigong demandis, dirante: “Kial Kong Wen-zi¹ postmorte estas nomita *Wen*?²”

La Majstro diris: “Li estis sprite kaj ŝatis lernadon. Kaj li ne hontis demandi al subo. Tial do oni nomis lin *Wen*.”

Rim. 1: Kong Yu, granda oficisto de Wei-regno. Kontraŭe al tiu taksado, Kong Yu aperis en la historia libro de Zuo Zhuan 左伝 kiel banala.

Rim. 2: Wen 文 estas unu el la plej respektindaj nomoj postmorte donacitaj.

0515

Taksante Zichan¹, la Majstro diris: “Estas kvar vojoj de la noblulo. Ĝentila je konduto, respektplena je servado al supro, favora je nutrado de popolo, kaj justa je uzado de popolo.”

Rim. 1: Ĉef-ministro de Zheng-regno, Gongsun Qiao (-522 a. K.).

0516

La Majstro diris: “Yan Pingzhong¹ bone interrilitis al homoj. Oni longdaŭre respektis lin.”²

Rim. 1: Yan Yin – eminenta ĉef-ministro de Qin-regno.

Rim. 2: Iuj prenas, ke Yan Yin respektis aliajn. Mi sekvas al Huan Kan. En *Mozi*, estas ĉapitro pri Konfuceo, en kiu Yan Yin ne respektis Konfuceon.

0517

La Majstro diris: “Zang Wenzhong¹ tenis orakolan testudon en sia domo kun subtraba patno arke kurbita kaj sur ĉevronoj estas desegnita marherbo. Kial li povus esti saĝa.”

Rim. 1: Zang Sunchen (- 617 a. K.), granda oficisto de Lu-regno. Li estis fama poitikisto, sed Konfuceo kritikis lin ofte pro lia uzurpaĵo.

0518

Zizhang demandis, dirante: “Zi Wen¹ estis nomumita trifoje ĉef-ministro de Chu-regno. Li ne elmontris ĝojon je mieno. Demisiite trifojojn, li ne esprimis koleron je mieno. Li transdonis antaŭan mastrumadon al la nova ĉef-ministro, nepre informigante pri sia regado. Kiel vi taksas lin?”

La Majstro diris: “Li estis fidela.”

Zizhang demandis: “Ĉu li estis persono de bonvoleco?”

La Majstro diris: “Mi ne scias. Kiel li povus esti persono de bonvoleco?”

Zizhang demandis: “Kiam Cui-zi² mortigis reĝon de Qi-regno, Chen Wen-zi³, posedanto de kvardek ĉevaloj, kiel intendanto, forlasis la regnon kaj iris al la alia lando. Alveninte tien, li diris, ke la lando ankaŭ estas samkiel lando de Cui, la granda oficisto. Kaj li forlasis. Atinginte la trian landon, li denove diris, ke tiu lando ankaŭ estas sama, kiel la lando de Cui, granda oficisto. Kaj li forlasis. Kion vi pensas pri tio?”

La Majstro diris: “Konduto estas pura.”

Zizhang demandis: “Ĉu li estas persono de bonvoleco?”

La Majstro respondis: “Mi ankoraŭ ne scias. Kiel li povus nomiĝi bonvoleca?”

Rim. 1: Eminentia ĉef-ministro de Chu-regno.

Rim. 2: Cui Zhu 崔杼, altranga oficisto de Qi-regno. Li mortigis la princon Zhuang en 548 a. K.

Rim. 3: Chen Xu Wu 陳須無 altranga oficisto de Qi-regno.

0519

Ji Wen-zi¹ ekagis nur post trifoja pensado. Aŭdinte tion, la Majstro diris: “Estas sufiĉe per du fojoj.”

Rim. 1: Ji Wen (-568 a. K.), Jisun Xingfu estis intendanto de Lu-regno sub tri princoj: Xuan, Cheng, Xiang. Li estis fama je skrupuleco.

0520

La Majstro diris: “Ning Wu-zi¹ estis saĝa tiam, kiam estas la vojo en la lando. Li aspektis kiel malsaĝa tiam, kiam mankas la vojo en la lando. Lia saĝo estas lernenda al la aliaj. Sed lia malsaĝo estas nelernebla.”

Rim. 1: Intendantato de Wei-regno en la epoko de la reĝo Wen de Jin-regno.

0521

Kiam la Majstro estis en Chen-regno, li diris: “Revenu hejmen, revenu hejmen! Anetoj de mia partio¹ freneze ambicias en beletra agado² kaj ili ne scias kiel direkti.”

Rim. 1: Partio 党 signifas la vilaĝon el 500 familioj, sed ĉi tie signifas kolektivon el lernantoj de Konfuceo.

Rim. 2: Konfuceo vagabondis de 59-jara ĝis 69-jara, ofte suferante pro manko de manĝaĵo. Li ekscitiĝas, aŭdante, ke kreskas la agado de lernantoj en Lu-regno. Laŭ mia opinio, “beletra agado” 成章, eble, signifas provon de kompletigo por longdaŭraj prelegoj far de Konfuceoj.

0522

La Majstro diris: “Boyi kaj Shuqi¹ ne tenis en sia koro malnovan rankoron. Estis rare, ke ili plendis vengeme.”²

Rim. 1: Boyi kaj Shuqi – du filoj de la princo de Guzhu-lando en Yin-dinastio. Rezininte heredi tronon, ili ermitiĝis ĉe la piedo de la Monto Shouyang. Post falo de Yin-dinastio, ili rifuzante manĝi grenon de Zhou-dinastio, malsatmortis.

Rim. 2: Wang Chongfang tradukis: “Malmultaj estis tiuj, kiuj havis malpardonemon kontraŭ ili”. La traduko sekvis la opinion de Zhu-zi 朱子.

0523

La Majstro diris: “Kial oni diras, ke s-ro Wei Sheng Gao¹ estus honesta? Kiam iu petas de li vinagron, li prunteprenis ĝin ĉe sia najbaro, kaj donis ĝin al la petanto.”

Rim. 1: Pri li oni ne scias nenion. Troviĝas iu homo, nomata Wei Sheng Gao 尾生高, kiu droniĝis en inundo, dum li atendis sian amatinon honeste sub la ponto, promesita loko por rendevuo.

0524

La Majstro diris: “Lerta parolo, afektemo kaj troa ĝentileco estas hontindaj al s-ro Zuo Qiu Ming¹. Estas hontinde ne nur por li, sed ankaŭ por mi. Zuo Qiu Ming hontis ankaŭ amikiĝi, kaŝante rankoron, kun iu ajn.² Tio estas hontinda ankaŭ por mi.”

Rim. 1: Historiisto, aŭtoro de *Zuo Chuan*.

Rim. 2: Kristo diris: “Amu viajn malamikojn.” Konfuceo postulas ne flati, sed honesti. Estas tre malfacile al ordinara homo praktiki ambaŭ postulojn.

0525

Ĉeestis Yan Yuan¹ kaj Jilu², al ili la Majstro diris: “Diru al mi vian deziron.”

Zilu diris: “Mia deziro estas posedi ĉarojn-ĉevalojn, vestaĵojn, malpezajn peltojn, kaj, eluzante ilin ĝissate, dividi ĝuon kune kun amikoj, ke mi ne bedaŭru poste.”

Yan Yuan diris: “Mi dezirus ne aroganti je mia bonfarado, kaj ne fieri je mia penado.”

Zilu demandis la Majstron: “Mi volus aŭdi vian deziron.”

La Majstro diris: “Mia strebo estas tia, ke maljunuloj trankviliĝu je tio, amikoj fidu sin reciproke je tio, malmultaj bontenu en sia koro tion.”³

Rim. 1: Yan Hui.

Rim. 2: Jilu, Zilu: t. e. Zhong You.

Rim. 3: Tradukoj diversas, depende de tio, kion signifas la ideogramo 之. Mi komprenas ĝin kiel strebon de Konfuceo, t. e. ideon. Preskaŭ ĉiuj esploristoj prenas ideogramon 少 por junuloj kaj ideogramon 懷 por zorgi, sed mi sekvas laŭ literoj. S-ro Wang Chongfang tradukis jene: “Mia aspiro estas, ke ... la junaj homoj estu bone zorgataj.”[p. 19]

0526

La Majstro diris: “Ho ve! Mi ankoraŭ ne vidis tian homon, kiu povus rigardi sian eraron kaj rimorsi en koro sin mem.

0527

La Majstro diris: “Eĉ en la vilaĝeto kun 10 domoj nepre troviĝas fidela homo, kiel mi. Tamen li estus ne tiel lernema, kiel mi.”

Rim.: Estas alia kompreno pri la loko de ideogramo 焉, laŭ la fama japana pensulo Ogyu Sorai (1666-1728) ĝi estis lokita en la komenco de la sekva frazo. Traduko estas: “Kiel ne li estus lernema, samkiel mi.”

6 YONG YE

0601

La Majstro diris: “Yong¹ povus okupi altan postenon, rigardantan la sudan flankon.”²

Rim. 1: Ran Yong, t. e. Zhonggong devenis el malalta klaso.

Rim. 2: Suda flanko signifas altan postenon je regado. Reĝo, landestroj kaj grandaj oficistoj sidis norde, turnante sin al la suda flanko.

0602

Zhonggong demandis pri Zisang Bozi¹. La Majstro diris: “Bone. Li estas simpla.”

Zhonggong diris: “Estas bone turni sin al la popolo simple kun respekto. Tamen, simple kun simpla konduto – estus jam troa simpleco, ĉu ne?”

La Majstro diris: “Yong diras prave.”

Rim. 1: Lu-regnano. Iu konjektas, ke li povas esti Zisang Hu en *Zhuang-zi*.

0603

La princo Ai¹ demandis: “Kiu el viaj disĉiploj estas lernema?”²

Konfuceo respondis: “Estis Yan Hui, li ŝatis lerni. Li ne ŝanĝis unu koleron per alia kolero, ne ripetis saman eraron. Bedaŭrinde, li mortis juna. Do li nun ne estas. Mi ankoraŭ ne aŭdis pri alia lernemulo.”

Rim. 1: La princo Ai estis reĝo de Lu-regno (surtrone 494 a. K.-)

Rim. 2: Ren 仁 kaj lernemo 好学 por konfuceanismo estas grava sinteno, neatingebla por ordinaraj disĉiploj.

0604

Zihua¹ estis sendita al Qi-regno, komisiite. Ran Qiu petis por lia patrino cerealon. La Majstro diris: “Donu al ŝi unu *fu* da greno.”

Ran Qiu petis pliigi. La Majstro diris: “Donu al ŝi unu *yu* da greno.” Ran-zi donis al ŝi kvin *bing* da greno.”²

La Mastro diris: “Mi aŭdis, ke Chi veturis al Qi-regno per koleŝo tirita de bone nutritaj ĉevaloj, vestite en malpeza pelto. Noblulo krom urĝeco ne faras superfluan donacon al riĉulo.”

Rim. 1: Zihua, t. e. Gongxi Chi, disĉiplo de Konfuceo.

Rim. 2: *Fu* – antikva mezurunuo por greno, egala al ĉ. 24 litroj. *Yu* – 64 litroj, *Bing* – 1600 litroj.

0605

Yuan Si¹, estante intendanto de la domo de Konfuceo, estis proponata la salajro je 900 da greno. Li rifuzis ricevi. La Majstro diris: Ne rifuzu. Se ne vi bezonas, donu al viaj parencoj².”

Rim. 1: Yuan Xian, adoltiĝa nomo estas Zisi.

Rim. 2: 隣里鄉党 隣 *ling* konsistis el 5 domoj-familioj, 里 *li* – el 25, 鄉 *xiang* – el 12500, 党 *dang* – el 500. Sed ĉi tie devas esti nur simbola esprimo de proksimuloj.

0606

La Majstro, parolante pri Zhonggong¹, diris: “Idon de plugbovo², havantan ruĝajn harojn kaj kornojn, eĉ se homoj ne volus utiligi³, montoj kaj riveroj ne forlasos.”

Rim. 1: Zhonggong devenis de malalta rango. Lia patro, Ran Boniu, estis plebano, tamen Konfuceo opiniis, ke li, virta kaj talenta, povus okupi gravan postenon.

Rim. 2: Nomo de patro de Zhonggong 伯牛 signifas “bovon”(牛).

Rim. 3: Oni ĝenerale komprenas, ke tio signifas “utiligi por oferado”.

0607

La Majstro diris: “Hui povas ne forlasi bonvolecon el sia koro dum tri monatoj, la aliaj lernantoj nur dum tagoj aŭ unu monato.¹”

Rim. 1: Eĉ la plej ŝatata disĉiplo povas teni bonvolecon nur dum tri monatoj. Laŭ tia argumento, bonvoleco 仁 estas portempa mensostato pli ol atingita virta karaktero.

0608

Ji Kang-zi demandis: “Ĉu oni devas enoficigi Zhong You¹ por adminidtrado?”

La Majstro diris: “You estas senŝancela, do estas neniu problemo por enoficigi lin.”

Ji Kang-zi demandis: “Ĉu eblas enoficigi Ci²?”

La Majstro diris: “Ci atingis nivelon, do neniu problemo por enoficigi lin.”

Ji Kan-zi demandis: “Ĉu eblas enoficigi Qiu³?”

La Majstro diris: “Qiu estas lerta je arto, do neniu problemo por enoficigi lin.”

Rim. 1: Zilu, Rim. 2: Zigong, Rim. 3: Ran Qiu

0609

Mi Ziqian¹ estis petita de Ji-familio, ke li fariĝu prefekto de Bi².

Mi Ziqian diris: “Mi fordankas. Bonvolu dece transdoni mian respondon. Se oni ripete nomumus min, tiukaze mi nepre foriros al Wen-rivero³.”

Rim. 1: Min Sun, disĉiplo de Konfuceo.

Rim. 2: 費 Feŭda urbo de Ji-familio. Situis nord-okcidente de nuna Fei-gubernio.

Rim. 3: Lim-rivero inter Lu kaj Qi regnoj.

0610

Boniu¹ malsaniĝis. La Majstro vizitis lin kaj demandis, tenante lian manon tra la fenestro.

Li diris: “Mi mortas. Laŭ la Ĉiela ordono.”²

La Majstro diris: “Eĉ tia persono iĝis malsana, eĉ tia persono iĝis malsana.”

Rim. 1: 冉伯牛, Ran Boniu – patro de Ran Yong (t. e. Ran Qiu, Zhonggong).

Rim. 2: Tiun frazon mi konsideras dirita de Boniu, spite ke ĉiuj esploristoj konsideras ĝin dirita de Konfuceo. Laŭ mi, turnante sin al la mortanto, ne decus diri: “Vi (aŭ li) mortas laŭ la Ĉiela ordono.” Tio kontraŭas ankaŭ al la ĉap. Zihan: “La Majstro malofte parolis pri profito, la Ĉiela ordono...” [0901]

0611

La Majstro diris: “Saĝa estas ja Hui. Unu kesteto da mangajo, unu kalabaskukurba botelo da trinkaĵo kaj malvasta loĝejo sur strateto. Homoj ne povus elteni tiun mizeron, sed Hui ne intencas ŝanĝi la plezuron. Kiel saĝa Hui estas!”

0612

Ran Qiu diris: “Mi ne estas ne ĝoja je la vojo de la Majstro, sed mankas al mi forto.”

La Majstro diris: “Al kiu mankas la forto, tiu mezvoje forlasas la vojon. Nun vi nur antaŭlimigas vin mem.”

0613

La Majstro parolis al Zixia, dirante: “Vi fariĝu nobolulo-Ruisto, ne fariĝu malgrandulo-

Ruisto.”¹

Rim. 1: 儒(Ru) signifas konfuceaniston.

0614

Ziyou fariĝis urbestro de Wucheng¹. La Majstro diris al li: “Ĉu vi trovis tie iun homon?”
Ziyou respondis: “Estas la homo, nomata Dantai Mieming². Li, irante al celloko, ne prenas proksiman kaŝvojeton. Krom oficiala afero li ne vizitas mian oficon.”

Rim. 1: Malgranda urbo de Lu-regno. Ĝi Situis sud-oriente de Qufu je 100 km, sud-okcidente de nuna Fei-gubernio, t. e. ne malproksime al Zaozhuang.

Rim. 2: Zi Yu 子羽 – pli juna ol Konfuceo je 39 jaroj. Li estis malbela je vizaĝo, fariĝis disĉiplo de Konfuceo kaj havis 300 lernantojn.

0615

La Majstro diris: “Meng Zhi Fan¹ ne fierac̆as. Kiam li retiriĝis en ariergardo pro malvenko, enirante laste pordon², li vipis la ĉevalon. Li diris: “Mi defendis la retreton ne per kuraĝeco, sed nur pro tio, ke la ĉevalo ne antaŭeniris.”³

Rim. 1: Granda oficisto de Lu-regno.

Rim. 2: Pordo de la urbo Qufu.

Rim. 3: La sama rakonto estis skribita en la libro “春秋左氏伝”, kiel okazintaĵo en 484 a. K., kiam Qi-regno atakis Lu-regnon.

0616

La Majstro diris: “Sen elokventeco de Zhu Tuo¹, nur kun beleco de Song Chao², estus malfacile travivi en la nuna mondo.”³

Rim. 1: Zhu Tuo, ĉeestante la kunsidon en Zhao Lin 召陵 en 506 a. K., elokvente preparolis por sia Wei-regno.

Rim. 2: Fama belulo 公子朝 de Song-regno.

Rim. 3: Alia traduko prenis la la frazturnon 不有.., 而有 por “either.., or” : “Either the artfulness in speech of Chu T'o or the beauty of Sung Chao”.

0617

La Majstro diris: “Kial do ne iras laŭ ĉi tiu vojo¹ la homoj, kiuj nepre eliras tra la pordo

de sia domo.”

Rim. 1: Firma konvinko estas esprimita en la frazo “ĉi tiu vojo 斯道”, trovita de Konfuceo. Lia vojo egalas al pordo de la domo, kiun oni nepre trairadas.

0618

La Majstro diris: “Se naturo¹ superas rafinitecon², estos krudulo; se rafiniteco superas naturon, estos historiisto. Noblulo estas tiu, kies naturo kaj rafiniteco ekviliblas.”

Rim. 1: 質 interna esenco, naturo

Rim. 2: 文 – literaturo, beletro. Tiukaze la signifo estas kvalito, akirita per artefarata edukiteco, rafiniteco.

0619

La Majstro diris: “Homo naskiĝas rekta. Se malrekta homo restas vivanta, li nur feliĉe evitis pereon.”

0620

La Majstro diris: “La scianto ne superas la ŝatanton, la ŝatanto ne superas la ĝuanton.”

0621

La Majstro diris: “Al la homoj, pli altaj ol mez-nivelo, oni povas paroli la altan ideon; al la homoj sub mez-nivelo, oni ne devas paroli la altan.”

0622

Fan Chi¹ demandis pri intelekto. La Majstro diris: “Oni devas nomi intelekto tiun, kiu plenumas sian devon al la popolo, kaj tiun, kiu, respektante Spiritojn, malproksimiĝas de Spiritoj.”² Fan Chi demandis pri bonvoleco. La Majstro diris: “Oni povas nomi bonvoleca tiun, kiu unue alfrontas malfacilon kaj poste rikoltas rezulton.”

Rim. 1: Fan Xu, disĉiplo de Konfuceo.

Rim. 2: Fama frazo, montranta sintenon de Konfuceo al Spiritoj. Diversas opinioj pri kompreno de la frazo “敬鬼神而遠之”. El la vidpunkto de konfuceanoj en Song-epoko, neniu Spirito ekzistas. Fama japana konfuceano, Sorai 荻生徂徠, kontraŭis al la vidpunkto pri nenieco de Spiritoj, dirante: “Kiu diras neniecon de Spiritoj, tiu ne scias la vojon de sanktuloj.”

0623

La Majstro diris: “Intelektulo ĝuas akvon, bonvoleculo ĝuas monton; intelektulo estas aktiva, bonvoleculo estas trankvila; intelektulo plezuras, bonvoleculo longe vivas.”

0624

La Majstro diris: “Qi-regno per ununura ŝanĝiĝo atingos Lu-regnon. Lu-regno per ununura ŝanĝiĝo atingos la vojon.”

Rim. : Tiu frazo montras, ke Qi-regno strebas al politika hegemonio, sed Lu strebas al morala alteco.

0625

La Majstro diris: “Pokalo *gu* ne estas pokalo *gu*. Ho pokalo *gu*, ho pokalo *gu*!”

Rim.: Frazo estas malfacile kompreni. Sed dume mi provas traduki nur laŭlitere, kaj rimarkigas tiel, kiel aliaj tradukintoj komprenas. Laŭ illi *gu* 觚 devus estis uzata en la sankta rito. Konfuceo lamentas, ke la sankta pokalo nun estas uzata por ordinara drinkado. Por ekz-lo en unu angla traduko: “A Ku that is no longer a Ku! What a Ku! What a Ku! Tia kompreno rilatas al la strebo “ĝustigi nomon”.

0626

Zai Wo demandis, dirante: “ Se oni dirus al iu bonvoleca homo, ke en la puto estas bonvoleco¹, ĉu tiuokaze li sekvus por vidi la bonvolecon?”

La Majstro diris: “Li devas fari tiel. Se noblulo², li povas vivriske iri tien. Sed ne eblas lasi lin enfali. Eblus trompi lin, sed ne eblas faligi lin en kaptilon.”

Rim. 1: Multaj konsideras 仁 bonvolecon kiel 人 homon, kaj tradukas: “en la puto estas homo.” Sed mi opinias, ke “puto” ĉi tie signifas parabole lokon profundan, misteran.

Rim. 2: Estas tre malfacile kompreni la frazon. Esploristoj ne deferencigas bonvolecon de noblulo.(仁者,君子) Mi ne konsideras ilin samaj.

0627

La Majstro diris: “Vaste lernu literaturon, interrilatu laŭ decreguloj, kaj tiel eblas ne devojigi.”

Rim. : Teksto estas sama, kiel en 1215.

0628

La Majstro intervidiĝis kun Nanzi¹. Tio ne plaĉis al Zilu. La Majstro ĵuris: “Se de mi estus farata io malbona, tiuokaze la Ĉielo malhelpus tion, la Ĉielo malhelpus tion².”

Rim. 1: Nanzi estas edzino de la princo Ling, reĝo de Wei-regno. Ŝi estis enamiĝinta en Song Chao, kiam ŝi estis princino de Song-regno. Konfuceo havis 57 jarojn, kiam li vizitis Wei-regnon.

Rim. 2: Multaj tradukas 之, kiel “min”.

0629

La Majstro diris: “Ĝusta Mezo¹, kiel virto, estas ekstreme gravega. Jam de longe ĝi malmultas en la popolo.”

Rim. 1: 中庸 La plej alta morala normo, laŭ kiu la homa konduto ne devas esti troa nek maltroa.

0630

Zigong diris: “Se estas iu, kiu vaste favoras al la popolo kaj povas savi popoloamason, kiel vi nomas lin? Ĉu eblas nomi lin bonvoleca?”

La Majstro diris: “Kia afero en bonvoleco? Nepre tiu persono estas “sankta”¹. Yao kaj Shun ŝargis sin dolorplene per la zorgado pri tio. Bonvoleco kuŝas jen en tio – ‘Se vi mem volus stariĝi, tiam vi unue starigu la aliajn. Se vi meme volus atingi ion, lasu antaŭ ĉio aliajn atingi ĝin. Bonvoleca estas tiu, kiu povas zorgi unue pri la aliaj, kiel pri si mem, la plej proksima primero.’² Tio ja povas esti nomata bonvoleco.”

Rim. 1: Deferencas bonvoleco kaj sankteco je afero. La rimarkinda afero de la sankata reĝo estas subtenata per kaŝita bonvoleco de sennomuloj. Sen bonvoleco de ordinaraj homoj ne povas esti la granda afero de la sankta reĝo.

Rim. 2: Tio ege similas al fama devizo de kristanismo: “Kiel vi volas, ke la homoj faru al vi, faru ankaŭ al ili tiel same.”[Luko 6:30]

7 SHU ER

0701

La Majstro diris: “Mi transdonas la antikve diritan, sed ne kreas. Mi kredas kaj ŝatas antikvon. Mi en mia koro komparas min kun Lao Peng.¹”

Rim. 1: Lao Peng – granda oficisto de Yin-dinastio. Li okupiĝis pri interpretado de tekstoj en antikvaj libroj.

0702

La Majstro diris: “Silente mi akiras scion. Lernante, mi ne enuas. Instruante aliajn, mi ne laciĝas. Kio alia estus por mi?¹”

Rim. 1: 何有於我哉 Estas alia traduko: “Kia malfacilo estas por mi?” aŭ “Kiun el ĉituj aferoj me jam bone plenumas?” Mi sekvas la interpreton de la japana konfuceano Ito Zinsai.

0703

La Majstro diris: “Zorgas mi jen pri tio – Ĉu mi ne instruas tion, kion lernas? Ĉu mi ne povas praktiki la juston, kiun mi aŭdis? Ĉu mi ne povas korekti malbonon?”

0704

La Majstro vivas en sia domo tute libere laŭplaĉe kun freŝa vikleco.

0705

La Majstro diris: “Mi ege kadukiĝis. Delonge mi ne vidas en sonĝo la dukon de Zhou.¹”

Rim. 1: Zhou Gong Dan, juna frato de la reĝo Wu. Konfuceo ege respektis lin.

0706

La Majstro diris: “Strebi al la vojo, baziĝi sur la virto, apogi sin sur bonvoleco, ludi en artoj.”

0707

La Majstro diris: “Mi neniam rifuzis instrui al ĉiu ajn, kiu donas al mi faskon da sekviando¹.”

Rim. 1: Fasko da sekigita viando estis pago por la instruado.

0708

La Majstro diris: “Se ne koleras¹, ne kleriĝas; se ne incitiĝas², ne impetas. Se kiu, kun unu angulo montrite, ne povus ekscii la aliajn tri, al tiu mi ne ripetas instrui.”

Rim. 1: Mi tradukis ideogramon 憤 laŭlitere.

Rim. 2: 排 signifas mensostatton, en kiu oni iritas sin, ne povante eldiri.

0709

La Majstro ne satmanĝis ĉe funebrantoj¹. Li ne kantis en la funebra tago, kiam oni ploris.”

Rim. 1: En la ĉapitro “Kontraŭ Konfuceanismo” de Mozi (非儒) estis kritikita la konfuceano, kiu satmanĝas en funebro.

0710

La Majstro, parolante kun Yan Yuan, diris: “Uzate, faras; Forlasite, kaŝas sin. Tiel povas sinteni nur mi kaj vi.”

Zilu demandis: “Se al vi estus komisiite tri batalionojn, kun kiu vi komandus la armeon?”

La Majstro diris: “Ne kun tiu, kiu ne bedaŭras morti, havante tian temerarecon lukti kontraŭ sovaĝa tigro kaj transiri riveron sen ŝipo, sed nepre kun tiu, kiu estas skrupula antaŭ la afero kaj ŝatas manovradon por venki.”

0711

La Majstro diris: “Se riĉaĵo estus celo atinginda, mi fariĝus ĉio ajn, ĉu fi-oficisto aŭ pedelo¹. Se tio ne estas atinginda, mi okupiĝas je tio, kio al mi plaĉas.”²

Rim. 1: 執鞭之士 oficisto de malalta rango, kiel vojkondukanto por altranguloj. De nuna vidpunkto al tia malalta rangulo estas malfacile fariĝi riĉa.

Rim. 2: Zheng Xuanzhu rimarkigis: “Konfuceo vizitadis landojn, sed nenie estis dungita. Sciante finfine, ke la vojo ne povas esti malfermita, li eldiris tiun vorton.”[Rimarko far de la trovita fragmento en Donghuang]

0712

Tio, kion la Majstro skrupule traktis, estas festo¹, milito kaj malsano.

Rim. 1: De multaj esploristoj ideogramo 齊 estas konsiderata kiel fasto 齋戒. Aperus nepre la demando, kia estas rilato ĉe Konfuceo inter “ignoro” de Spiritoj kaj skrupula observo de fasto. Fasto estas por respekti parapatrojn. Ĉu tio ne signifas al Konfuceo respekton al spiritoj? Tial do mi komprenis la ideogramon 齊 kiel “feston” 祭祀.

0713

La Majstro, estante en Qi-regno¹, aŭdis muzikon “Shao”², kaj li dum tri monatojn forgesis la bonguston de viando. Li diris: “Neatendite, muzikarto estas tiom plezuriga.”

Rim. 1: En 35-jara, Konfuceo fariĝis subulo de Gao Zhao-zi de Qi-regno.

Rim. 2: Shao – nomo de muzikpeco en la epoko de la reĝo Shun. Konfuceo opiniis ĝin tre bela kaj tre bona. Estas dirite, ke Chen-familio, sekvaj reĝoj de Qi, estis posteuloj de Shun.

0714

Ran You diris: “Ĉu nia Majstro subtenas la nunan princon de Wei-regno?”

Zigong diris: “Nu, mi rekte demandos lin pri tio.”

Zigong eniris kaj demandis: “Kiaj homoj estis Boyi kaj Shuqi?”

La Majstro diris: “Antikvaj saĝuloj.”

Zigong demandis: “Ĉu ili havis rankoron?”

La Majstro respondis: “Ili deziris bonvolecon kaj atingis bonvolecon. Pro kio ili devus havi rankoron.”

Zigong eliris kaj diris: “Nia Majstro ne subtenas.”

Rim. 1: Reĝo de Wei-regno, Ling havis filon, nomatan Kuai Kui. La lasta emigris alilanden en 496 a. K. Post la morto de Ling en 493 a. K., estis surtronigita Zhe, filo de Kuaj Kui. Poste sekvis konflikto inter patro kaj filo, kio memorigis epizodon de Boyi kaj Shuqi, kiuj cedis tronon reciproke unu al alia.

0715

La Majstro diris: “Manĝi de simpla manĝaĵo kaj trinki da akvo, kuŝi sur la brako kiel kapkuseno – jen en kio troviĝas mia ĝojo. Riĉaĵo kaj altrango ĉe maljusteco estas por mi vanto, kvazaŭ fluanta nubo.”

0716

La Majstro diris: “Se kelkajn jarojn poste, en mia 50-jara, mi lernos libron de “Ŝanĝiĝoj”¹, mi povos vivi sen grandaj eraroj.”

Rim. 1: Iuj prenas 易 kiel la titolon de Libro pri aŭguro 易經. Laŭdire ĝi estis editorita de Konfuceo. La aliaj traktas ĝin kiel adverbon “facile”.

0717

La Majstro respektis tradician lingvon¹. *Poezio, Libro de historio, Libro de Decreguloj*,² ĉiuj estis legataj per tradicia lingvo.

Rim. 1: 雅言 signifas la komunan lingvon, aŭ tradician lingvon de okcidenta Zhou 西周.

Rim. 2: 詩經、書經、禮記

0718

La duko de She¹ demandis Zilu pri Konfuceo. Zilu ne respondis. La Majstro diris al Zilu. “Kial vi ne diris – ‘Laŭ persona karaktero Konfuceo estas tia, ke li, ekscitiĝinte, forgesas manĝi; ĝuante, forgesas ĉagrenon; ne sciante maljuniĝon, li atingis tiel la nunon.’ –”

Rim. 1: 沈諸梁 – prefekto de She, unu distrikto en Chu-regno. Li ordigis tumulton de Baigong 白公 en 479 a. K.

0719

La Majstro diris: “Mi estas intelektulo ne laŭnature, sed amanto de antikveco kaj ĝia sprita serĉanto.”

0720

La Majstro ne parolis pri stranga okulto, nek pri malpuraj spiritoj.

0721

La Majstro diris: “Se trio pe iras, nepre troviĝas mia instruisto. Elektante la plibonan kvaliton, mi sekvas ĝin. Vidante la pli malbonan, mi korektas ĝin en mi mem.”

0722

La Majstro diris: “La Ĉielo naskis min virta. Kion do povus fari al mi tia fiulo, kiel

Huantui¹.

Rim. 1: Ministro pri militaj aferoj de Song-regno. Li provis atenci Konfuceon en 491 a. K., kiam la lasta vojaĝis de Wei al Cao-regno.

0723

La Majstro diris: “Karaj lernantoj, ĉu vi dubas, ke mi kaŝas ion antaŭ vi? Mi havas nenion por kaŝi. Estas nenio krom tio, kion mi faras kune kun vi. Tia estas mi.”

0724

Kvar temoj, kiujn la Majstro instruas, estas literaturo, praktiko, lojaleco kaj fideleco.”

0725

La Majstro diris: “Sanktulon mi ne povas vidi, sed se mi povas vidi noblulon, mi estas kontenta.” La Majstro diris: “Bonulon mi ne povas vidi, sed se mi povas vidi personon kun konstanta strebo, mi estas kontenta. Malfacile esti konstanta, ĉar oni ŝajnigas neekziston ekzistanta, malplenon plena, malriĉon riĉa.”

0726

La Majstro kaptis fiŝojn per unu hoko, sed ne per reto¹. Li arkpafis birdon flugantan, sed ne nestantan.”

Rim. 1: Ideogramo 網 estas komprenata kiel 網.

0727

La Majstro diris: “Eble, troviĝas iu kreanto ne per intelekto. Mi ne estas tia. Mi aŭskultadas multe kaj, elektinte la plibonan, sekvas ĝin. Mi rigardadas multe kaj agnoskas tion nur post perceptado per intelekto.”

0728

Estis malfacile interparoli kun loĝantoj en Huxiang. Iam ekaperis iu knabo vidi Konfuceon. Disĉiploj konfuziĝis. La Majstro diris: “Laŭdinde estas, ke la knabo volas iri antaŭen, sed ne malantaŭen. Kion esperi plimulte? Se kiu kun pura koro volas mem antaŭeniri, ties pureco devas esti nun akceptata. Ne bezonas zorgi pri lia estonteco kaj pasinteco.”

0729

La Majstro diris: “Ĉu bonvoleco troviĝas fore? Se mi deziras bonvolecon, la bonvoleco estiĝas jen ĉi tie.”

0730

Iu ĉef-juĝisto¹ de Chen-regno demandis: “Ĉu la princo Zhao² scias decregulojn?”

Konfuceo respondis: “Li scias decregulojn.”

Post kiam Konfuceo retiriĝis, la ĉef-juĝisto turnis sin al Wuma Qi³ kun manoj kunigitaj kaj diris: “Mi aŭdis, ke noblulo ne estas partiemas. Sed ĉu okazus, ke noblulo partiemas? Zhao edziĝis kun samfamilia⁴ princino de Wu-regno, tiel do li alinomas ŝin Wu Meng-zi. Se la princo scias decregulojn, kiu do ne scias decregulojn?”

Wuma Qi diris al Konfuceo pri tiu opinio. Konfuceo diris: “Mi estas feliĉulo, ĉar se mi eraras, oni nepre sciigas min pri tio.”

Rim. 1: 陳司敗 Iuj esploristoj konsideras gin nomo de persono.

Rim. 2: 昭公 La suvereno de Lu-regno.

Rim. 3: 巫馬期 Disĉiplo de Konfuceo, pli juna ol li je 30 jaroj.

Rim. 4: Familinomo estis 姬. Estis evitenda la geedziĝo de samfamilianoj.

0731

La Majstro kantis kun aliaj, kaj, sentante la kanton bona, nepre li lasis ilin denove ripeti. Kaj poste akompanis kanti harmonie.

0732

La Majstro diris: “Eble, mi ŝatas literaturon pli multe ol aliaj homoj. Sed mi ankoraŭ ne atingis sufiĉe la virton por tutkorpe kondukti kiel noblulo.”

0733

La Majstro diris: “Mi ne aŭdacas fariĝi sankta kun bonvoleco. Sed mi ne enuas fari tian aferon kaj ne laciĝas en instruado al homoj. Mi povas diri nur tiel.”

Gongxi Hua¹ diris: “Ĝuste tion ni, lernantoj, ne povas ellerni.”

Rim. 1: Gongxi Chi – disĉiplo de Konfuceo.

0734

La Majstro malsaniĝis. Zilu petis de li permeson preĝi.

La Majstro diris: “Ĉu estas iu, al kiu preĝi?”

Zilu respondis: “Estas tiu. En la libro *Lei* estas skribite – ‘Preĝu por vi al supra kaj suba dioj’ –”

La Majstro diris: “Mi preĝis jam longe antaŭe.”¹

Rim. 1: Laŭ mia opinio, 禱久 signifas, ke Konfuceo antaŭe preĝis, sed tutegale malsaniĝis. Tiu eldiro memorigas min pri letero de Belinskij al Gogol.

0735

La Majstro diris: “Luksego kondukas al senhumileco, ŝparemo – al avareco. Estu prefere avara ol nehumila.”¹

Rim. 1: En tiu pensmaniero Konfuceo similas al Mozi, kvankam la lasta kritikis konfuceanojn pro malŝparemo.

0736

La Majstro diris: “Noblulo estas aplomba kaj libera. Malgrandulo estas ĉiam timema.”

0737

La Majstro estas milda kaj severa, majesta kaj nekruela, humila kaj trankvila.

8 TAI BO

0801

La Majstro diris: “Eblas taksi Taibo¹ kiel homon de la plej alta virto. Trifoje li cedis la surtroniĝon al aliaj. La popolo ne povas ne aplaŭdi lin.”

Rim. 1: 泰伯 La unuenaskita filo de Gugong Danfu, la praulo de Zhou-dinastio. Avo de Wen havis tri filojn – Taibo, Zhongyong kaj Jili. La avo vidis la filon de Jili tre saĝa, do volis heredigi al li tronon. Por tio Jili devas fariĝi la sekva reĝo. Sciante la volon de patro, Taibo kaj Zhouyong, pliaĝaj fratoj, foriris suden. Filo de Jili estas reĝo Wen, fondinto de Zhou-dinastio.

0802

La Majstro diris: “Sen decreguloj ĝentileco iĝas vana; sen decreguloj skrupuleco iĝas maltrankviliga; sen decreguloj braveco iĝas malorda; sen decreguloj simpleco iĝas kruda. Se noblulo-estro dece turnas sin al gepatroj, tiam la popolo vekiĝas je bonvoleco. Se li ne forlasas la malnovajn, la popolo rilatas unu al alia senindiferente.”

0803

Zeng-zi malsaniĝis. Li venigis siajn lernantojn kaj diris: “Rigardu miajn piedojn, rigardu miajn manojn! Estas dirite en *Poezio* – ‘Vivas nerveze timeme, kvazaŭ iradi ĉe la rando de abismo, kvazaŭ surface de maldika glacio’ – Kaj nun kaj poste, finfine mi sentas min libera de tiaj zorgoj, evitinte jam danĝeron, karaj knaboj!”

Rim. : La mesaĝo de Zeng-zi signifas: “Dum viaj korpoj moviĝas, utiligu vin por plenumi vian taskon, ĉar vi ĉiam iras laŭ rando de abismo. Mi feliĉe plenumis mian taskon.”

0804

Zeng-zi malsaniĝis. Meng Jing-zi¹ vizitis lin. Zeng-zi diris: “Birdo ĉe sia morto kantas triste. Homo ĉe sia morto parolas bonon. La grava principo de vojo por la noblulo konsistas el tri – tenu vin mem atente, ke vi estu fora de kruda aroganteco; ĝustigu vian vizaĝon, ke vi alproksimiĝu al memfido; elparolu prudente, ke vi forigu banalajn erarojn. Pri aliaj malgrandaj aferoj estu komisiite al specialistoj-oficistoj.”

Rim. 1: Granda oficisto en Lu-regno, filo de Meng Wubo.

0805

Zeng-zi diris: “Estante kapabla, li turnis sin kun demandoj eĉ al nekapabluloj. Estante multescia, li turnis sin kun demandoj al malmultesciuloj. Havante, li kondukis kvazaŭ nehavanto. Estante plena, li tenis sin kvazaŭ malplena. Estante ofendita, li ne venĝis. Tia amiko mia antaŭe okupis sin je aferoj ĉi tie.”

Rim. : Multaj esploristoj supozas la amikon Yan Hui.

0806

Zeng-zi diris: “Ĉu eblas nomi nobla tiun, al kiu oni povas komisi zorgadon de juna reĝo, alta je 6 ĉi, kaj al kiu eblas esti komisiite zorgi la vivon de la popolo en cent lioj, kaj kiu ne ŝanceliĝas ĉe la grandaj festoj? Oni povas tiun nomi noblulo.”

0807

Zeng-zi diris: “La persono ne devas ne havigi al si fortan karakteron kun granda animo, ĉar la tasko estas peza kaj fora estas la vojo. Bonvoleco estas lia tasko. Ĉu ĝi ne estas peza? La tasko malŝarĝiĝos nur post la morto¹. Ĉu tio ne estas malproksima?”

Rim. : Tiuj vortoj kuraĝigis longe homojn kun alta strebo en Aziaj landoj. Sed japanoj inklinis preni la vorton 死而後已 por plenumado de tasko per sia morto.

0808

La Majstro diris: “Disvolviĝante per *Poezio*, starigite per decreguloj, perfektigite per muziko¹, persono kreskas.”

Rim. 1: 樂 havas du signifon: muziko kaj plezuro. Mozi ne taksis alte la utilecon de muziko.

0809

La Majstro diris: “La popolon oni povas obeigi, sed oni ne povas sciigi.”

Rim. : Ekzistas diversaj opinioj pri tiu farazo 不可使知之. 1) Reganto ne devas ne sciigi popolon pri sia politiko de regado; 2) Popolo ne havas kapablon scii; 3) Estas malfacile sciigi kialon; 4) Oni ne devas altrudi al popolo scion; 5) La nivelo de popolo estas tiel alta, ke ne necesas sciigi desupre.

0810

La Majstro diris: “Se oni ŝatas kuraĝon kaj malamas povrecon, okazos tumulto. Se oni tro malamas homojn, ne havantaj bonvolecon, okazos tumulto.”

Rim. : Oni tumultas ne nur pro malbona intenco, sed ankaŭ pro bonkoreco kaj justamo.

0811

La Majstro diris: “Eĉ se iu havus belan kapablon de Zhougong Dan, se aroganta kaj avara, la ceterajn bonajn kvalitojn ne indas vidi.”

0812

La Majstro diris: “Kiu jam lernis tri jarojn, ne atingis nivelon fariĝi salajrate enoficigitaj, al tiuj ne estas facile.”

Rim. : Mi provas traduki laŭlitere. Diversaj interpretoj pri 不至於穀. 1) Iu interpreteblas kiel 善: apenaŭ estas homoj, ne atingiĝintaj la bonon[孔安国]; 2) la alia interpreteblas: apenaŭ estas homoj, dezirantaj daŭrigi lernadon[朱子]; 3) la tria: apenaŭ troviĝas homoj, ne atingintaj kvaliton por oficistoj.[孫綽]

0813

La Majstro diris: “Ŝatu lernadi kun forta kredo, tenu firme bonan vojon¹ ĝis la morto, ne eniru en danĝeran landon, ne restu en malorda lando. Kiam troviĝas la vojo en la mondo, montru vin, sed, kiam ne troviĝas la vojo, kaŝu vin. Se en la lando ekzistas la vojo, tiam estas hontinde fariĝi malriĉa kaj mizera. Se en la lando ne ekzistas la vojo, tiam estas hontinde esti riĉa kaj altranga.”

Rim. 1: Konfuceo ripete insistas la vorton “vojo” ĉi tie kiel “justo”. Koncepto de “道 dao” ege diferencas de Lao-zi. Estas notinde, ke Konfuceo rekomendas ermitecon ol lukton al loĝantoj en malorda lando. Kaj estas ankaŭ notinde, ke Konfuceo aprobas riĉon al la loĝantoj en la lando kun vojo.

0814

La Majstro diris: “Tiu, kiu ne estas sur la posteno, ne devas ŝovi sian nazon en alies administradon.”

0815

La Majstro diris: “Kiam Zhi¹, muzikmajstro, ekludis la lastan parton² de la movimento “Guan Ju”³ en *Poezio*, miaj oreloj iĝis plenplenaj je vasta libereco.”

Rim. 1: Muzika majstro de Lu-regno.

Rim. 2: 乱 havas tri signifojn: “malordo”, “ordigo” kaj “lasta parto de muziko”.

Rim. 3: 關雎 pandiono.

0816

La Majstro diris: “Kiu estas freneza kaj samtempe ne rekta, infaneca kaj samtempe malhonesta, sinceraspekta kaj samtempe malfidela¹, tian homon mi ne komprenas.”

Rim. 1: Se freneza, devus esti rekta; se infaneca, devus esti honesta, se sinceraspekta, devus esti fidela.

0817

La Majstro diris: “Lernado estas neatingeble senlima. Timu ĉeson¹ de lernado.”

Rim. 1: 恐失之 Multaj esploristoj interpretas: “Timu perdon de la lernitan.”

0818

La Majstro diris: “Grandioza estis la mondo, regata de reĝoj Shun kaj Yu. Sed ili mem per sia mano ne administris.¹”

Rim. 1: Pri la frazo 而不與焉 estas diversaj opinioj: 1) Ili komisiis administradon al saĝuloj, 2) Konfuceo bedaŭris, ke li ne povis partopreni en la administrado de Shun kaj Yu [江熙], 3) Ili klopodis kaj nur popolanoj ĝuis.

0819

La Majstro diris: “Granda estas la reĝo Yao. Li, majesta el majestaj, rigardis nur la Ĉielon granda. Yao nur obeis laŭ tio. La afero estis tiel vaste ampleksa, ke la popolo ne povis nomi tion. Estante majesta el majestaj, li sukcesigis. Restas certe klara literaturo rilate al li.”

0820

Shun havis kvin subulojn, kaj la mondo estis regata. La reĝo Wu diris: “Ĉe mi estas 10 lertaj subuloj por ordigi¹.”

Konfuceo diris: “Estas malfacile kolekti kapablulojn, ĉu ne? En Tang-Yu epokoj², la erao de Wu estis la plej prospera. Sed estis unu virino³, do ne dek, sed naŭ. Ili regis du trionojn de la mondo kaj sekvis ankaŭ Yin-dinastion. Virteco de Zhou povas esti nomata kiel la plej alta virto.”

Rim. 1: Signifo de 亂 estas “ordigo”.

Rim. 2: Alinomo de Yao – Shun.

Rim. 3: 太姒, patrino de Wu.

0821

La Majstro diris: “Yu estas al mi tute neriproĉebla. Li manĝadis nelukse, servadis obeeme al Spiritoj¹, vestiĝis simple, kaj en la festoj tre bele vestis sin per ceremonia ĉapo kaj antaŭtuko. Li faris la palacon tre modesta kaj kun tuta forto okupiĝis pri konstruo de digo kaj dren-irigacio. Yu al mi estas neriproĉebla.”

Rim. 1: Mozi kaj mohistoj estimis la reĝon Yu 禹 plej alta. Ili respektis Spiritojn, kontraŭante al konfuceanoj. Sed ĉi tie Konfuceo taksas la reĝon Yu, obeeman al Spiritoj.

9 ZI HAN

0901

La Majstro parolis pri profito malofte, nur kun¹ Ĉiela ordono kaj kun bonvoleco.

Rim. 1: Diversaj komprenoj pri la ideogramo 與. Kiu konsideras ĝin signifo “kaj”, tradukis: “La Majstro malofte parolis pri profito, la volo de Ĉielo kaj perfekta virto.” [Wcf. 34] Tia legado estas populara.

Sed, spite la tian legadon, en Analektoj ofte aperas vortoj pri “ordono” kaj “bonvoleco”. Fama japana pensulo-konfuceano, Ogyu Sorai [1666-1728] proponis la legadon, kia estas mia traduko. Serĉado de profito estas limigita per la Ĉiela ordono kaj per bonvoleco.

0902

Iu en vilaĝo Daxiang diris: “Granda estas ja Konfuceo! Kun vasta scio, sen ajna aparta faka nomo.”

Aŭdinte tion, la Majstro diris al siaj disĉiploj: “En kiu fako do mi laborus, ĉu koĉero aŭ arkpafisto? Prefere mi estu koĉero.”

0903

La Majstro diris: “Al decreguloj konformis iam ĉapo el kanabtolo, sed nun el silko, pli ekonomia. Mi sekvas amason rialte al tio. Laŭ decreguloj oni devas riverenci el la loko de malsupre. Sed nun multaj riverencas supre.¹ Tio estas aroganteco. Spite la amason, mi sekvas la riverencon de malsupre.”

Rim. 1: Laŭ decreguloj oni devas riverenci malsupre de la perono de la palaco, sed nun oni reverencas nur antaŭ la trono post eniro en la palacon.

0904

La Majstro estis libera de kvar difektoj¹ – arbitreco, altrudiĝemo, nefleksebleco kaj egoismo.

Rim. 1: 意、必、固 – eblas traduki alie. 意 konjekto, spekulado 必 absoluta jesigo, 固 obstineco, alligiteco, k. t. p. Tiuj difektoj interrilatas unu kun la alia laŭ la opinio de Zhu-zi.

0905

La majstro estis danĝerigita en Kuang¹, kaj diris: “Post la forpaso de reĝo Wen kulturo ne estas ĉi tie krom en mi? Se la Ĉielo ĝuste nun intencas pereigi la kulturon, al posteuloj jam ne eblos ricevi la kulturon. Se la Ĉielo ne intencas pereigi la kulturon, kion do povus fari al mi homoj en Kuang?”

Rim. 1: Kuang 匡 – lokonomo en Song-regno, en nuna Henan provinco Chang Yuan gubernio. Konfuceo estis atakita de loĝantoj, kiuj prenis lin por Yang Hu, prirabinta antaŭe kuanganajn.

0906

Iu ĉefministro¹ demandis Zigong pri Konfuceo: “Ĉu la Majstro estas sanktulo? Kial li estas varitalenta?”

Zigong respondis: “La Ĉielo faris lin tia, sankata kaj multtalenta.”

Aŭdinte tion, la Majstro diris: “Ĉu la ministro scias min? En mia juneco mi estis malriĉa, do mi iĝis varitalenta en multaj bagatelajoj, Ĉu noblulo estas varitalenta? Ne, tiu havigas al si ne multe da talentoj.”²

Rim. 1: 大宰 ĉefministro – en tiu epoko estis tiu rango en Song kaj Wu regnoj. Iu esploristo konsideras tiun 大宰嚭 de Wu-regno, kiu interparolis kun Zigong en 483 a. K.

Rim. 2: Konfuceo mem ne rigardas sin sanktulo nek noblulo, havante multe da talentoj. Endas rekonsideri la signifon de la fama frazo: “Noblulo ne estas instrumento-ujo.”

0907

Laŭ Lao¹, la Majstro diris: “Mi ne estis dungita², do fariĝis varitalenta je artoj.”

Rim. 1: Disĉiplo de Konfuceo.

Rim. 2: 吾不試 – dungita, enoficigita.

0908

La Majstro diris: “Ĉu mi havas scion? Ne, mi ne havas scion. Iam iu kampulo demandis min pri io, kion mi tute ne sciis. Sed mi, prenante ambaŭ ekstremaĵojn, perkutis la demandon kaj penis respondi laŭeble.”

0909

La Majstro diris: “La fenikso ne alflugas, la Flava rivero Huang He ne aperigas mapon ĉionsolveblan.¹ Kio al mi restas por fari?”

Rim. 1: Laŭ legendo, kiam sankta reĝo ekregos, tiam alflugos fenikso kaj aperos bonaŭgura mapo el la Flava rivero.

0910

Vidante homon, vestitan funebre, homon kun ceremonia ĉapo, aŭ homon blindan, la Majstro, eĉ se okaze tiu estas pli junaj, nepre stariĝis kaj humile piedpaŝis, rapide preterirante.”

0911

Yan Yuan kun miro admiris la Majstron, dirante: “Ju pli supren mi rigardas, des pli alta li staras: ju pli mi penetras en lin, des pli firma li estas: kiam mi vidas, jen li staras antaŭe, jen subite malantaŭe. La Majstro iom post iom konstante gvidas homojn al bono, grandigas ilin per literaturo, ordigas ilin per decreguloj. Mi ne povas forlasi, eĉ se mi dezirus. Mi penas uzi mian kapablon plejeble. La Majstro starigas al mi tiom pli altan celon, ke mi ne povus aliri al li, kvankam mi volus sekvi lin.”

0912

La Majstro ege malsaniĝis. Zilu provis ŝajnigi lernantojn vasaloj por fari la funebtron luksa. La majstro resaniĝis kaj diris: “De longe vi, You, faras trompon, por ŝajnigi nevasalojn vasaloj. Ĉu vi trompas min? aŭ trompas la Ĉielon? Mi prefere mortos portate en la manoj de miaj lernantoj ol portate per la manoj de vasaloj. Por mi estas preferinde morti ie, vojrande, sen ajna granda funebro.”

0913

Zigong diris: “Se ĉi tie estus bela jado, ĉu vi tenus ĝin en kesto, aŭ vendus ĝin kontraŭ bona prezo?”

La Majstro diris: “Kompreneble mi vendus ĝin, vendus ĝin, mi atendas la aĉetonton.”

0914

La Majstro dezirus loĝi nord-oriente en landoj de naŭ barbaroj. Iu diris: “Tie estas tro kruda por vi fari iun aferon.”

La Majstro respondis: “Kie loĝos noblulo, tie neniel restos kruda.¹”

Rim. 1: Japanaj konfuceanoj tre ĝojis je tiu teksto, ĉar Konfuceo dezirus iri al ili [vd. Ito Zinsai 伊藤仁齋 『古義』]. Kaj Konfuceo konvinkiĝis je tio, kie ajn la noblulo loĝas, tie estiĝas kulturo.

0915

La Majstro diris: “Mi revenis el Wei-regno al Lu-regno¹. Poste mi ĝustigis muzikon. Tiel estas ordigita la vico de kortega muziko kaj odoj.”

Rim. 1: Konfuceo, 68-jara, revenis hejmen en 484 a. K., ĝis la morto li okupiĝis je ordigo de klasika kulturo.

0916

La Majstro diris: Ĝenerale, oni servas al dukoj kaj grand-oficistoj ekstere, oni servas al siaj patroj kaj pliaĝaj fratoj interne. En funebro oni ne povas ne klopodi plejeble kaj oni ne faras vinon mankanta.¹ Kio el supre menciitaj nun apartenas al mi?”

Rim. 1: 不為酒困 Esploristoj komprenas la frazon “ne esti venkita de vino.” [WCf36] Mi prenas tiun frazon: “oni ne suferas pro manko de vino.” Mi konjektas, ke Konfuceo tute retiriĝis el ofica laboro kaj ekonomie suferadis ofte tiom, kiom ne eblis aĉeti vinon.

0917

Estante ĉe rivero, la Majstro diris: “Pasanto iras kvazaŭ tia, ne ĉesante tagnokte.”

Rim. : Du diversaj opinioj pri la signifo pesimisteca kaj optimisteca. 1) Ĉio pasas kaj ne revenas. [皇侃] 2) Senlima kontinuo kaj senlima renoviĝo. [朱子、程子]

0918

La Majstro diris: “Mi ankoraŭ ne vidis tian virtŝatanton, kiu patosplene amas¹ la virton.”

Rim. 1: 好色 Multaj esploristoj konsideras tiun frazon kiel “ami virinon”.

0919

La Majstro diris: “Samkiel en konstruado de monto, se oni ne aldonus la lastan unu korbeton, ne plenumiĝus la konstruo. Haltigas la plenumon ja mi, kiu haltas. Samkiel en taŭgaranĝo de tereno, se oni fosas unu korbeton da tero, plenumiĝas la afero.

Progresigas mi, kiu iras antaŭen.”

0920

La Majstro diris: “Kiu, aŭdante¹ mian paroladon, neniam enuas, tiu estas ja Hui.”

Rim. 1: Konfuceo instruas gravecon de koncentriĝo por aŭskulti. Hui havas orelojn por aŭskulti senlace.

0921

La Majstro, parolante pri Hui, diris: “Tre bedaŭrinde! Mi vidis lin nur antaŭeniranta, sed ne vidis lin haltanta.¹”

Rim. 1: Esploristoj konsideras la eldiron kiel lamenton pri frua morto de Hui.

0922

La Majstro diris: “Estas iu, plantite, ne floras¹; estas la alia, florinte, ne donas frukton.”

Rim. 1: Ideogramo 秀 havas signifon “eminenta, supera kaj flori”. Eblas traduki alie: “Troviĝas malsuperulo jam en embrio, troviĝas senmaturiĝulo malgraŭ supera kvalito.”

0923

La Majstro diris: “Estas timindaj la postvenontoj. Kiel do oni sciis venontojn malpli altaj ol la nunaj. Sed ne timindaj estas tiuj, pri kiuj ne estas aŭdate jam en jaraĝo de 40-50.”

0924

La Majstro diris: “La vorton en leĝaro, kiun oni jam povas ne obei¹, pli bone estas korekti. La vorton de respekto-ĝentilo, kiun oni ne povas ĝoji, jam malkompliki² estas bone. Mi povas fari nenion al tiuj homoj, kiuj, nur ĝojante, ne malkomplikas kaj, nur obeante, ne korektas.”

Rim. 1: Multaj esploristoj legas la frazon 能無從乎、能無說乎 kiel duobla neado: “Oni ne povas ne obei, oni ne povas ne ĝoji.”

Rim. 2: Ideogramon 繹 mi komprenas kiel “malkompliki”, spite ke multaj esploristoj prenas ĝin por “analizi”.

0925

La Majstro diris: “Tenu lojalecon kaj fidelecon ĉefaj. Ne faru via amiko la malpli altan ol vi. Ne hezitu korekti tuj tiam, kiam vi eraris.”

0926

La Majstro diris: “Eĉ ĉe armeo kun tri divizioj povas esti forrabita la ĉefkomandanto, sed ĉe unu senranga persono ne devus esti forrabota sia strebo.”

0927

La Majstro diris: “Kiu ne hontas je sia ĉifona stupumita vestaĉo, starante kune kun vestiĝinto en fela palto el mustelo, tiu estas ja You.”

Zilu ĉiam recitadis en sia tuta vivo la jenan verson: “Ne envia, nek avida, li ne bezonas rezervi.¹”

La Majstro diris: “Tia estas la vojo. Kiel do povus esti sufiĉe rezervata la vojo²?”

Rim. 1: *Poezio*, la lastaj du versioj en 邶風、雄雉.

Rim. 2: 是道也、何足以臧 Multaj esploristoj opinias la frazon averto al la vivmaniero de Zilu. Por ekzemplo: “Kiel do oni povus atingi prosperon nur per tio ĉi?” [WCf38] Sed, laŭ mi, tia kompreno ne havas persvadpovon, ĉar Zilu recitadis en sia tuta vivo.

0928

La Majstro diris: “En frostega tempo, oni scias pinon kaj tujon postrestantaj kun folio.”

0929

La Majstro diris: “Intelektulo ne perpleksas, bonvolenculo ne maltrankvilas, bravulo ne timas.”

0930

La Majstro diris: “Oni povas kune lerni, sed ne ĉiam povas kune iri laŭ la sama vojo. Eĉ se oni povus kune iri laŭ la sama vojo, ne ĉiam povas kune stari. Eĉ se oni povus kune stari, ne ĉiam povus kune dividi potencon¹ inter si.”

Rim. 1: Esploristoj konsideras ideogramon 權 “urĝa aranĝo laŭokaze”, sed mi tradukis ĝin laŭ ordinara senco. Tia proceso ofte videblis en la historio, aparte en Sovetio.

0931

“Prunfloroj skuiĝas kaj ŝanceliĝas tien kaj reen. Kial mi ne sopiras al vi? Nun ni loĝas fore unu de alia.”¹

La Majstro diris: “Fakte li ankoraŭ ne sincere sopiris. Kioma fora distanco estus?”

Rim. 1: Antikva poemo, nun ne ekzistanta.

10 XIANG DANG

1001

Konfuceo, kreskanta en sia hejmloko, estis modesta, simila al tiu, kiu ne povas paroli. Kiam li servis al Maŭzoleo kaj palaco, li parolis klare kaj flue, sed ĉiam diskrete.

1002

En matena kunveno de kortego li, kun sub-altoficisto, parolis milde, kun altranga oficisto, parolis honeste. Je la ĉeesto de la reĝo li tenis sin humile kaj prudente, en ĉio laŭmodere.

1003

Kiam la princo alvokis lin akcepti alilandajn gastojn, li mienis serioza kaj tenis piedojn streĉitaj, salutis starante, kun manoj kunligitaj, al liaj maldekstro kaj dekstro. La baskoj de robo flirtis antaŭen kaj malantaŭen, li iris kun rapida paŝo, kvazaŭ kun flugiloj. Kiam la gasto retiriĝis, li nepre raportis supren: “La gasto jam foriris sen problemo.”

1004

Li eniris tra la palacan pordon, klininte sian korpon, kvazaŭ permesite. Li staris ne en la mezo de la pordo, transpaŝis sojlon, ne piedopremante ĝin. Kiam li paŝis antaŭ la trono, li mienis serioza kaj iris kun rapida paŝo. Li eldiris vortojn simile al nesufiĉa parolanto. Li supreniris al halo, tenante la baskon de sia robo, klininte korpon. Li retenis spiradon, kvazaŭ ne spirus. Elirante el la halo, ĉe unu ŝtupo li ekmienis liberigita kaj milda. Atinginte malsupron de ŝtuparo, li ekpaŝis kvazaŭ kun flugiloj. Reveninte al sia sidloko, li aspektis humila kaj diskreta.

1005

Tenante la jadan tabuleton, nomatan Gui¹, li klinis sian korpon deca kaj respektplena, kvazaŭ senforta. Leviĝinte, li salutis al supro kun manoj kunligite, kaj malleviĝinte, salutis al subo, kvazaŭ li donacus ion. Li mienis streĉita, kvazaŭ antaŭ la milito.² Li paŝis piedŝove kaj kviete, kvazaŭ obeeme. Dum transdona ceremonio li mienis afabla kaj trankvila. En privata aŭdienco li tenis sin senĝena kaj ĝojmiena.

Rim. 1: Atestilo de la sendito al aliaj landoj.

Rim. 2: 戰

1006

Noblulo ne ornamis borderojn de sia vesto per malhelblua kaj ruĝenigra koloroj. Li ne kolorigis kutiman veston per ruĝ-purpuro. En varma tempo li vestiĝis en sensubŝtofa vesto el puerario, ĉe sia eliro nepre surmetis ĝin kiel supran veston. Sur nigra ŝafida peltaĵo oni metis nigran kotonan veston. Sur blanka cerva peltaĵo oni metis silkan veston. Sur vulpa peltaĵo oni metis flavan veston. Longa estis hejma pelta jako, kun dekstra maniko malpli longa. Dorma litkovrilo nepre estis longa je 1.5 obla ol la korpo. Matraco estis dika el vulpa kaj mela peltoj. Krom funebra tempo oni ornamis sin per diversaj aĵoj. Jupo, ne formala, nepre estis tajlita. Kun nigra ŝafida peltaĵo kaj kun nigra silka ĉapo oni ne iris al funebro por kondolenci. En la unua tago de la monato oni kunsidis en la reĝa palaco, vestinte sin je kortega formalaĵo.

1007

Kiam oni banis sin por fasto, vestiĝis en banrobo el tolaĵo. Dum fastado oni nepre ŝanĝis manĝaĵon, kaj nepre transsidiĝis en alian ĉambron.

1008

Oni ne malŝatis grenon, senbranigitan, nek malŝatis viandon mincan. Oni ne manĝis malbonodoran grenon, nek putran fiŝon kaj viandon. Oni ne manĝis malbonkoloran, nek malbonodoran, nek malbone kuiritan, nek nesezonan, nek malĝuste tranĉitan, nek nespicitan per taŭga saŭco. Malgraŭ multe da viandoj, oni ne allasis troan apetiton al si. Kvankam oni drinkis multe, tamen ne ebriiĝis malmodere. Oni ne prenis aĉetitan sur bazaro vinon kaj viandon. Sen zingibro oni ne manĝis, sed ne aldonis ĝin tro multe¹.

Rim. 1: Estas alia kompreno: “Oni ne manĝas tro multe.”

1009

Ĉe la festo de landestro oni ne konservis la oferitan viandon ĝis la sekva tago. Ĉe la familia festo oni povis manĝi la oferitan viandon dum tri tagoj. Post tri tagoj oni ne manĝis ĝin.

1010

Dum manĝado oni ne babilis. Dum dormado oni ne parolis.

Rim. : Laŭ Ogyu Sorai 荻生徂徠, estus aldonita la kondiĉo: “pri serioza temo”.

1011

Kvankam manĝaĵo konsistis el malfajna rizo, legoma supo kaj melono, tamen oni nepre faris pecon da manĝaĵo oferi al altaro, kiel esprimon de pietato.

1012

Se la mat-seĝo estas malĝuste aranĝita, oni ne sidis sur ĝi.

1013

Kiam samvilaĝanoj kune drinkis vinon, se troviĝis maljunulo kun bastono, tiam nur post lia foriro oni eliris.

1014

Kiam samvilaĝanoj forigis malpurajn spiritojn el siaj domoj, Konfuceo vestis sin en kortega formo, kaj staris sur la orienta perono.¹

Rim. 1: Orienta perono estas alira ŝtuparo al la familia tombo. Estas du versioj de kompreno inter esploristoj: 1) por ke li gardu spiritojn de siaj prapatroj, 2) por ke li respektu la komunan agon de samvilaĝanoj.

Laŭ mia kompreno la teksto montras lian sintenon pri spiritoj. Rilate al spiritoj, li distancigis sin de komuna festo.

1015

Kiam li forsendis sian komisiiton alilanden, li ree kliniĝadis profunde kaj adiaŭis.¹

Rim. 1: Tio estis saluto ne al komisiito, sed al alilandulo.

1016

Ji Kang-zi¹ iam donacis al Konfuceo medikamenton. Konfuceo ricevis ĝin, profunde kliniĝante. Kaj li diris: "Mi ne scias la efikon de la medikamento, do mi ne kuraĝas preni ĝin."

Rim. 1: Jisun Fei, la plej potenca ministro al la princo Ai de Lu-regno. Kang estas lia postmorta nomo.

1017

Kiam ĉevalstalo incendiĝis, la Majstro, reveninte de ofico, diris: “Ĉu iu vundiĝis?” Li ne demandis pri ĉevaloj.

1018

Kiam la princo donacis manĝaĵon¹, Konfuceo nepre ĝustigis tablon kaj seĝon, kaj unue li provis manĝi ĝin. Se la donacita viando estis nekuirita, li nepre boligis ĝin kaj poste oferis antaŭ altaro. Se donacita estis la vivanta, li nepre bredis ĝin.

Kiam Konfuceo servis al la princo je la kunmanĝado, dum la princo faris oferadon, Konfuceo provis unue gustumi manĝaĵon² pli frue ol li.

Rim. 1: Post oferado, la princo disdonis la oferitaĵon al oficistoj.

Rim. 2: Antaŭgustimo por provi pri veneno en manĝaĵo.

1019

Iam Konfuceo malsaniĝis, la princo vizitis lin. Konfuceo, kun kapo turniĝinte orienten, kun korpo kovrite de kortega formo, metis sur ĝi la grandan silkan zonan¹.

Rim. 1: Estis ne dece al Konfuceo renkonti sen formala vestaĵo la princon.

1020

Iam la princo alvokis Konfuceon. La lasta tuj ekiris piede, ne atendinte la jungitan kaleŝon.

1021

Iam Konfuceo eniris en la Grandan Maŭzoleon. Li demandadis pri ĉiuj detaloj de ritaj reguloj.

1022

Kiam lia amiko mortis sen parencoj, klopodantaj pri sepulto. Konfuceo diris: “Mi respondecas pri observado de ĉerko kaj enterigo.”

1023

Escepte de oferita viando¹, Konfuceo ne faris profundan kliniĝon al amikoj por ricevi eĉ ĉaron kaj ĉevalon.

Rim. 1: Konfuceo konsideris riton pli grava. Oferita viando estas plenumado de

decreguloj.

1024

En la lito li ne dormis surdorse tiel, kiel kadavro. Hejme li ne mienis serioze tiel, kiel en ofico.

1025

Kiam li vidis iun ajn homon, vestitan funebre, eĉ malaltklasan¹, li nepre ŝanĝis sian mienon kondolencplena. Kiam li vidis iun ajn surhavantan ceremonian ĉapon aŭ iun ajn blindulon, eĉ al pario² li nepre turnis sin kun kompatema mieno. Li klinsalutis eĉ el sur ĉaro³ al vestiĝinto je sinistra aŭguro kaj ankaŭ al portanta surdorse funebran signifon⁴. Ĉe luksa ceremonia manĝo li nepre ŝanĝis mienon kun respektplena pozo. Ĉe abrupta fulmotondro kaj ventego li nepre ŝanĝis mienon solene.

Rim. 1: 狎 Multaj esploristoj prenis ĝin por la signifo “intima”. Mi provis traduki laŭ signifo “malestimi”.

Rim. 2: 褻 Multaj esploristoj prenis ĝin por la signifo “intima”. Mi provis traduki laŭ signifo “malpura”.

Rim. 3: 式 Saluta kliniĝo kun la manoj sur la transversa stango de ĉaro.

Rim. 4: 版 Multaj esploristoj prenis ĝin por loĝantara registro.

1026

Ĉe enkaleŝiĝo li nepre rektigis sin, kaj prenis la apogan ŝnuron. En la kaleŝo li ne rigardis posten, nek laŭte parolis, nek montris per fingroj.

1027

Fazanoj, eksentante mienon signo, ekmoviĝas supren, flugas kaj poste kolektiĝas. La Majstro diris: “Troviĝas fazaninoj sur monteĝo. Jam estas tempo! Jen estas la tempo!”

Zilu kunsentis¹. Kaj fazanoj, tri fojon flugilbatante², forflugis.”

Rim. 1: 共 Iuj esploristoj prenas tiun por “per kunligitaj manoj”, aliaj por “kuiris fazanoj kaj donis al Konfuceo”. Mi prenas tiun kiel kunsenton al la admiro: “Por ĉio estas la tempo difinita.”

Rim. 2: 嗅 Mi konsideras la ideogramon signifanta ne “flari”, sed “flugilbati”.

11 XIAN JIN

1101

La Majstro diris: “Antaŭirantoj je rit-muziko estas kruduloj¹, postirantoj je rit-muziko estas nobluloj. En praktiko, ni sekvas antaŭirantoj.”

Rim. 1: 野人 Konfuceo ne estimas troan rafinitecon de kulturo. Vd. 0618.

1102

La Majstro diris: “Tiuj, kiuj sekvis min en Chen- kaj Cai-regnoj¹, estis fremdaj al kariero².”

Rim. 1: Konfuceo forlasis Lu-regnon en 497 a. K., vagadis en diversaj landoj dum 13 jaroj, kaj revenis hejmen en 484 a. K. En la fino de migrado, li vizitis Chen kaj Cai, kie li kune kun disĉiploj suferis multe pro malsato.

Rim. 2: 不及門 Iuj esploristoj prenis laŭ Zhu-zi tiun frazon, ke “nun jam neniu estas ĉe mi.”

1103

Je la praktiko de virtoj distingigis Yan Yuan, Min Ziqian, Ran Boniu kaj Zhonggong. Je la lingva kapablo – Zai Wo kaj Zigong. Je la politika afero – Ran You kaj Jilu. Je la literaturo – Ziyou kaj Zixia.

1104

La Majstro diris: “Hui ja estis multe pli ol helpanto al mi. Je mia ĉiu ajn eldiro¹ li ne povis ne ĝoji.”

Rim. 1: Ni povas vidi ĉi tie kialon de amo al Hui. Li estis unu el la plej bonaj aŭskultantoj. *Analektoj* estas la kolekto de eldiroj, kiujn aŭskultantoj eltiris el buŝo de Konfuceo.

1105

La Majstro diris: “Fidela filo ja estas Min Ziqian! Oni ne dubas¹ ĉion, kion liaj gepatroj kaj fratoj diris pri li.”

Rim. 1: 聞 breĉo

1106

Nan Rong ofte recitadis versojn de *Poezio*, nomatajn Bai Gui¹. Konfuceo edzigis lin al la filino de sia pliĝa frato.

Rim. 1: 白圭, 抑, 大雅

Makulon sur blanka jado eblas forpoluri,
Eraron je parolado ne eblas.

1107

Ji Kang-zi¹ demandis: “Kiu el viaj disĉiploj ŝatas lernadi?”

Konfuceo respondis: “Estis Yan Hui, kiu ŝatis lernadi². Malfeliĉe li mallonge vivis kaj mortis. Nun neniu.”

Rim. 1: Ĉefministro de Lu-regno, Jisun Fei.

Rim. 2: 好学 – tiu vorto havas apartan signifon por Konfuceo. Estas personoj, strebantaj al lernado 志学, sed estas tre rara la persono, kiu vere ŝatas lernadi.

1108

Kiam Yan Yuan mortis, lia patro, Yan Lu¹ petis la Majstron aĉeti eksteran ĉerkon kontraŭ la kaleŝo de Konfuceo. La Majstro diris: “Ĉiu patro rigardas sian filon plej kara, ĉu talenta aŭ ne. Kiam mortis mia filo, Li², estis farita nur interna ĉerko, sen ekstera. Mi ne povas piediri pro ekstera ĉerko kontraŭ kaleŝo, ĉar al mi, kiel eksa granda oficisto, ne decus iri piede.³”

Rim. 1: Ankaŭ li estis unu el disĉiploj de Konfuceo.

Rim. 2: Kong Li, adoptiĝa nomo – Bo Yu, mortis en sia kvindeka jaro, kiam Konfuceo estis en la aĝo de sepdek jaroj. Iuj esploristoj dubas, ke Yan Yuan mortis pli frue ol Kong Li.

Rim. 3: Konfuceanoj ĝenerale konsideris, ke funebro devas esti laŭeble luksa. Montriĝas, ke Konfuceo mem ne insistas la luksan, sed laŭeble kaj laŭ dereguloj.

1109

Mortis Yan Yuan. La Majstro diris: “Ho ve! La Ĉielo pereigis min! La Ĉielo pereigis min!”

1110

Yan Yuan mortis. La Majstro ploregis kaj tordiĝis. Iu el sekvantoj diris: “Vi tro tordiĝas.”

La Majstro diris: “Ĉu troas mia tordiĝo? Se ne lamentus pro tiu persono, pri kiu do lamenti?”

1111

Yan Yuan mortis. Disĉiploj kaj lernantoj volis okazigi luksan sepulton¹.

La Majstro diris: “Ne devas.”

Sed ili pompe sepultis.

La Majstro diris: “Hui rigardis min kiel sian patron. Sed mi ne povas nun trakti lin kiel mian filon. Tia luksa sepulto ne estas laŭ mi, sed laŭ du-tri kunlernantoj.”

Rim. 1: Luksa funebro estas unu el distingaĵoj de konfuceanismo. Kaj tio fariĝis unu el la gravaj disputpunktoj inter mohistoj kaj konfuceanoj. Sed Konfuceo mem iam tenis sin eĉ kontraŭ al luksa sepulto. Al luksa funebro alteniĝis lernantoj de Konfuceo pli ol Konfuceo mem.

1112

Jilu¹ demandis pri la servado al Spiritoj kaj Dioj. La Majstro diris: “Ankoraŭ ne povante servi al homoj, kiel oni povus servi al Spiritoj? Jilu aŭdacis plu demandi pri morto. La Majstro diris: “Ankoraŭ ne sciante pri vivo, kiel oni povus scii pri morto?”²”

Rim. 1: Zilu, Zhongyou, disĉiplo de Konfuceo. Li estis fama je sia braveco.

Rim. 2: Konfuceo insistas, ke oni unue serioze traktu kogneblon antaŭ ol nekogneblon. Sed ĉirkaŭ la respondo de Konfuceo disiĝis kompreno de posteuloj pri filosofio de Konfuceo kaj konfuceanismo: 1) agnostikismo, 2) ateismo, 3) aprobo al ekzisto de Spiritoj. Mozi konsideris esencon de konfuceanismo kiel ignoron de Spiritoj.

1113

Ĉe Konfuceo sidis disĉiploj. Mi Ziqian sidis milda, Zilu – firma, Ran You kaj Zigong – gajaj. La Majstro ĝojas kaj diris: “Homon, kiel You¹, ne atendas natura morto.”

Rim. 1: t. e. Zilu. Li poste estos mortigita dum interna tumulto en Wei-regno.

1114

En Lu-regno estas konstruita la nova trezorejo, nomata Changfu¹. Min Ziqian diris: “Pli bone estus restigi la malnovan. Kial do necesas nove konstrui?”

La Majstro diris: “Li ne estas parolema, sed, se li ekparolas, la eldiro trafas ĝuste.”

Rim. 1: 長府. Multaj esploristoj konsideras ĝin trezorejo. Sed iuj rilatigis ĝin al lokonomo de la aparta palaco, kie la Princo Zhao de Lu-regno kontraŭis al la tiama potenca intendanto Ji.

1115

La Majstro diris: “Kiel do You fuŝludas la liron¹, estante unu el miaj disĉiploj.” La aliaj disĉiploj ne respektis ludon de Zilu. La Majstro diris: “Ludo de You, kvankam eniris en la halo, tamen ankoraŭ ne atingis la internan ĉambron.”²

Rim. 1: Se 瑟 liro kun 23, 25, aŭ 27 kordoj. Muziko estas nepre necesa arto por disĉiploj de Konfuceo. Mohistoj, kontraŭe, ne taksis muzikon.

Rim. 2: 升堂入室 esprimo de atingita grado.

1116

Zigong demandis: ‘Kiu estas pli saĝa, Shi¹ aŭ Shang²?’

La Majstro respondis: “Shi troas, kaj Shang ne sufiĉas.”

Zigong diris: “Do, Shi superas.”

La Majstro diris: “Troeco estas same malbona, kiel nesufiĉo.”³

Rim. 1: Zhuansun Shi, Zizhang, disĉiplo de Konfuceo.

Rim. 2: Zixia, t. e. Bu Shang, disĉiplo de Konfuceo.

Rim. 3: Estas unu ĝusta meza punkto, nomata “Ĝusta Mezo”中庸.

1117

Ji-familio¹ estis pli riĉa ol la duko de Zhou. Tamen Qiu² kolektis por ĝi pli da impostoj kaj aldone profitigis ĝin.

La Majstro diris: “Li ne estas jam mia lernanto, do vi povas ataki lin per tamburado.”

Rim. 1: 季孫氏 Unu el tri grandaj intendantoj en Lu-regno. Ĝi estis unu el efektivaj regantoj en Lu-regno.

Rim. 2: Ran Qiu, disĉiplo de Konfuceo.

1118

Chai¹ estas stulta; Shen² estas obtuza; Shi³ estas bizara; You⁴ estas kruda.

Rim. 1: Gao Chai, Zigao. Li fariĝis provinc-estro de Fei, estis pli juna ol Konfuceo je 30 jaroj.

Rim. 2: Zeng Shen, kompilinto de *Sutro de Fila Pietato* 孝經

Rim. 3: Zhuansun Shi, Zizhang.

Rim. 4: Zhong You, Zilu, Jilu.

1119

La Majstro diris: “Hui¹ estas ja simpla. Li ofte malriĉiĝis². Ci³ ne submetiĝis al la ordono⁴ kaj gajnis monon. Lia spekulado ofte estis trafa.”

Rim. 1: Yan Yuan.

Rim. 2: 空 Iu esploristo, He An 何晏, komprenas tiun filozofia koncepto de “vanteo”.

Rim. 3: Duanmu Ci, Zigong. Laŭ *Shiji* de Sima Qian, li fariĝis plej riĉa el disĉiploj.

Rim. 4: Oni konsideras ĝin la ordono de la Ĉielo.

1120

Zizhang demandis, kio estas la vojo de bona homo. La Majstro diris: “Li ne postsekvas alies piedsignojn, nek eniras en la ĉambron.”¹

Rim. 1: Estas malfacile kompreni la signifon 不入於室. Multaj esploristoj komprenas tion signifanta: “ne povas atingi altecon.” Tiel do ilia traduko estas jena: “Tiu, kiu ne sekvas la paŝosignojn de aliaj, ne povas eniri en la ĉambron de la virto kaj saĝo.” [WCf. 47] Tia kompreno estas laŭ 孔宏森.

Mi konjektas, ke tio estas “ne eniri en komfortan ĉambron” t. e. “ne serĉi komforte vivi en sinflata kontenteco”. Ĉiuj disĉiploj, menciitaj supre, havas sian difekton. Sed en la difekto kuŝas avantaĝo kaj specialaĵo. Mi konsentas kun ĉefaj esploristoj, prenintaj 不踐迹 kiel aprobon de kreiva penso. Ĝi estas instruo tre grava, por ke oni mem trovu sian propran vojon. Konfuceo diris: “Transdonas diritan kaj ne kreas.” 述而不作 Tio estas dirita, koncernante literaturon. Sed rilate al la vivo, li postulas kreivan vojon.

1121

La Majstro diris: “Eble altiras atenton sincera oratoro. Sed ĉu li estas noblulo, aŭ li mienas nur tia?”

1122

Zilu demandis: “Ĉu mi devas fari juston, kiun ĝus aŭskultis?”

La Majstro diris: “Dum vivas patro kaj pliaĝaj fratoj, konsiliĝu kun ili antaŭ ol fari tion, kion aŭskultis.”

Ran You demandis: “Ĉu mi devas fari juston, kiun ĝus aŭskultis?”

La Majstro diris: “Jes, faru tion, kion vi aŭskultis.”

Gongxi Hua diris al la Majstro: “Al la demando de You – ‘Ĉu mi devas fari juston, kiun ĝus aŭskultis?’ – vi respondis – ‘Dum vivas patro kaj pliaĝaj fratoj, konsiliĝu kun ili.’, Sed al la demando de Qiu, vi respondis – ‘Faru tion, kion aŭskultis.’ Mi konfuziĝis, do aŭdacas plu demandi vin.”

La Majstro diris: “Qiu estas hezitema, do mi instigis lin; You estas homo de universala amo¹, do mi retenis lin.”

Rim. 1: 兼人 Poste mohistoj respektis la terminon.

1123

La Majstro spertis minacon en la loko de Kuang¹. Yan Yuan poste alvenis malfrue.

La Majstro diris: “Mi suspektis, ke vi jam mortis.”

Yan Yuan diris: “Dum vi estas viva, mi, Hui, ne aŭdacas morti.”

Rim. 1: 匡 Lokonomo en Song-regno. Kiam Konfuceo kun disĉiploj vojaĝis de Wei-regno al Chen-regno, en Kuang ili estis retenitaj kvin tagojn pro tio, ke oni prenis Konfuceon por Yang Hu, prirabinta tie loĝantojn.

1124

Ji Ziran¹ demandis: “Ĉu Zhong You kaj Ran Qiu povas esti ministroj?”

La Majstro diris: “Mi supozis, ke vi demandus pri la aliaj. Sed vi demandis pri You kaj Qiu. Taŭgas por ministroj tiuj, kiuj sekvas sian estron per ĝusta vojo, kaj retiriĝas tuj, se tio ne eblas. Nun You kaj Qiu estas ordinaraj oficistoj.

Ji Ziran diris: “Ĉu tio signifas, ke ili estas nur obeemaj?”

La Majstro diris: “Se je atenco de patro aŭ suvereno, eĉ ili ne sekvos.”

Rim. 1: 季子然 Familiano de Ji-familio, unu el efektivaj regantoj en Lu-regno.

1125

Zilu enoficigis Zigao¹-n kiel prefekton de Bi.

La Majstro diris: “Tio malutilas al via junulo.”

Zilu diris: “Tie estas ja popolanoj kaj oficistoj, tie estas ja la altaro de la dioj de la tero kaj greno². Lernado efektiviĝas ne nur per la legado de libroj.”

La Majstro diris: “Jen kial al mi ne plaĉas ĉikanemuloj.”

Rim. 1: Gao Chai, adoptiĝa nomo estas Zigao. Zilu estas pli juna ol Konfuceo je 9 jaroj, Zigao estas je 30 jaroj. Bi 費 estis la teritorio, posedata de Ji-familio. Ĝi situis oriente de Zaozhuang.

Rim. 2: 社稷

1126

Zilu, Zeng Xi, Ran You kaj Gongxi Hua sidis kun la Majstro. La Majstro diris: “Mi iomete pli aĝa ol vi, sed vi ne atentu tion. Vi ofte diradis – ‘Mi ne estas ŝatata.’ – Se vi estus ŝatata, kion do vi volus fari?”

Zilu respondis al li rekte: “Se iu regno kun mil militĉaroj inter potencaj regnoj pro oftaj militiroj suferus malsategon, mi, You, faros jene. En tri jaroj mi faros la popolon kuraĝa kaj disciplinema.”

La Majstro ekridis, kaj demandis al Ran You sekve: “Kaj vi, Qiu, kiel?”

Li respondis: “Se landon kun kvindek-sepdek aŭ sesdek-sepdek kvadrataj *li*oj mi regos, tri jarojn poste la popolo estos sata kaj kontenta je vivo materie. Rilate al decreguloj kaj muziko oni atendas kompetantajn noblulojn.”

La Majstro diris al Gongxi Hua: “Kaj kiel vi, Chi?”

Li respondis: “Mi ne pretendas, ke mi havus kapablon. Mi dezirus lernadi. Je la aferoj de maŭzoleo kaj je kunvenoj mi vestos sin en ceremonia vestaĵo kaj ĉapo, volus fariĝi iu adjunkteto.”

La Majstro diris al Zeng Xi: “Kaj vi, Dian?”

Li, ludanta mallaŭte liron, ĉesis ludi kaj, forlasinte muzikilon, stariĝis kaj respondis: “Mi opinias diferente de tri antaŭaj.”

La Majstro diris: “Ne gravas. Diru kion ajn, ĉar ĉiu diris sian strebon laŭplaĉe.”

Li diris: “Mi volas vivi tiel, ke en profunda printempo mi vestiĝu en printempa vestaĵo, kaj kune kun kelkaj junuloj kaj ses-sep knaboj baniĝu en la rivero Yi, kaj en agrabla venteto ĉe Pluv-altaro, kantante, iru hejmen.”

La Majstro sentoplene suspiris, dirante: “Mi vivus kune kun vi, Dian.”

Tri lernantoj eliris kaj restis Zeng Xi. La lasta demandis: “Kiel vi opinias pri eldiroj de tri personoj?”

La Majstro diris: “Ĉiu el ili esprimis sian strebon.”

Zeng Xi demandis: “Kial vi ridis je You?”

La Majstro diris: “Regno estas regata per deĉreguloj. Lia eldiro ne tuŝis tion. Tial mi ridis. Ĉu tio, pri kio Qiu diris, ne estas ŝtato? La teritorio kun sesdek-sepdek aŭ kvindek-sesdek kvadrataj *li*oj, ne povas esti rigardata kiel ŝtato? Ankaŭ tio, kion Chi menciis, ĉu ne estas ŝtato? Ĉu maŭzoleo kaj kunveno ne estus signo de la ekzisto de landestro? Chi volus fariĝi malgranda agjunkto. Kiu do tiam povas fariĝi granda tie?”

12 YAN YUAN

1201

Yan Yuan demandis pri bonvoleco.

La Majstro diris: “Bonvoleco estas konkeri sin mem kaj reveni al decreguloj¹. Se ĉiu, vekiginte iun tagon, konkerus sin mem kaj revenus al decreguloj, tiam la tuta mondo pleniĝus je bonvoleco. Efektivigo de bonvoleco dependas de ‘Mi-mem’, sed ne de iu alia.”

Yan Yuan demandis, dirante: “Bonvolu klarigi, kio necesas por tio?”

La Majstro diris: “Ĉion ajn, kio ne konformas al decreguloj, ne rigardu, nek aŭskultu, nek elparolu, nek faru.”

Yan Yuan diris: “Kvankam mi ne estas sprita, tamen mi tenos vian vorton firme, kiel mian taskon.”

Rim. 1: 克己復禮 estas jam fama proverbo.

1202

Zhonggong¹ demandis pro bonvoleco.

La Majstro diris: “Kiam vi iru eksteren el via pordo, konduku same, kiel vi akceptus la grandan gaston; kiam vi movas popolon, faru same, kiel entreprenus la grandan oferadofeston. Ne faru al aliuloj tion, kion vi ne volus fari al vi mem. Ne restigu venĝemon en la lando, nek restigu venĝemon en la familio.”

Zhonggong diris: “Mi, You, estas ne sprita, tamen tenos vian vorton firme, kiel mian taskon.”

Rim. 1: Rang Yong, malgraŭ ke lia patro estis plebano, li estis alte taksata de Konfuceo, ke li havas kapablon okupi gravan postenon.

1203

Sima Niu¹ demandis pri bonvoleco.

La Majstro diris: “La homo de bonvoleco estas diskreta je la parolado.”

Sima Niu diris: “Ĉu kies parolado estas diskreta, tiu estas homo de bonvoleco?”

La Majstro diris: “Fari ion estas malfacile, do oni ne devas ne esti diskreta je eldiro.”

Rim. 1: Sima Geng, disĉiplo de Konfuceo. Li estis parolema. Do Konfuceo menciis pri lia difekto.

1204

Sima Niu demandis pri noblulo.

La Majstro diris: La noblulo ne ĉagreniĝas, nek timas.”

Sima Niu diris: “Ĉu vi nomas noblulo tiun, kiu ne ĉagreniĝas, nek timas?”

La Majstro diris: “Se havante nenian rimorson ĉe sia introspekto, li havas nenian ĉagrenon, nek timon.”.

1205

Sima Niu, ĉagrenite, diris: “Ĉiuj havas fratojn, sed mi estas sola sen frato¹.”

Zixia diris: “Mi, Shang², aŭdis jenon – ‘Morto kaj vivo estas fatalo, riĉo kaj rango estas dispono de la Ĉielo.’ – Noblulo, respektinda, nenion perdas. Se li ĝentile interrilitas kun homoj kaj sekvas decregulojn, ĉiuj en la mondo estas fratoj. Kial noblulo ĉagreniĝus sen sia samsanga frato?”

Rim. 1: Laŭ ĝenerala opinio, Ŝima Niu havas fraton, nomatan Huan Tui, kiu, estante granda oficisto en Song-regno, provis atenci la reĝon en 481 a. K. Venkite, li foriris eksterlanden. Li atakis ankaŭ 60-jaran Konfuceon (vid. 0722.)

Rim. 2: Bu Shang. Zi Xia estas adoltiĝa nomo.

1206

Zizhang demandis pri klarvido.

La Majstro diris: “Kiu ne ricevas en sia konduto influon de kalumnio trapenetranta, nek denunco infiltranta¹, tiu povas esti nomata ‘klarvida’. Kiu ne ricevas en sia konduto influon de kalumnio trapenetranta, nek denunco infiltranta, tiu povas esti nomata ‘malproksimvida’.”

Rim. 1: 浸潤之譖、膚受之愬 Kalumnio penetras iom post iom en la menson, kaj denunco infiltras tra haŭto, damaĝas homojn, aparte gvidantojn.

1207

Zigong demandis pri regado-politiko.

La Majstro diris: “Necesas jen tio, ke sufiĉu manĝaĵo, sufiĉu armeo, estu popola fido.”

Zigong demandis: “Se oni nepre devus redukti unu el ili, kiun do antaŭ ĉio?”

La Majstro respondis: “Reduktu armeon.”

Zigong demandis: “Se oni nepre devus redukti unu el du restintaj, kiun?”

La Majstro respondis: “Reduktu manĝaĵon. De antikva tempo por ĉiuj neeviteblas la

morto. Sed se la popolo ne fidas, nenio povas stariĝi.”

1208

Ji Zicheng¹ diris: Al kondiĉo de noblulo sufiĉas nur kvalito². Por kio do li bezonas literaturon³?”

Zigong diris: “Domaĝe! Koncernante noblulon, vi fuŝkonkludas tro rapide, ke eĉ kvarĉevaloj ne povus postkuri vian langon. Ankaŭ literaturo estas kvalito, kaj ankaŭ kvalito estas literaturo. Senharigite, led⁴ el tigo kaj leopardo egalas al led⁴ el hundo kaj ŝafo.”

Rim. 1: Granda oficisto de Wei-regno.

Rim. 2: 質 Mi konsideras ĝin kiel deveno. Wang Chengfang tradukis ĝin per “esenco”.

Rim. 3: 文 Klereco, literaturo kaj kulturo. Wang Chengfang uzas vorton “ornamaĵo”.

Rim. 4: 韃 Senharigita led.

1209

La princo Ai¹ demandis You Ruo²: “En nuna malsatiga jaro mankas la financo. Kion fari?”

You Ruo respondis: “Kial ne draste realigus dekonan imposton?”

La princo diris: “Eĉ la du-dekona imposto ne sufiĉas al ni. Kiel eblus apliki la dekonan imposton?”

You Ruo diris: “Se al popolanoj sufiĉus la vivrimedo, kiel do al vi mankas? Se al popolanoj mankas, kiel do al vi eblus sufiĉi?”

Rim. 1: La suvereno de Lu-regno (494-466 a. K.)

Rim. 2: Disĉiplo de Konfuceo. Unu el kompilintoj de Analektoj.

1210

Zigong demandis pri altigo de virto kaj pri distingo de delogiĝo.

La Majstro diris: “Antaŭ ĉio estu fidela je kredo kaj transiru al justo. En tio kuŝas altigo de la virto. Amante iun, oni deziras ties longvivon; malamante iun, oni deziras ties morton. Kaj la deziro de la vivo, kaj la deziro de la morto estas delogiĝo. Fideleco ne dependas de riĉo. Riĉeco diferencas en landaj sanktejoj.¹”

Rim. 1: 誠不以富、亦祇以異 estas frazoj en *Poezio*, Xiaoya. Esploristoj konsideras tiujn frazojn erare enmetitaj.

1211

La princo Jing de Qi-regno¹ demandis Konfuceon pri regado-politiko.

Konfuceo respondis: “Kondutu la reĝo, kiel reĝo, la ministro kiel ministro, la patro kiel patro, la filo kiel filo.”

La princo diris: “Bonege! Se estus certe, ke kondutus la reĝo ne tiel, kiel reĝo, la ministro ne tiel, kiel ministro, la patro ne tiel, kiel patro, la filo ne tiel, kiel filo, tiuokaze mi ne povus manĝi, eĉ se abundus nutraĵo.”

Rim. 1: Surtrone 547-490 a. K. Iuj konjektis, ke interparolo okazis en 516 a. K., kiam Konfuceo estis ĉe Gao Zhao-zi, potenca subulo de Qi-regno. Sed ankaŭ eblus renkontiĝi, kiam Konfuceo estis ministro en Lu-regno. La princo Jing dezirus enfeŭdigi Konfuceon, sed tio ne efektiviĝis pro kontraŭo de Yan Ying.

1212

La Majstro diris: “Kiu povas juĝi en proceso, aŭdante pecojn da vortoj, tiu estas ja You¹. Zilu neniam prokrastas la plenumon de promeso.”

Rim. 1: Zhong You, disĉiplo de Konfuceo. Adoltiĝaj nomoj estas Zilu kaj Jilu.

1213

La Majstro diris: “Koncerne al juĝo en proceso, mi estas sama, kiel la aliaj. Mi tamen nepre preferas, ke oni ne okazigu ion procesendan.”

1214

Zigong demandis pri regado-politiko.

La Majstro diris: “Ne laciĝu en laboro sur posteno kaj estu fidela en la ago.”

1215

La Majstro diris: “Vaste lernu literaturon, interrilatu laŭ decreguloj, kaj tiel eblas ne devojiĝi.”

Rim. : Frazo estas sama, kiel en 0627.

1216

La Majstro diris: “La noblulo faras homojn belaj, ne faras ilin malbelaj. Male, la

malgrandulo faras la kontraŭon.”

1217

Ji Kang-zi¹ demandis Konfuceon pri la politiko de regado.

Konfuceo respondis: “Politiko devas esti ĝusta. Se vi gvidas ĝuste, kiu aŭdacus esti malĝusta?”

Rim. 1: Ĉefministro de Lu-regno.

1218

Ji Kang-zi, suferante pro multiĝo de ŝtelistoj, demandis Konfuceon.

Konfuceo respondis: “Se vi, reganto, vere ne dezirus tion¹, oni ne ŝtelus, eĉ se estus laŭdate ŝteli.”

Rim. 1: La frazon 苟子之不欲 multaj esploristoj komprenas alie: “vere ne estas avara”.

Ekz. “Se vi povus bridi vian avidecon, ili ne ŝtelus...”

1219

Ji Kang-zi demandis Konfuceon pri la politiko de regado, dirante: “Esfektivigi virton per mortigo de malvirtuloj – kia vi opinias tion?”

Konfuceo respondis: “Je via politiko, kia efiko estus pere de mortigo? Se vi dezirus bonon, la popolo iĝus bona. Virto de noblulo estas kvazaŭ vento, kaj virto de malgranduloj estas kvazaŭ herbo. La herbo skuigas laŭ direkto de la vento, kien la vento, tien kliniĝas la herbo.¹”

Rim. 1: Ideo de Konfuceo, esprimata en la teksto, similas al *Mozi*, en akorodiĝo 尚同.

1220

Zigong demandis: “Kia persono devas esti nomata atinginto?”

La Majstro diris: “Laŭ via opinio, kiu do estas la atinginto?¹”

Zizhang respondis: “Tio estas tiu, pri kies nomo nepre aŭdis samlandanoj kaj nepre aŭdis samfamilianoj.”

La Majstro diris: “Tiu estas ja famulo, sed ne atinginto. Kiu atingis veron, tiu estas honesta kaj ŝatas justecon. Tiu, komprenante vorton, observas la konkretaĵon. Tiu prudente tenas sin humila al la aliaj homoj. Li nepre atingas veron kaj en sia lando, kaj en sia hejmo.

Fama² povas esti tiu, kiu miskonduktas, prenante konkretaĵon³ por bonvoleco. Estante tia, li ne dubas pri si mem. Tia homo nepre havigas al si famon kaj en sia lando kaj en sia hejmo.”

Rim. 1: 達者 Tiu, kiu atingis altan nivelon.

Rim. 2: 聞也者 fama persono

Rim. 3: 色 mieno, aperaĵo, konkreta fenomeno.

1221

Sekvante la Majstron dum promenado sub la Pluvpeta Altaro, Fangchi diris: “Mi aŭdacas demandi vin, kio estas altigo de virto, konkero de amasiĝinta enviaĉo kaj konkero de ŝanceliĝo.”

La Majstro diris: “Bona demando. Unue antaŭ ĉio faru aferon, poste rezulto estos akirita, ĉu en tio ne kuŝas altigo de virto? Ataku sin je sia malbono, sed ne ataku aliajn je ilia malbono, - ĉu jen en tio ne kuŝas konkero de enviaĉo? Pro momenta ekkolerego forgesi sin mem kaj gepatrojn, - ĉu en tio ne kuŝas ŝanceliĝo?”

1222

Fangchi demandis pri bonvoleco.

Majstro diris: “Tio estas ami homojn.”

Fangchi plue demandis pri scio.

Majstro diris: “Tio estas scii homojn.”

Fangchi ankoraŭ ne atingis komprenon.

Majstro diris: “Prezenti rektulon al tordiĝulo. Tiel do tordiĝulo iĝas rekta.”

Fangchi retiriĝis kaj, vidante Zixia, diris: “Mi renkontis la Majstron kaj demandis, kio estas scio. Majstro respondis, ke prezentu rektulon al tordiĝulo. Kion do signifas tiu eldiro?”

Zixia diris: “Kiel riĉa estas la eldiro! Kiam regas la mondon Shun, li elektis Hao Yao kaj promociis lin. Tiel do malbonvolecoj foriris. Kiam Tang regis la mondon, li elektis el inter popolo Yin, kaj promociis lin. Tiel do malbonvolecoj foriris.”

Rim. : 尚賢、尚同 estas slogano de Mozi. Tamen ankaŭ Konfuceo havas la saman ideon. Li opinias, ke bonvoleco estas amo al homoj. 仁=愛人 Ren estas Airen. En tio estas komuneco de ideoj inter Mozi kaj Konfuceo.

1223

Zigong demandis pri amikeco.

La Majstro diris: “Amiko estas tiu, kiu, donante konsilon, kondukas vin al la bona vojo. Se tio ne eblus, li ĉesas konsili, por ke ne hontigu sin mem.”

1224

Zeng-zi diris: “Nobluloj amikiĝas per literaturo, kaj asistas per la amikeco efektivigon de bonvoleco.”

13 ZILU

1301

Zilu demandis pri politiko.

La Majstro diris: “Unue estu iniciatema kaj rekompencu por la laboro¹.”

Zilu petis plue klarigi.

La Majstro diris: “Ne laciĝu.”

Rim. 1: 劳 havas plurajn signifojn: labori, rekompenci. Do iuj esploristoj komprenas la frazon 先之劳之 tute alie. Wang Chongfang tradukis jene: “Donu virtan ekzemplon por la popolo kaj poste diligentigi.”[109]

1302

Zhonggong fariĝis intendanto en la lando de Ji-familio kaj demandis pri administrado.

La Majstro diris: “Unue laborigu oficistojn, kaj indulgu malgrandan mison. Promociu saĝulojn kaj kapablulojn.”

Zhonggong demandis: “Kiel distingi saĝulojn kaj kapablulojn por promocii ilin?”

La Majstro diris: “Promociu tiun, kiun vi jam scias saĝa kaj kapabla. Koncernante tiun, kiun vi ne scias, ĉu aliuloj neglektus lin?”

1303

Zilu diris: “Se la princo de Wei-regno¹ atendus vin, ke vi okupiĝu je administrado, kion vi antaŭ ĉio unue ekfaros?”

La Majstro diris: “Mi nepre ĝustigos nomojn².”

Zilu diris: “Ĉu vere? Via vojo estas ĉirkaŭira, kial do ĝustigi nomojn?”

La Majstro diris: “Kiel obskuranta vi estas, You-ĉjo! Noblulo ja deteniĝas de eldiro pri tio, kion li ne scias. Se la nomoj ne estas ĝustaj, la vortoj eldiritaj ne estas firmaj. Se la vortoj ne firmaj, la afero ne efektiviĝos. Se la afero ne efektiviĝos, la decreguloj kaj muziko ne prosperos. Se la decreguloj kaj muziko ne prosperos, la punado ne trafos. Se la punado ne trafos, la popolo ne povus kondukti, kien meti manojn kaj piedojn. Tial do noblulo, se li trovis la ĝustan nomon, li devas eldiri tion. Kion li eldiris, li devas nepre efektivigi tion. Jen tiel noblulo devas pensi sincere je sia parolado.”

Rim. 1: La princo Kuai Zhe. Li estis nepo de la princo Ling kaj filo de Kuai Kui. Kuai Kui, ofendinte Nanzi, la edzinon de la princo Ling, forkuris en Jin-regnon, tial, post la morto de la princo Ling, Kuai Zhe estis surtronigita. La batalo inter Kuai Zhe kaj lia

patro Kuai Kui pro la trono prezentis grandan sensacion en tiu tempo ĉirkaŭ la temo de “Fila pietato”孝

Rim. 2: 名 Iu prenas la ideogramon por protokolo. Alia prenas ĝin por morala ordo 名分. La tria prenas por literoj 書字.

1304

Fangchi petis la Majstron instrui al li pri grajno-terkulturado.

La Majstro diris: “Pri tio mi scias malpli ol sperta grajnkulturisto.”

Fangchi petis lin instrui pri legomo-kulturado.

La Majstro diris: “Pri tio mi scias malpli ol sperta legom-kulturisto.”

Fangchi retiriĝis.

La Majstro diris: “Kia etulo tiu Fangxu¹ estas! Se la supro ŝatas decregulojn, la popolo ne aŭdacas ne respekti ilin. Se la supro ŝatas juston, la popolo ne aŭdacas ne sekvi ĝin.” Se la supro ŝatas fidon, la popolo ne aŭdacas ne honesti. Se tiel, la popolo en la mondo alvenos el kvar direktoj kun infanetoj surdorse portante. Kial do li mem devas okupiĝi je aglokulturo?”

Rim. 1: T. e. Fangchi. Lia adoltiĝa nomo estis Zichi, tial li estas nomata ankaŭ Fangchi.

1305

La Majstro diris: “Trovegas homoj, kiuj povas reciti 300 poemojn¹, postenigite en administrado, ne povas labori; sendite alilanden kun komisiono, ne povas plenumi la taskon. Kion fari al ili kun multe da scio?”

Rim. 1: 詩經 Poezio.

1306

La Majstro diris: “Se rekta estas la reganto mem, lia volo estos plenumita sen ordono; se li ne estas rekta, eĉ se li ordonus, ne estas aŭdite.”

1307

La majstro diris: “En la regado ambaŭ regnoj Lu kaj Wei estas fratoj¹.”

Rim. 1: Lu-regno estis regata de posteuloj de Zhougong Dan, kaj Wei-regno – de posteuloj de lia frato, Kang Shu.

1308

Koncernante s-ron Jing¹, la filon de la princo de Wei-regno, la Majstro taksis jene: “Nun li bone sidas hejme, sed en la komenco, estis dirite, ke li libervole adultiĝis². Kiam lia havaĵo iomete multiĝis, estas dirite, ke li tenis sin iel-tiel komplete. Kaj poste estas dirite, ke li, riĉiĝinte, iel-tiel beligis sin.”

Rim. 1: Filo de la princo Xian de Wei-regno.

Rim. 2: 苟合 Mi tradukis la frazon laŭ signifo en ordinaraj vortaroj, konsiderante la sekvan tekston rilatanta al tiu ĉi. Multaj esploristoj prenis la tekston por laŭdado de ekonomia politiko far de Jing: “Li bone scias la familian ekonomion. Kiam li komencis havi posedaĵon, li diris: ‘Ha! preskaŭ sufiĉe!’”[WCf58]

1309

La Majstro veturis al Wei-regno, kaj Ran You sekvis lin, kondukante kaleŝon.

La Majstro diris: “Multe da homoj!”

Ran You diris: “Vere, multe da homoj! Kion do aldoni al tio?”

La Majstro diris: “Riĉon. Riĉigi ilin.”

Ran You diris: “Se ili jam estos riĉaj. Kion do aldoni plu?”

La Majstro diris: “Eduki ilin.”

1310

La Majstro diris: “Se estus tiu, kiu dungos min, mi povus fari iun aferon dum dek du monatoj, kaj en tri jaroj la afero efektiviĝos.”

1311

La Majstro diris: “Estas dirite, ke se iu bona homo regus la landon dum cent jaroj, povus konkeri brutalaĵojn kaj forigi mortpunon. Pravas ja la vorto.”

1312

La Majstro diris: “Se aperus la reĝo, post unu generacio la mondo nepre pleniĝus de bonvoleco.”

1313

La Majstro diris: “Se iu povus iel-tiel rektigi sin mem, ĉu estus io malfacila al li okupiĝi pri regado? Se li ne povus rektigi eĉ sin mem, kiel do al li eblus rektigi aliajn?”

1314

Ran-zi¹ revenis de ofica kunveno².

La Majstro diris: “Kial vi revenis tiel malfrue?”

Ran-zi respondis: “Mi okupiĝis pri administrado de ŝtataferoj.”

La Majstro diris: “Vi okupiĝis nur je aferetoj. Se temas pri ŝtataferoj, kvankam mi ne servas nun, tamen ankaŭ mi almenaŭ aŭdus pri ili.”

Rim. 1: Ran You, t. e. Ran Qiu. Adoltiĝa nomo – Ziyou.

Rim. 2: 朝 Estas du diversaj opinioj pri la kunveno. Unu konsideras ĝin kortega kunveno de Lu-regno, la alia laŭ Zhu-zi – kunveno de Ji-familio. Laŭ la lasta opinio, Konfuceo kritikis la misuzon de la vorto 朝 kaj la regadon far de Ji-familio.

1315

La princo Ding¹ demandis: “Ĉu estas unu vorto, per kiu eblas prosperigi la ŝtaton?”

Konfuceo respondis: “Per unu vorto ne eblas atingebla tia rezulto. Sed estas popoldiro – ‘Princi estas malfacile, ministri ne estas facile. – Scii malfacilecon al reĝo estas proksime al unu vorto, prosperiganta la regnon, ĉu ne?’²”

Kaj daŭre la princo demandis: “Ĉu estas unu vorto, per kiu perdiĝas la regno?”

Konfuceo respondis: “Per unu vorto ne atingeblus tia rezulto. Sed estas popoldiro, – ‘Fariĝinte reĝo, mi havas neniun plezuron krom tio, ke oni ne eldiru opinion kontraŭ mi.’ – Estus bone, se oni ne kontraŭus al bono, tamen se oni ne kontraŭus al malbono, tio estas proksima al la vorto, kiu dertruas al regnon.³”

Rim. 1: La princo Ding, la suvereno de Lu-regno (509-495 a. K.)

Rim. 2: Laŭ tia opinio, en regado la humileco de supro estas grava sinteno, kaj aroganteco estas danĝera.

Rim. 3: Konfuceo rigardas “kritikon” grava por preventi la ŝtaton el detruo.

1316

La duko She¹ demandis pri regado-politiko. 沈諸梁 Shen Zhuliang.

La Majstro diris: “Ke ĝoju proksimuloj, kaj ke alvenu malproksimuloj.²”

Rim. 1: Prefekto de She. She estis la nomo de unu distrikto de Chu-regno.

Rim. 2: Mozi kritikis la respondon por troa banaleco. Laŭ Mozi, estas grave klarigi, kion fari pro ke ĝoju proksimuloj.

1317

Zixia¹, postenigite prefekto de Jufu², demandis pri la regado-politiko.

La Majstro diris: “Ne deziru hastecon, nek serĉu profiteton. Se hastema, ne povas atingi. Se serĉus profiteton, granda afero ne atingeblus.”

Rim. 1: Bu Shang, disĉiplo de Konfuceo.

Rim. 2: 莒父 Nomo de la urbo de Lu-regno, en nuna gubernio Ju en Shangdong provinco.

1318

La duko She diris al Konfuceo: “En nia komunumo estas honestulo. Kiam lia patro ŝtelis ŝafon, li, estante filo, denunciis lin.”

Konfuceo diris: “En nia komunumo honestulo estas alia – Patro ŝirmas la filon, kaj la filo ŝirmas la patron. Honesteco kuŝas meze.¹”

Rim. 1: 直在其中 Multaj esploristoj prenas tiun frazon alie: “La patro kaŝas la miskonduton de la filo, kaj la filo kaŝas la miskonduton de la patro. Honesteco ja troviĝas en tio ĉi.”[WCf60] Mi opinias tian komprenon erara. Ne en “tio ĉi”, sed en meze de du kondutoj. En Ĉinio ekzistas legalismo kaj nepotismo.(法家主義、親親相隱) Kiel kompreni pri la ideogramo 中 de Konfuceo estas tre grava. Subtenanto de nepotismo povas apogi sin sur la kompreno de “en tio ĉi” por la ideogramo 中. El al vidpunkto de legalismo ne estas akceptebla la kompreno: “Honesteco estas en tio ĉi (親親相隱)”.

1319

Fan Chi demandis pri bonvoleco.

Konfuceo diris: “Hejme estu humile-obeema; ĉe aferumado estu respektema; al homoj estu lojala. Tiujn principojn oni ne devas forlasi eĉ en landoj de sovaĝuloj kaj barbaroj.¹”

Rim. 1: 夷狄

1320

Zigong demandis: “Kiun oni povas nomi altpersono kiel Shi?”¹

La Majstro diris: “Ĉe sia konduto li estas hontema. Sendite foren ĉien ajn, li ne hontigas sian sinjoron je la ordono. Li povas esti nomata Shi, altpersono.”

Zigong diris: “Mi volas demandi pri la sekva altpersono.”

La Majstro diris: “Familio nomas lin filo fidela, komunumo nomas lin respektanta pliaĝulojn.”²

Zigong diris: “Mi volas demandi pri la sekva.”

La Majstro diris: “Je sia vorto li nepre estas fidinda, kaj la ago nepre efektiviĝas. Kvankam li ŝajnus obstina malgrandulo, tamen oni povas nomi lin la sekva altpersono.”

Zigong demandis: “Kiaj estas nunaj poitikanoj?”

La Majstro diris: “Ho ve! Tiuj malvastanimaj pedeloj ne meritas kalkulon.”

Rim. 1: 士 Kiel rango, ĝi estis nobela batalanto 戰士 sub garanda oficisto 大夫 kaj plenumanto de kortega rito 卿. Sed en la detrua proceso de rango, ĝi iĝis nomo de klera persono, strebanta al enoficiĝo, aŭ al reformo de societo, aŭ al sinperfektigo.

Rim. 2: familio 宗族, komunumo 鄉党, fidela 孝, respektanta pliaĝulojn 弟

1321

La Majstro diris: “Se ne eblus havi okazon kunlabori kun homo de ĝusta Mezo¹, nepras kunlabori kun homo fervora² aŭ skrupula³. La fervora estas entreprenema, la skrupula detenas sin de malbonfarado.”

Rim. 1: 中行 Termino estas uzata anstataŭ La Ĝusta Mezo 中庸, la morala normo, laŭ kiu parolo kaj konduto de homo ne devas esti troa, nek maltroa.

Rim. 2: 狂 freneza, fervora. Konfuceo uzas tiun vorton, kiel neordinaran karakteron.

Rim. 3: 狷 obstina, skrupula. Homo, koncentriĝanta al sia penso kaj afero.

1322

La Majstro diris: “Laŭ eldiro de iu sudano, ne povas fariĝi kuracisto kaj aŭguristo tiu, al kiu mankas konstanteco je karaktero. Bone dirite¹. Kies virto ne estas konstanta, tiu ricevas honton.”

La Majstro diris: “Estas bone nur ne aŭguri.”

Rim. 1: 易經 *Libro de Ŝanĝiĝoj*. Laŭdire ĝi estis editorita de Konfuceo.

1323

La Majstro diris: “Noblulo akordiĝas, sed ne asimiliĝas. Malgrandulo asimiliĝas, sed ne akordiĝas.”

1324

Zigong demandis: “Kia estas tiu, kiun ŝatas ĉiuj samvilaĝanoj?”

La Majstro diris: “Tiu ankoraŭ ne povas esti sufiĉe bona.”

Zigong plue demandis: “Kia estas tiu, kiun malŝatas ĉiuj samvilaĝanoj?”

La Majstro diris: “Tiu ankoraŭ ne povas esti sufiĉe malbona. Bona estas tiu, kiun ŝatas bonuloj el samvilaĝanoj, sed kiun malbonuloj malŝatas.”

1325

La Majstro diris: “Noblulo estas tiu, al kiu facilas servi, sed al kiu malfacilas plaĉi. Li ne ĝojas, se ne laŭ la vojo. Li uzas subulojn, kiel ilon. Malgrandulo estas tiu, al kiu malfacilas servi, sed kiun estas facile ĝojigi. Li ĝojas eĉ ne je la vojo. Li preferas uzi subulon tujpretecan.”

1326

La Majstro diris: “Noblulo estas kvieta, kaj ne aroganta. Malgrandulo estas aroganta kaj malkvieta.”

1327

La Majstro diris: “Proksima al bonvoleco estas tiu, kiu je sia karaktero estas firma, persistema, simpla, kaj diskreta.”¹

Rim. 1: 剛毅木訥 jam fariĝis idiomaĵo, signifanta karakteron “neflekseblan kaj simplan”.

1328

Zilu demandis: “Kiun oni povas nomi Shi, alta persono?”

La Majstro diris: “Eblas nomi alta persono tiun, kiu havigis al si malligitan¹ amon² kaj ĝojplenan harmonion. Al amikoj tenu amon malligitan, kaj al fratoj tenu ĝojplenan harmonion.”

Rim. 1: 切 Mi prenas tiun vorton kiel signifon “tranĉi”, sed ne “nepre” en nuna senco. Wang Chongfang tradukis ĝin “bonintence kritikema”.

Rim. 2 儻 En la japana lingvo tiu ideogramo estas uzata kiel esprimo de “sopiro”.

1329

La Majstro diris: “Popolanoj, disciplinitaj de bona instruisto sep jarojn, povas militservi kiel soldatoj.”¹

Rim. 1: Eblas kompreni la frazon en du manieroj: 1) Bezonas almenaŭ 7 jarojn por

popolanoj fariĝi bonaj soldatoj, 2) Se disciplini dum 7 jaroj, eĉ simpla popolano fariĝas soldato.

1330

La Majstro diris: “Sendi ne disciplinitajn popolanojn al bataalkampo, tio estas nomata forlasi ilin.”

14 XIAN WEN

1401

Xian¹ demandis, kio estas hontinda.

La Majstro diris: “Oni povas ricevi salajron de la lando, kie estas la justa vojo. Se de la lando, kie ne estas la justa vojo, tio estas hontinda.”

Rim. 1: Yuan Xian, disĉiplo de Konfuceo.

1402

Ĉu eblas nomi bonvoleco la konduton, en kiu mankas superemo, sinmontremo, vengemo kaj avido?

La Majstro respondis: “Oni povus konsideri tian konduton malfacila, sed mi ne scias, ĉu ĝi estas bonvoleca.”

1403

La Majstro diris: “Persono, sopiranta al loĝkomforto, ne meritas nomon de altpersono Shi”.

1404

La Majstro diris: “Kiam en la lando estas la justa vojo, estu kuraĝa je parolado kaj je la konduto. Kiam en la lando mankas la justa vojo, estu kuraĝa je la konduto, tamen estu humila je la parolado.”

1405

La Majstro diris: “Virtulo nepre havas ion paroli, sed parolanto ne ĉiam estas virta. Homo kun bonvoleco nepre havas kuraĝon, sed kuraĝulo ne ĉiam havas bonvolecon.”

1406

Nangong Kuo¹ demandis Konfuceon, dirante: “Yi² estis bona pafarkisto kaj Ao³ lertis je ŝipobatalo, tamen, malgraŭ tio, ambaŭ ne povis nature morti. Yu⁴ kaj Ji⁵ mem terkulturis kaj regis la mondon.”

La Majstro ne respondis. Nangong Kuo eliris.

La Majstro diris: “Noblulo estas tiu homo! Estimanto de virto estas tiu homo!”

Rim. 1: Iuj[Kong Anguo] konsideras lin intendanto de Lu-regno, aliaj[Sima Qian] – Nan

Rong, kiu edziĝis kun la filino de frato de Konfuceo.

Rim. 2: Lerta arkpafisto, uzurpis tronon de Xia-dinastio, mortigita de sia subulo Han Zu. Han Zu edziĝis al la edzino de Yi.

Rim. 3: Legenda fortegulo. Eksedzino de Yi naskis lin.

Rim. 4: Fondinto de Xia-dinastio.

Rim. 5: Praulo de la suverenoj de Zhou-dinastio. Li instruis al la popolo grenplantadon kaj tial estis adorkultata kiel dio de greno.

1407

La Majstro diris: “Povas esti, ke noblulo ne estas bonvoleca. Sed neniam povas esti, ke malgrandulo¹ estu bonvoleca.”

Rim. 1: 小人 Malgranda homo signifas ĉi tie homon sen bonvoleco.

1408

La Majstro diris: “Se vi amas iun, kial vi povus ne laborigi¹ lin. Se vi estas lojala al iu, kial vi povus ne admoni lin.”

Rim. 1: 劳 havas du signifojn: laborigi kaj rekompenci.

1409

La Majstro diris: “Se temas pri la proklamado de ŝtataj dekretoj en Zheng-regno, Bi Chen¹ verkis malneton, Shi Shu² ekzamenis ĝin, Zi Yu³, diplomato, modifis ĝin, kaj Zichan de Dongli⁴ poluris ĝin.”

Rim. 1: 裨諶、

Rim. 2: 世叔、游吉

Rim. 3: 子羽、公孫揮

Rim. 4: 子產、公孫僑

1410

Iu demandis al Konfuceo pri Zichan.

La Majstro diris: “Li estis favora¹ al homoj.”

Li demandis plue pri Zixi.

La Majstro diris: “Li estas tia, estis tia.”²

Sekve li demandis pri Guan Zhong³.

La Majstro diris: “Li estas persono. Li konfiskis tricent vilaĝojn el feŭdo de Bo-familio. Bo⁴ devis manĝi nur krudajn manĝaĵojn kaj legomojn, tamen Bo neniam eldiris plendon ĝis la fino.”

Rim. 1: 惠人 eblas traduki per du signifoj: “favora al homo” kaj “bonkora homo”.

Rim. 2: 子西 Ĉefministro de Chu-regno. Li malhelpis al Konfuceo la enoficigon en Chu-regno.

Rim. 3: 管仲 Ĉefministro al la princo Huan de Qi-regno.

Rim. 4: 伯氏 Bo, granda oficisto de Qi-regno.

1411

La Majstro diris: “Estante malriĉa, ne plendi – tio estas malfacila. Estante riĉa, ne aroganti – tio estas facila.”

1412

La Majstro diris: “S-ro Meng Gongchuo¹ elstarus se kiel intendanto en Zhao aŭ Wei-familioj². Sed li ne povas fariĝi eĉ granda oficisto en Teng kaj Xue landoj³.”

Rim. 1: 孟公綽 Granda oficisto en Lu-regno, respektata de Konfuceo.

Rim. 2: La familioj de Zhao kaj Wei estis du potencaj familioj en Ji-regno.

Rim. 3: Du malgrandaj landoj en Lu-regno, situis en nuna Zaozhuang, Shandong provinco. Estas malfacile, ke talenta persono estu ĝuste taksata en malgrandaj landoj.

1413

Zilu demandis, kio estas perfekta personeco.

La Majstro diris: “Se iu, havante scion de Zang Wuzhong¹, malavidecon de Gongchuo², kuraĝon de Zhuang-zi de Bian³, artojn de Ran Qiu⁴, aldone havigis al si literaturon, decregulojn kaj muzikon, povas esti nomata la perefekta personeco.”

La Majstro diris plue: “Al nuntempa perfekta personeco nepre necesas jen kio: vidante profiton, pripensi juston; vidante danĝeron, fordoni sian vivon; ĉiam ne forgesi la diritan de si mem vorton. Ankaŭ tiun eblas konsideri perfekta personeco.”

Rim. 1: Granda oficisto de Lu-regno. Kiam li estis en Qi-regno, la princo Zhuang volis doni al li feŭdon. Sed li rifuzis ricevi ĝin.

Rim. 2: Meng Gongchuo. Li estis fama je malavideco.

Rim. 3: Granda oficisto de Lu-regno. Bian estas nomo de la urbo, posedata de li.

Rim. 4: Disĉiplo de Konfuceo.

1414

La Majstro demandis al Gongming Jia¹ pri Gongshu Wen-zi²: “Ĉu estas vere, ke tiu sinjoro ne parolas, nek ridas, nek prenas donacon?”

Gongming Jia respondis al li, dirante: “Informinto al vi troigis. La sinjoro ekparolas nur post kiam tempas paroli, do al homoj ne malplaĉas lia parolado. Ekridas post kiam li ĝojas, do al homoj ne malplaĉas lia rido, prenas post kiam li trovis la donacon justa, do al homoj ne malplaĉas lia preno.”

La Majstro diris: “Estas tia. Ĉu vere, estas tia?”

Rim. 1: Wei-regnano, sendito de Gonchu Wen.

Rim. 2: Gongshu Ba, ministro de Wei-regno, kuzo de la princo Ling.

1415

La Majstro diris: “Okupante la urbon Fan, Zang Wuzhong¹ postulis de Lu-regno, ke lia posteulo povu heredi lian familion. Kvankam oni diras, ke li ne ĉantaĝis la reĝon, tamen mi ne kredas je la onidiro.”

Rim. 1: Kiam li elmigris al Zhu lando el Lu-regno, kie okazis interna konflikto inter intendantoj, li proponis redonon de la urbo kontraŭ la sekurigo de sia familio. Tio estis akceptita kaj Zang Wei, lia frato, heredis la familion.

1416

La Majstro diris: “La princo Wen¹ de Jin-regno estis sagaca kaj maljusta. La princo Huan² de Qi-regno estis justa kaj ne sagaca.”

Rim. 1: La suvereno de Jin-regno, 重耳 (surtrone 636-628 a. K.)

Rim. 2: La suvereno de Qi-regno, 桓公 (surtrone 685-643 a.K.)

1417

Zilu diris: “La princo Huan mortigis la pliaĝan fraton Jiu¹ kaj ĉe tio Shao Hu kunmortis, sed Guan Zhong ne mortis.” Kaj li demandis: “Ĉu al Guan Zhong mankis bonvoleco?”

La Majstro diris: “La princo Huan kolektis landestrojn naŭ fojojn por pacigi ilin, ne uzante soldatojn kaj militĉarojn. Tio estas efektivigita per la kapablo de Guan Zhong.

Jen tia estas lia bonvoleco. Jen estas la bonvoleco.”

Rim. 1: Jiu kaj Huan estis pli junaj fratoj de la princo Xiang, la suvereno de Qi-regno. Jiu elmigris en Lu-regnon, akompanate de Guan Zhong, Huan – en Ju-gubernion, akompanate de Bao Shuya. Kiam Xiang estis mortigita, Huan revenis pli frue kaj surtroniĝis, kaj mortigis la pliaĝan fraton Jiu. Tiam sinmortigis lia subulo Shao Hu, sed Guan Zhong saviĝis. Li fariĝis ĉefministro al la princo Huan.

1418

Zigong diris: “Ĉu Guan Zhong ne estas persono de bonvoleco? Kiam la princo Huan mortigis princon Jiu, li ne povis kunmorti, sed fariĝis eĉ ĉefministro sub Huan.”

La Majstro diris: “Guan Zhong, kiel ĉefministro de la princo Huan, faris lin konkerinto de landestroj kaj unuiginto en la mondo. Popolo ĝis nun profitas de tio. Sen Guan Zhong ni laŭ barbara moro hararanĝus loze kaj vestiĝus renverse kun maldekstra rando supre. Kial do oni povus mezuri lin per sentimentala moralkriterio de ordinaraj geviroj, sinmortigantaj nerimarkite en akvo por atesti senkulpecon.”

1419

La granda oficisto Zhuan, subulo de Gongshu Wen-zi, estas promociita de la lasta al la sama posteno de Gongshu. Aŭdinte tion, la Majstro diris: “Vere Gongshu meritas la nomon Wen¹, homo de literaturo.”

Rim. 1: Nomo Wen 文 estis unu el la plej altaj postmortaj nomoj.

1420

La Majstro parolis pri senbrideco far de la princo Ling de Wei-regno. Kang-zi¹ diris: “Se estis tia, kial la regno ne pereis?”

La Majstro diris: “Estis asistantoj, kiel Zhongshu Yu², zorganta pri akceptado de gastoj, Zhu Tuo³ pri la prapatra maŭzoleo, Wang Sunjia⁴ pri la komando de armeo. Se tiel, kial ĝi pereus?”

Rim. 1: Ji Kang, t. e. Jisun Fei, la plej potenca ministro al la princo Ai de Lu-regno.

Rim. 2: Kong Wen, granda oficisto de Wei-regno.

Rim. 3: Granda oficisto de Wei-regno, fama diplomato. vd. 0611

Rim. 4: Granda oficisto de Wei-regno. vd. 0313

1421

La Majstro diris: “La vorton malhontindan estas malfacile efektiviĝi.”¹

Rim. 1: 不作 Multaj esploristoj komprenas frazon alie: “Tiu, kiu parolas sen modesteco, trovos malfacila efektiviĝi siajn vortojn.” [WCf68] Mi prenas tiun frazon kiel pretecon je rezoluta ago por efektiviĝi la diritan aferon. Laŭ mi la frazo rilatas al la sekva teksto pri la konduto de Konfuceo.

1422

En Qi-regno, Chen Cheng-zi¹ murdis la princon Jian². Konfuceo, baniĝinte por purigi sin, turnis sin al kortega kunveno.

Li diris al la Princo Ai³: “Chen Heng murdis sian reĝon, do mi petas vin puni lin.”

La princo diris: “Diru pri tio al tri gvidantoj⁴.”

Konfuceo diris: “Kiel eksa granda oficisto, mi ne devas ne informigi la princon, sed la lasta diris, ke mi diru al tri gvidantoj.” Kaj li raportis al tri gvidantoj.

La lastaj diris: “Ne eblas.”

Konfuceo diris: “Kiel eksa granda oficisto, mi ne devis ne diri tion.”

Rim. 1: Tian Cheng-zi, intendanto de Qi-regno, mortigis la princon Jian en 481 a. K. Alinome – Cheng Heng.

Rim. 2: La suvereno de Qi-regno, nepo de la princo Jing.

Rim. 3: La suvereno de Lu-regno, surtrone 494-466 a. K.

Rim. 4: Ĉefoj de tri familioj, Zhongsun, Shusun kaj Jisun, kiuj estis efektive regantoj la Lu-regnon.

1423

Zilu demandis Konfuceon pri la servado al suvereno.

La Majstro diris: “Ne trompu, kaj ne hezitu ofendi¹ lin.”

Rim. 1: 犯 Diri veron, ne hezitante kritiki – tio estas necesa pro servado al la suvereno. Ĉi tie estas esprimata la graveco de kritiko en konfuceanismo.

1424

La Majstro diris: “Noblulo strebas atingi alten, malgrandulo – malalten.”

1425

La Majstro diris: “Antikvaj kleruloj lernis por si mem, nunaj kleruloj – por aliaj.”

1426

Qu Boyu¹ sendis iun al Konfuceo. Konfuceo diris al la sendito sidiĝi kaj demandis: “Kion faras via sinjoro?”

La sendito respondis: “Mia sinjoro volus malmultigi siajn erarojn, sed ankoraŭ ne sukcesas.”

La sendito foriris. La majstro diris: “Kia sendito! Kia sendito!”

Rim. 1: Granda oficisto de Wei-regno. Kiam Konfuceo vizitis Wei, li loĝis ĉe Bo.

1427

La Majstro diris: “Kiu ne staras sur la posteno, tiu ne enŝovas sian nazon en alies aferon.”

Zeng-zi diris: “Noblulo je la zorgo pri la afero ne transiru la limon de sia posteno.”

1428

La Majstro diris: “Noblulo hontas, ke sia eldiro estu supera ol sia ago.”¹

Rim. 1: Ŝajnas, ke tiu teksto kun 1421 kompletigas unu la alian. Estas malfacile efektiviĝi la eldiron, sed noblulo devas konformigi sian agon al eldiro.

1429

La Majstro diris: “Estas tri vojoj, kiun noblulo devas atenti, kvankam al mi ne eblas. Estu kun bonvoleco sen zorgo, kun saĝeco sen ŝanceliĝo, kun kuraĝo sen timo.”

Zigong diris: “Majstro, tia estas via vojo.”

1430

Zigong parolis pri alies mankoj¹. La Majstro diris: “Ci-ĉjo, vi estas ja saĝa, sed mi ne havas tempon por tio.”

Rim. 1: 方 havas diversajn signifojn. Iu konsideras ĝin “kritiki”, alia – “kompari”. Laŭ mi, Konfuceo riproĉadmonas konduton de Zigong, ne rekte kritikanta aliajn vid-al-vide.

1431

La Majstro diris: “Mi ne suferas pro tio, ke aliaj ne scias min, sed suferas pro tio, ke mi

mem ne havas kapablon.”

1432

La Majstro diris: “Ne ĝenu vin, ĉu oni trompu vin aŭ ne; ne skrupulu, ĉu oni perfidu vin aŭ ne. Ĉu vere estas saĝa tiu, kiu antaŭe perceptas ion?”

1433

Weisheng Mu¹, kritikante Konfuceon, diris al li: “Qiu, kial vi vagadas de loko al loko, vi parolaĉas², flatante, ĉu ne?”

Konfuceo respondis: “Mi ne aŭdacas parolaĉi, sed malŝatas rigidiĝon³.”

Rim. 1: Probable ermito.

Rim. 2: 佞 Weisheng rigardis migradon de Konfuceo flatado al landestroj.

Rim. 3: 固 eblas signifi diverse. Multaj esploristoj konsideras tion obstineco de aŭskultantoj. Sed mi opinias, ke tio povas esti rigidiĝo de sia propra pensmaniero.

1434

La Majstro diris: “Oni estimas bonan ĉevalon ne pro lia forteco, sed pro la virto.”

1435

Iu diris: “Kiel vi taksas tiun, kiu respondas al venĝemo per virto?”

La Majstro diris: “Tiuokaze per kio oni respondus al virto? Al venĝemo respondu per honesteco, kaj al virto respondu per virto.”

1436

La Majstro diris: “Neniu komprenas min.”

Zigong diris: “Kial oni vin ne komprenus?”

La Majstro diris: “Mi ne havas venĝemon al la Ĉielo, nek riproĉas homojn, sed nur volus atingi de sub al supro per lernado. Estas nur la Ĉielo, kiu komprenas min.”¹

Rim. 1: Laŭ *Shiji*, la vortoj estis diritaj, kiam Konfuceo havis 71 jarojn.

1437

Gongbo Liao¹ kalumniis Zilu-on al Jisun². Zifu Jingbo³ sciigis Konfuceon pri tio, dirante: “S-ro Jisun ŝanceliĝas vere je dubo. Koncerne al Gongbo Liao, mi povus montri lian kadavron⁴ sur merkato.”

La Majstro diris: “Tio, ke la vojo ĝuste estos farita, dependas de la Ĉiela ordono. Tio, ke la vojo pereos, dependas ankaŭ de la Ĉiela ordono. Kion do povus fari tiu Gongbo Liang al la Ĉiela ordono?”

Rim. 1: Zi Zhou, unu el disĉiploj de Konfuceo.

Rim. 2: Unu el regantoj de Lu-regno. Zilu fariĝis intendanto de Ji-familio.

Rim. 3: Granda oficisto de Lu-regno.

Rim. 4: mortpuni.

1438

La Majstro diris: “La saĝulo evitas la mondon. La sekva evitas la lokon, la tria evitas pasion, la kvara evitas la vorton.”

La Majstro diris: “Tiaj ermitoj troviĝis sep.”

1439

Zilu iam tranoktis ĉe Ŝtona pordo¹. Iu pordgardisto demandis: “De kie vi venis?”

Zilu respondis: “De s-ro Kong.”

Li diris: “Ĉu li estas tiu, kiu, sciante la neeblecon, tamen aŭdacas fari?”

Rim. 1: 石門 Lokonomo de la ekstera pordo de morego de Qufu, la ĉefurbo de Lu-regno.

1440

La Majstro iam ludis ksilofonon el ŝtonoj en Wei-regno. Iu portanto de korbego preterpasis antaŭ la pordo de domo, kie Konfuceanoj estis loĝantaj.

Li diris: “Estas koro en la ludado de ŝtona ksilofono.”

Iom poste li diris: “Kiel profana estas la sono. La ludanto plendas, ke oni ne konas lin. Estas nur lia memkonscio¹. Se rivero estas profunda, travadu malsekigite; se malprofunda, travadu kun vestoj levitaj.²”

La Majstro diris: “Trafe. Sed li ne komprenas, kiel estas malfacile fari tion.”

Rim. 1: 斯已而已矣 Estas alia kompreno pri la frazo: “Se neniu taksas min, tiuokaze nenion fari.”

Rim. 2: Versoj el *Poezio*.

1441

Zizhang diris: “Estas skribite en *Libro*¹, ke ‘Gaozong dum tri jaroj de patra funebro ne

parolis. Kion signifas tio?”

La Majstro diris: “Ne nur Gaozong, sed ĉiuj antikvuloj faris tiel post la morto de suverenoj. Dume tutan respondecon prenis al si cent oficistoj kaj ricevis instrukciojn de la ĉefministro.”

Rim. 1: 尚書 *Libro de Historio*. En ekzistanta *Libro* ne troviĝas la supre menciita frazo.

1442

La Majstro diris: “Se la supro ŝatas decregulojn, la popolon estas facile subigi.”

1443

Zilu demandis pri noblulo. La Majstro diris: “Regi sin mem kaj respekti.”

Zilu diris: “Ĉu necesas nur tio?”

La Majstro diris: “Regi sin mem kaj doni al aliaj trankvilon.”

Zilu diris: “Ĉu necesas nur tio?”

La Majstro diris: “Regi sin mem kaj doni al la popolo pacon. Eĉ Yao kaj Shun zorgis pri tio.”

1444

Yuan Rang¹ atendis, sidante laŭ barbaro². La Majstro diris: “Kiu en infaneco ne estis obeema, tiu, kreskinte, faras nenion utilan. Se li maljuniĝos kaj ne mortos, li fariĝos aĉulo.” Kaj per bastono li batis Yuan Rang je suroj.

Rim. 1: Amiko de Konfuceo. Kiam lia patrino mortis, li kantis sur la ŝia ĉerko.

Rim. 2: Sidi kun disigitaj kruroj.

1445

Knabo de Quedang¹ alportis mesaĝon. Iu demandis al Konfuceo pri li: “Ĉu li fariĝos utila?”

La Majstro diris: “Mi vidas lin sidanta ne en sia posteno, kaj iranta kune kun pliaĝulo en ŝultro ĉe ŝultro. Li kreskas ne tia, ke fariĝu utila persono, sed nur tia, ke deziras tuj fariĝi egala al pliaĝuloj.”

Rim. 1: Lokonomo, proksima al la hejmo de Konfuceo. Dang 党 estas vilaĝo kun 500 domoj.

15 WEI LING GONG

1501

La princo Ling¹ de Wei-regno demandis Konfuceon pri arma formacio. Konfuceo diris al li: “Koncernante ceremonion de oferado, mi iam aŭdis, sed militajn aferojn mi ankoraŭ ne lernis.”² En la sekva tago li foriris de tie.

Rim. 1: Suvereno de Wei, fama je malkapableco.

Rim. 2: 俎豆 hakplato kaj plado de manĝaĵo, uzataj en ofer-ceremonio. Respondo de Konfuceo montras akran diferencon de Mozi kaj mohistoj, specialistoj de defend-milito. Konfuceo kaj Mozi ambaŭ estis pacifistoj, sed ili diferencas je sinteno al militarto.

1502

Kiam Konfuceo veturis en Chen-regno, la provianto elĉerpiĝis. Iuj el sekvantoj malsaniĝis kaj ne povis stariĝi. Zilu koleris kaj, turnante sin al Konfuceo, diris: “Ĉu ankaŭ noblulo povas esti en mizero?”

La Majstro diris: “Eĉ noblulo povas esti en mizero, restante nobla. Malgrandulo en mizero freneziĝas.”

Rim. 1: En la ĉapitro “Kontraŭ konfuceanoj 非儒” de *Mozi* estas skribite, kiom serioze suferis Konfuceo kun lernantoj pro malsato. Tiam disĉiploj donis al Konfuceo manĝi, eĉ ŝtelinte. “Zilu kuiris porkon. Konfuceo manĝis ĝin, ne demandante, de kie la viando venis. Li ŝtelis alies vestaĵon kaj aĉetis vinon. Konfuceo drinkis la vinon, ne demandante, de kie venis la vino. 子路享豚, 孔某不問肉之所由来而食. 禡人衣酤酒, 孔某不問酒之所由来而飲” Koleranta Zilu tiel freneziĝis por savi la Majstron el malsato.

1503

La Majstro diris: “Ci¹, ĉu vi konsideras min multe-lerninto kaj scianto?”

Li respondis: “Jes, ĉu mi eraras?”

La Majstro diris: “Vi eraras. Mi estas nur homo per unu principo trapenetrita.”

Rim. 1: Zigong.

1504

La Majstro diris: “You-ĉjo¹, sciantoj de virtoj estas tre malmultaj.”

Rim. 1: Zhong You. Adoltiĝaj nomoj estas Zilu kaj Jilu. Multaj esploristoj konsideras tiun tekston admono al koleranta Zilu dum malsato.

1504

La Majstro diris: “Tiu, kiu regis sen agado, estas ja Shun¹. Kion li faris? Li nur humile sidis sur la trono, turnante sin al sudo.”

Rim. 1: 舜 Saĝa kaj virta legenda reĝo.

1505

Zigong demandis pri konduto. La Majstro diris: “Se estas kredo kaj fido je vortoj kaj konduto estas respektplena, eĉ en barbaraj landoj kiel Man kaj Bo, estas bone administrate. Se mankas kredo kaj fido je vortoj kaj konduto estas senrespekta, eĉ en najbaraj urboj kaj vilaĝoj ne estas administrate. Se oni vidas ĉiam tri principojn – kredo, fido kaj respekto, – kie ajn oni staras aŭ sidas en ĉaroj, ĉio estas nature farebla.”

Zizhang enskribis tion sur sian zonon.

1506

La Majstro diris: “Rekta estas Shi Yu!¹ Li kondutas kvazaŭ sago ĉiam ajn, kaj kiam troviĝas en lando la vojo, kaj kiam ne troviĝas en lando la vojo. Noblulo ja estas Qu Boyu. Li servas en ofico, kiam en lando troviĝas la vojo, kaj, se ne troviĝas la vojo, li ekŝiĝis, portante sian principon en sia sino.”

Rim. 1: Granda oficisto en Wei-regno.

Rim. 2: Granda oficisto en Wei-regno. Konfuceo loĝis ĉe li.

1507

La Maistro diris: “Se oni ne alparolas tiun, kun kiu indas interparoli, oni perdas la homon. Se oni alparolas tiun, kun kiu ne indas interparoli, oni vane perdas vorton. Intelektulo ne perdas homon, nek perdas vorton.”

1508

La Majstro diris: “Persono kun strebo kaj homo kun bonvoleco ne serĉas al si vivon per damaĝo de bonvoleco, sed ili ofertas sin por plenumi bonvolecon.”

1509

Zigong demandis pri plenumado de bonvoleco. La Majstro diris: “Se metiisto volas fari la laboron bona, li antaŭ ĉio nepre akriĝas la instrumenton. Se iu loĝas en ajna lando, li servas al tiea saĝulo el grandaj oficistoj kaj amikiĝas kun persono de bonvoleco.”

1510

Yan Yuan demandis pri regado de ŝtato. La Majstro diris: “Adoptu la kalendaron de Xia-dinastio¹, prenu kaleŝon de Yin-dinastio, portu la ceremonian ĉapon de Zhou-dinastio, ludu muzikon de Shao² kaj Wu³. Forlasu la kantojn de Zheng-regno, kaj forigu flatemulojn, ĉar kantoj de Zheng-regno estas voluptemaj kaj flatemuloj estas danĝeraj.”

Rim. 1: Tiam ekzistis tri diversaj lunkalendaroj: de Zhou, de Yin, kaj de Xia. Laŭ lunkalendaro de Zhou jaro komenciĝis en la dek unua monato, laŭ Yin – en la dek dua monato, kaj laŭ Xia – en la unua monato, en la nuna printempa tago.

Rim. 2: Nomo de muzikaĵo en la epoko de la reĝo Shun.

Rim. 3: Nomo de muzikaĵo en la epoko de la reĝo Wu.

1511

La Majstro diris: “Kiu ne zorgas pri la malproksimo, tiun nepre afliktos la proksimo.”

1512

La Majstro diris: “Ho ve! Mi ankoraŭ ne vidas tian virto-ŝatanton, kiu pasioplene¹ ŝatas la virton.”

Rim. 1: 好色 Multaj esploristoj komprenas tiun ffrazon “amas la virton kiel la belecon”.
[WCf73]

1513

La Majstro diris: “Zang Wenzhong¹ estas ja ŝtelinto de la posteno, ĉu ne? Malgraŭ ke li sciis la saĝon de Liuxia Hui², li ne promociis la lastan al la sama posteno, kiel lia.”

Rim. 1: Zang Sunzhen (· 617 a. K.) estis ĉef-ministro, granda oficisto de Lu-regno.

Rim. 2: Hui de Liuxia, Zhan Huo. Hui estas postmorta nomo, Liuxia estis la lokonomo, kie li loĝis.

1514

La Majstro diris: “Kiu perfektigas¹ sin plie kaj riproĉas la aliajn malplie, tiu povas eviti alies rankoron.”

Rim. 1: 躬自厚 Iuj esploristoj komprenas la frazon kiel “riproĉi sin pli multe”.

1515

La Majstro diris: “Kiu ne demandadas sin – Kion fari? Kion fari? –, al tiu mi havas nenion fari kaj neniel fari.”

1516

La Majstro diris: “Kiu, tutan tagon kune sidante, ne parolas pri justo kaj nur vante sagacetas, tiun estas malfacile trakti.”

1517

La Majstro diris: “Noblulo konsideras juston esenca, praktikas ĝin per decreguloj, esprimas ĝin kun humileco, efektivigas ĝin kun kredo. Jen tia estas la noblulo.”

1518

La Majstro diris: “Noblulo ĉagrenas sin pro sia senkapableco, ne ĉagrenas sin pro tio, ke aliaj homoj ne konas lin.”

1519

La Majstro diris: “Noblulo ne deziras, ke lia nomo estu ne laŭdata post la morto¹.”

Rim. 1: 没世 Multaj esploristoj prenas la frazon kiel “ĝis la morto”.

1520

La Majstro diris: “Noblulo postulas ion de si mem, malgrandulo postulas de aliuloj.”

1521

La Majstro diris: “Noblulo, havante dignon, ne kverelas; estante sociema, li ne partiemas.”

1522

La Majstro diris: “Noblulo ne promocias iun homon pro liaj vortoj, sed ne ignoras vortojn pro la homo, kiu eldiris ilin.”

1523

Zigong demandis, dirante: “Ĉu estas unu vorto, kiun oni devas praktiki dum la tuta vivo?”

La Majstro diris: “Tio estas ja kompato¹. Ne faru al la alia tion, kion vi ne deziras fari al vi mem.”

Rim. 1: 恕 pardono, toleremo, reciprokeco, kompato – kompreno de alies koro aŭ de la Ĉiela volo.

1524

La Majstro diris: “Taksante homon, kiun mi laŭdas kaj kiun mi riproĉas, mi nepre provos la homon, kiun mi trovas laŭdinda. Ĉar ankaŭ al la popolo la vojo de tia elprovado estis farata de la reĝoj de tri dinastioj¹.”

Rim. 1: Tri dinastioj estas Xia, Shang ka Zhou.

1525

La Majstro diris: “Mi renkontas en libroj de historio kelke da blankoj, restigitaj kiel nekomprenebla loko. Havante ĉevalon, iu donis al la alia provrajdi ĝin. Nun tiaj homoj ne ekzistas.”¹

Rim. 1: Teksto nekomprenebla. Ŝajnas, ke estas laŭdata la prudenta sinteno de specialistoj al tio, pri kio ili mem ne bone konas. Saĝulo scias sin je tio, ke li ne scias.

1526

La Majstro diris: “Lertaj vortoj damaĝas virton, malgranda netoleremo damaĝas grandan projekton.”

1527

La Majstro diris: “Kion malŝatas la amaso, tion oni devas nepre atenti skrupule. Kion la amaso ŝatas, tion oni devas nepre atenti skrupule.”

1528

La Majstro diris: “Homoj povas vastigi la vojon, ne la vojo vastigas homojn.”

1529

La Majstro diris: “Iu eraris, sed ne korektas la eraron. Tio estas nomata ja eraro.”

1530

La Majstro diris: “Mi dronis en pensadon tutan tagon sen manĝi, tutan nokton sen dormi. Sed vane. Lerni estas pli bone.”

1531

La Majstro diris: “Noblulo pensas pri vojo, ne pensas pri manĝo. Kiu terkulturas, tiun ankaŭ povas trafi malsato. Kiu lernas, tiu povas ricevi salajron en lernado. Noblulo zorgas pri la demando de vojo, sed ne sia malriĉeco.”

1532

Se vi havigis al vi intelekton, ne havante bonvolecon por subteni ĝin, tiukaze estas malfacile al vi akiri ion, kaj nepre vi perdas tion. Okaze vi havigas al vi intelekton kaj bonvolecon por subteni ĝin, se vi ne havas majestecon de karaktero por efektiviĝi, tiam la popolo ne respektos vin. Okaze vi havigas al vi intelekton, bonvolecon por subteni ĝin, kaj majestecon por efektiviĝi ion, se vi movas tion sen decreguloj, ankaŭ ne eblos atingi bonon.”

1533

La Majstro diris: Noblulo, eĉ se ne povas scii malgrandajn detalojn, tamen al li estas komisiita la granda afero. Malgrandulo, eĉ se povas scii malgrandajn detalojn, tamen al li ne povas esti komisiita la granda afero.”

1534

La Majstro diris: “Ĉe la popolo bonvoleco estas multe pli necesa ol akvo kaj fajro. Ni vidas, ke oni mortas pro akvo kaj fajro, sed ankaŭ ne vidis mortinton pro bonvoleco.”

1535

La Majstro diris: Koncerne al bonvoleco, oni ne cedas eĉ al sia instruisto.”

1536

La Majstro diris: “Noblulo estas fidela je sia principo, kaj ne ligita per sentimentala moralkriterio¹.”

Rim. 1: 諒 vid. 1418

1537

La Majstro diris: “Por servi al landestro, oni devas respekti la servadon, kaj poste zorgi pri manĝaĵo.”

1538

La Majstro diris: “Povas ricevi instruon ĉiuj sendiskriminacie, sen ajna kasto.”

1539

La Majstro diris: “Se malsamas la vojo, oni ne faras aferon kune.”

1540

La Majstro diris: “Indas lingvo, nur se ĝi atingas celon.”

1541

Iu blinda muzikisto, nomata Mian¹, vizitis Konfuceon. Kiam li atingis la ŝtuparon, la Majstro diris: “Jen ŝtuparo.” Kiam li atingis la seĝon, la Majstro diris: “Jen la seĝo.”

Ĉiuj sidiĝis, la Majstro diris al li pri tio kaj prezentis al li ilin: “Jen iu estas ĉi tie, jen la alia estas tie.”

Zigong demandis la Majstron: “Ĉu estas la maniero al blindulo-muzikisto?”

La Majstro diris: “Jes. Vere, tio estas ja la vojo por helpi al blinda muzikisto.”

Rim. 1: Tiam muzikistoj estis blindaj.

16 JI SHI

1601

Ji-familio¹ ĝuste estis atakonta landon Zhuanyu². Ran You kaj Jilu³ vizitis Konfuceon kaj diris: “Ji nun okazigas militon kontraŭ Zhuanyu.”

Konfuceo diris: “Qiu, ĉu vi ne eraras je tio? La lando de Zhuanyu antaŭe estis komisiita de antikvaj reĝoj oferadi al la monto Dong Mengzhu. Kaj, situante en la mezo de nia regno, ĝi estas vasalo de Sheji, nia altaro de dioj de tero kaj greno. Kial do oni povus ataki ĝin?”

Ran You diris: “Nia klanestro volas tion. Ambaŭ ni duope ne dezirus.”

Konfuceo diris: “Qiu, antikva bona oficisto Zhou Ren⁴ iam diris – ‘Montrante kapablon, oni enoficiĝas kun rango, sed ne havante kapablon, retiriĝas el ofico.’ – Se iu helpanto al blindulo ne subtenus, okaze de falo ne helpus, kial do oni povus uzi tiun? Kaj aldone, via eldiro estas erara. Kiu estas kulpa je tio, ke tigro aŭ rinocero eliras el la kaĝo kaj testudŝelo kaj jado estas rompita?”

Ran You diris: “La nuna Zhuanyu estas forta je muro kaj proksima al Bi⁵. Se nun, ni ne okupos ĝin, niaj posteuloj nepre ĝenos sin pro tio.”

La Majstro diris: “Noblulo malŝatas tiun, kiu ornamas per vortoj tion, kion ties koro deziras. Mi aŭdis – ‘Kiu tenas la familion kaj la landon sekura, tiun ne afliktas malmulteco, sed malegaleco. Lin afliktas ne malriĉeco, sed maltrankvilo. Se egalas, oni ne sentas povraj. Se homoj vivas en paco, ili ne malmultiĝas. Se homoj vivas trankvilaj, la lando ne kliniĝas. Tiel do, se malproksimumoj ne obeas, oni devas altigi sian kulturon kaj virton, kaj per tio lasas ilin alveni al si. Nun, You kaj Qiu, helpante al blinda estro, ne povas lasi malproksimumojn obei al vi, nek alveni al vi. La regno disfendiĝos kaj apartiĝos, kaj ne eblos defendi. Malgraŭ tio, vi planas mobilizi la armeon interne en sia regno. Mi timas, ke zorgo de Jisun kuŝas ne en Zhuanyu, sed ene de sia kastelo kaj en sia kortego.”

Rim. 1: Ji Ping, granda oficisto de Lu-regno, unu el la efektivaj regantoj de Lu.

Rim. 2: 顓與 Malgranda lando situanta okcidente de Bi 費. La landestro apartenis al Lu-regno kaj estis komisiita de Zhou-dinastio oferi al la Monto 東蒙山. Ŝajne, ke la lando situis ne malproksime al nuna Zaozhuang.

Rim. 3: Ambaŭ estis disĉiploj de Konfuceo kaj servis al Ji-familio.

Rim. 4: Historiisto en Zhou-dinastio.

Rim. 5: Gubernio posedata de Ji-familio.

1602

Konfuceo diris: “Se regas vojo la mondon, tiam decreguloj, muziko kaj konkerado devenas de la Ĉiela filo. Se ne regas vojo la mondon, tiam decreguloj, muziko kaj konkerado devenas de landestroj. Se ili devenas de landestroj, ili ne perdiĝas en dek generacioj. Se ili devenas de granda oficisto, tiam perdiĝas apenaŭ en kvin generacioj. Se vasaloj administras ŝtaton, perdiĝas apenaŭ en tri generacioj. Se vojo regas la mondon, la regado ne povas esti en la manoj de grand-oficistoj. Se vojo regas la mondon, simplaj homoj ne bezonas disputi.”

1603

Konfuceo diris: “Jam pasis kvin generacioj post kiam la reĝo de Lu-regno perdis potencon doni al subo salajrojn. Pasis kvar generacioj, post kiam administrado estiĝis en la manoj de grand-oficistoj. Tiel do ankaŭ infanoj-nepoj de tri Huan-¹ malfortiĝas je influo.”

Rim. 1: La tri grandaj oficistoj de Lu-regno, nome Mengsun, Shusun kaj Jisun, ĉar ili estis la posteuloj de la princo Huan de Lu-regno. Ili estis realaj regantoj de Lu-regno, sed ankaŭ ili perdas la potencon pro Yanghuo.

1604

Konfuceo diris: “Estas tri amikoj profitigantaj, estas tri amikoj malprofitigantaj. Profitigantoj estas amikoj, honestaj, sentplenaj kaj kapablaj je aŭskultado. Malprofitigantoj estas amikoj, ŝajne-afablaj, oportunismaj kaj flatemaj.”

1605

Konfuceo diris: “Profitiganto ĝuas tri ĝojojn, malprofitiganto ĝuas tri ĝojojn. La unua ĝuas ĝojon je decreguloj kaj muziko, ĝuas ĝojon je la vojo de homa bono, ĝuas ĝojon je saĝaj amikoj. Tio estas profito. La dua ĝuas ĝojon je aroganteco, ĝuas ĝojon je vanta ludo, ĝuas ĝojon je bankedo. Tio estas malprofito.”

1606

Konfuceo diris: “Estas tri misagoj en servado al estroj. Ekparoli antaŭ ol ankoraŭ ne temas pri tio – estas nomate ‘hastemulo’. Ne paroli ĝuste kiam temas pri tio – estas nomate ‘kaŝemulo’. Paroli sen vidi mienon de alparolanto – estas nomate ‘blindulo’.

1607

Konfuceo diris: “Estas tri avertoj por noblulo. En la juneco, kiam sango-energio ankoraŭ ne estas kontrolata, oni devas deteni sin de volupt-diboĉado. En la maturiĝo, kiam sango-energio estas firme kontrolata, oni devas deteni sin de batalado. En la maljuneco, kiam sango-energio malfortiĝas, oni devas deteni sin de avideco je akirado.”

1608

Konfuceo diris: “Nobluloj respekteme timas je tri – timas ordonon de la Ĉielo, timas grandulojn, timas vortojn de sanktuloj. Malgranduloj ne komprenas ordonon de la Ĉielo, ne timas ĝin, turnas sin tro familiare al granduloj, mokas vortojn de sanktuloj.”

1609

La Majstro diris: Tiu, kiu estas naskita kun scio, estas superulo¹. Kiu scias per lernado, estas la sekva. Kiu lernas en mizero, estas la tria. Kiu en mizero ne lernas, estas la popolo de malalta klaso.”

Rim. 1: Konfuceo mem konfesis pri si mem: “Mi ne estas tiu, naskita kun scio.”[0720]

1610

Konfuceo diris: “Noblulo havas naŭ pensmanierojn – Vidado pensigas pro plia klareco, aŭdado pensigas pri pli saĝa kompreno, mieno pensigas pri mildeco, konduto pensigas pri humileco, servado pensigas pri plia respektado, dubo pensigas pri demando, kolero pensigas pri malfacileco, vidado de akiritaĵo pensigas pri justeco.”

1611

Konfuceo diris: “Estas tiu, kiu, vidante bonon, serĉas ĝin plejeble, kvazaŭ neatingeblan. Kaj estas tiu, kiu, vidante malbonon, persekutas ĝin kvazaŭ per bolanta akvo. Mi vidis ilin kaj aŭdis iliajn vortojn. Estas tiu, kiu, ermitiĝinte, serĉas la strebon, kaj estas tiu, kiu, kondukante laŭ justo, deziras atingi la vojon. Mi aŭdas la vortojn pri ili, sed ankoraŭ ne vidas ilin.”

1612

La princo Jing de Qi-regno¹ posedis mil kvarĉevalajn kaleŝojn. Je la tago de lia morto, la popolo ne laŭdis lin pro lia manko de virto. Boyi kaj Shuqi mortis pro malsato sub la monto Shouyang, sed ankoraŭ ĝis nun la popolo laŭdas ilin. Tiuj ekzemploj bone diras pri voĉo de la popolo.”

Rim. 1: Mortis en 490 a. K.

1613

Chen Kang¹ demandis Bo Yu², dirante: “Ĉu vi aŭdis de via patro ion apartan, nekonatan de ni?”

Bo Yu respondis: “Ne. Iam li staris sola en ĝardeno kaj mi trakuris tien. Li diris al mi – ‘Ĉu vi lernas *Poezion*?’ – Mi respondis – ‘Ne’. Li diris – ‘Ne lernante *Poezion*, vi ne havigos al vi lingvon.’ Mi retiriĝis kaj eklernis *Poezion*. Iam en alia tago li denove staris en la ĝardeno sola. Mi trakuris tien. Li diris. – ‘Ĉu vi lernas decregulojn?’ Mi respondis – ‘Ankoraŭ ne.’ Li diris. – ‘Ne lernante decregulojn, oni ne povas stari inter homoj.’ Mi retiriĝis kaj eklernis decregulojn.”

Aŭdinte pri du epizodoj, Chen Kang retiriĝis kaj kun ĝojo diris: “Demandinte unu, mi ricevis tri. Aŭdis mi pri *Poezio*, aŭdis pri decreguloj, kaj aŭdis, kiel la noblulo traktis sian filon kun distanco.”

Rim. 1: 陳亢 Ziqin 子禽 estas lia adoltiĝa nomo.

Rim. 2: 伯魚, 孔鯉 Filo de Konfuceo.

1614

Edzino de landestro estas nomata de la landestro mem “Sinjorino (Furen)”¹. La sinjorino mem nomas sin “Knabineto”². Landanoj nomas ŝin “Sinjorino reĝino”³. Ili antaŭ alilandanoj nomas ŝin “Malgranda reĝineto”⁴. Alilandanoj nomas ŝin “Sinjorino reĝino”⁵.

Rim. 1: 夫人 2: 小童 3: 君夫人 4: 寡小君 5: 君夫人

17 YANG HUO

1701

Yang Huo¹ deziris intervidi Konfuceon. Sed Konfuceo ne venis vidi lin. Li sendis al Konfuceo porkidon². Konfuceo volus viziti lin, tamen nur dum ĉi tiu ne estu hejme. Sed hazarde survoje ili renkontiĝis. Yang Huo turnis sin al Konfuceo kaj diris: “Venu, mi kun vi interparolu kune!” – li diris. – “Ĉu eblas nomi bonvoleca tiun, kiu, havante trezoron, lasas sian landon konfuziĝi? Ne, ne eblas³. Ĉu eblas nomi intelektulo tiun, kiu, ŝatante fari aferon, perdas tempon? Ne, ne eblas³. Tagoj kaj monatoj pasas for, jaroj ne restas kun ni.”

Konfuceo diris: “Konsentas. Mi enoficiĝos.”

Rim. 1: Yang Huo, vasalo de Ji-familio. Sed li akiris potencon pli fortan ol Ji. Li okazigis ribelon kontraŭ la reĝo de Lu, kaj en 501 a. K. rabis lian trezoron: jadon kaj pafarkon. La interparolo okazis antaŭ la ribelo.

Rim. 2: Konsiderante, ke Konfuceo nepre devas viziti Yang Huo por dankesprimi.

Rim. 3: Iuj esploristoj konsideras, ke tiu estis dirita de Konfuceo.

1702

La Majstro diris: “Nia naturo estas proksima unu al la alia, tamen kutimo disigas nin malproksimen unu de la alia.”

1703

La Majstro diris: “Plej superaj intelektuloj kaj plej subaj malsaĝuloj ne ŝanĝiĝos.”¹

Rim. 1: Teksto kompletigas la antaŭan tekston, ke plej superaj 上知 kaj plej subaj 下愚 restas tiaj spite kutimon. Meng-zi negis la ideon, dirante, ke “Ĉiuj homoj povas fariĝi Yao kaj Shun.”

1704

La Majstro iris al la urbo Wucheng¹. Hazarde li aŭdis kanton kaj muzikon de kod-instrumentoj. La Majstro, bonhumore ridetante, diris: “Por kuiru kokon, kial oni uzas tranĉilon por bovo?”

Ziyou² respondis al li, dirante: “Antaŭe mi, Yan,³ aŭdis de vi jenon. – ‘Se noblulo lernas vojon – vi diris. – tiuokaze li amas homojn. Se malgranduloj lernas vojon, tiuokaze ilin facile iĝas utiligi.”

La Majstro diris: “Miaj lernantoj, eldiro de Yan pravas. Kio estas dirita nun de mi, estas serĉo.”

Rim. 1: 武城 Wucheng situis najbare de Bi 費, sudoriente de Qufu 曲阜 je 100 km. Ziyou, la disĉiplo de Konfuceo, fariĝis la urbestro de Wucheng. Loko de Wucheng devas esti proksima al Zaozhuang.

Rim. 2, 3: 子游 Ziyou, t. e. Yan Yan 言偃. Estas notinde, ke Mozi, kiu poste loĝis kaj agadis en proksima loko de la urbo, kontraŭis muzikon.

1705

Gongshan Furaio¹ ekribelis en Bi², kaj volis inviti al si Konfuceon. La Majstro volis iri al li. Zilu ne ĝojis je tio, dirante: “Se vi povus iri nenien, lasu tion. Kial do vi devas iri nepre al s-ro Gongshan?”

La Majstro diris: “Kiu invitas min, tiu verŝajne havas ian intencon. Se iu utiligos min, tiam mi volus provi la regadon de Zhou³ en oriento.”

Rim. 1: 公山弗擾、不狃 Vasalo al la ĉefo de Ji-familio. Li malkontetis al Ji-familio kaj ekribelis kune kun Yang Huo en 502 a. K., kiam Konfuceo estis 50-jara.

Rim. 2: 費 Feŭda urbo de la ĉefo de Ji-familio.

Rim. 3: Konfuceo idealigis la regadon de Zhou-dinastio kaj volus restarigi ĝin en oriento. En *Mozi* en la ĉap. “Kontraŭ konfuceanismo 非儒” estas skribite per la buŝo de Yan Ying 晏嬰, ke Konfuceo subtenadis ribelintojn.

1706

Zizhang demandis Konfuceon pri bonvoleco.

Konfuceo diris: “Bonvoleca estas tiu, kiu povas plenumi kvin principojn sub la ĉielo.”

Zizhang petis: “Permesu al mi demandi vin pri tio.”

La Majstro diris: “Humileco, toleremo, fideleco, rapida diligenteco, afableco. Se humila, oni ne malestimas aliajn; se tolerema, oni akiras subtenon de la amaso; se fidela, oni estas konfidata de aliaj; se diligente rapida, oni sufiĉe povas uzi homojn.”

1707

Bixi¹ volis inviti Konfuceon. La Majstro volus iri al li.

Zilu diris: “Antaŭe mi aŭdis de vi, ke noblulo ne devas eniri en la domon, kie estas farata la malbono. Bixi ekribelis en Zhongmu. Kial vi iras tien?”

La Majstro diris: “Jes, iam mi eldiris tiel. Sed ĉu mi ne diris, – ‘kio solida, tio frotate ne

defrotiĝas, kio blanka, tio ne nigriĝas eĉ en koto'. – Ĉu mi estas nur maldolĉa kukumo, kiu nur pendante restos nemanĝata?"

Rim. 1: 佛肸 Iuj opinias lin vasalo al Zhao Jianzi 趙簡子, aliaj – vasalo al Fan 范氏 aŭ Zhongxing 中行氏, kiuj estis grandaj oficistoj en Jin-regno. Bixi estis prefekto de Zhongmu 中牟. Kiam Konfuceo estis 62-jara, Bixi invitis lin. En Mozi estas skribite: "Disĉiploj ĉiuj sekvis Konfuceon. Zigong kaj Jilu helpis Kong Kui en Wei-regno, Yang Hu tumultis en Lu, Bixi ekribelis en Zhongmu." (非儒) Laŭ tiu skribmaniero en *Mozi*, Yang Hu kaj Bixi estis lernantoj de Konfuceo.

1708

La Majstro diris: "Vi, You-ĉjo, Ĉu vi aŭdis iam pro ses vortoj kun ses malutiloj?"¹

Li respondis: "Ankoraŭ ne."

La Majstro diris: "Sidiĝu, mi diros al vi. Ŝatante bonvolecon, ne ŝati lernadi. – Tiu damaĝo estas malsaĝo. Ŝatante scion, ne ŝati lernadi. – Tiu damaĝo estas diboĉo. Ŝatante fidelecon, ne ŝati lernadi. – Tiu damaĝo estas krimularo. Ŝatante sincerecon, ne ŝati lernadi. – Tiu damaĝo estas tordiĝo. Ŝatante kuraĝon, ne ŝati lernadi. – Tiu damaĝo estas tumulto. Ŝatante rigidecon, ne ŝati lernadi. – Tiu damaĝo estas freneziĝo."

Rim. 1: Ses vortoj estas 仁、知、信、直、勇、剛。 Estas interese, ke sen lernado eĉ plej bona strebado al virtoj ŝanĝiĝas en malution.

1709

La Majstro diris: "Junuloj, kial vi ne lernas *Poezion*? Per *Poezio* eblas eksciti imagon, per ĝi eblas observadi, per ĝi eblas akordiĝi kun aliaj, per ĝi eblas kompensi la suferitaĵon¹. Proksime, per ĝi eblas servadi al gepatroj. Malproksime, per ĝi eblas servadi al estroj. Aldone eblas scii nomojn de birdoj, bestoj, herboj kaj arboj."

Rim. 1: Iuj esploristoj komprenas ideogramon 怨 kiel "satiri" al politiko.

1710

La Majstro, kritikante Bo Yu, diris: "Ĉu vi legis *Zhounan* kaj *Shaonan*?¹ Se ne legas *Zhounan* kaj *Shaonan*, estas egale, ke vi staras kvazaŭ antaŭ muro."

Rim. 1: La titoloj de la unuaj du partoj de *Poezio*. Preskaŭ ĉiuj kantas pri amo inter geviroj. Bo Yu, filo de Konfuceo, tiam estis esziĝanta.

1711

La Majstro diris: Ho, decreguloj, decreguloj! Ĉu tio estas nur jado kaj silkaĵo? Ho, muziko, muziko! Ĉu tio estas nur sonoriloj kaj tamburoj?"¹

Rim. 1: Rilate al decreguloj kaj muziko morala esenco estas pli grava ol instrumentoj.

1712

La Majstro diris: "Kiu estas severa je mieno, sed malforta je karaktero, tiun eblas kompari kun malgrandulo, simila al rabisto, ŝteliranta tra muro¹."

Rim. 1: 穿窬之盜 Mieno 色 estas formo kaj karaktero estas enhavo 內. La formo kun la karaktero devas esti unuigita en tuto de persono.

1713

La Majstro diris: "Popolisto¹ estas virto-ŝtelisto²."

Rim. 1: 鄉原 Pseŭd-noblulo, kiu sin adaptas flateme al la popolo.

Rim. 2: 德之賊 Ŝtelisto de virto. Afektante virtulon, gajni popularecon inter la popolo.

1714

La Majstro diris: "Paroli nur papage, kion survoje aŭdis, estas forĵetado de virto."¹

Rim. 1: Ĉi tie estas esprimata la graveco de sendependa pensado. Sed en konfuceanismo estas tre fama la frazo: "Noblulo ne kreas."述而不作

1715

La Majstro diris: "Oni ne povas kune kun malnoblulo servi al landestro. Ne enoficigite, li zorgas pri enoficiĝo. Enoficigite, li timas perdon de ofico. Timante perdon, li aŭdacas fari ĉion ajn.¹"

Rim. 1: 無所不至 Duobla neado. Ne aŭdacas fari nenion ajn.

1716

La Majstro diris: "La antikva popolo havis tri malperfektojn, kiujn la nuna, eble, perdis. La antikvaj frenezuloj estis libervola, sed la nunaj estas voluptemaj. La antikvaj

memfieruloj estis honestaj, sed la nunaj estas koleremaj. La antikvaj stultuloj estis simplaj, sed la nunaj estas trompemaj.”

1717

La Majstro diris: “En lertaj vortoj kaj afablaspekto apenaŭ ekzistas bonvoleco.”

1718

La Majstro diris: “Mi malamas, ke purpuro uzurpas cinabro-ruĝon; mi malamas, ke kantoj de Zheng taŭzas klasikan muzikon; mi malamas, ke ruza buŝo renversas ŝtaton.”

Rim. 1: Antikve reĝoj vestiĝis en robo de ĉinabra ruĝo 朱, sed en la tempo de Konfuceo ili amis vesti sin en purpura koloro 紫.

1719

La Majstro diris: “Mi ne volas jam paroli.”

Zigong diris: “Se vi ne parolus, kion do al ni, lernantoj, lerni.”

La Majstro diris: “Kion la Ĉielo parolas? Iras kvar sezonoj, ĉu ne? Vivas cent bestoj, ĉu ne? Kion la Ĉielo parolas?”

1720

Ru Bei¹ volus intervidi Konfuceon. Konfuceo rifuzis sub preteksto de malsano. Tuj, kiam peranto eliris de la pordo, Konfuceo ekludis liron² kaj ekkantis, por ke ili aŭdu.

Rim. 1: 孺悲 Ru Bei estis sendita de la princo Ai al Konfuceo por lerni decregulojn de funebro.

Rim. 2: 瑟 Antikva 25-korda plukinstrumento, iom simila al citro.

1721

Zai Wo diris: “La trijara funebro estas tro longa. Eĉ la unujara estas tre longa. Se noblulo ne praktikas decregulojn dum tri jaroj, la decreguloj nepre detruigĝos. Se oni ne praktikas muzikon dum tri jaroj, la muziko nepre ruiniĝos. Se malnovaj grenoj elĉerpiĝas, novaj grenoj estas rikoltitaj. Dum unu jaro ankaŭ fajroj estas renovigitaj laŭ sezono. Do la unujara estas sufiĉa.”

La Majstro demandis: “Ĉu vi sentas vin trankvila je tio, ke vi manĝas rizon kaj vestiĝas en brokaĵo?”

Zai Wo respondis: “Trankvila.”

La Majstro diris: “Kion vi sentas trankviliga, tion vi faru.² Dum la funebro noblulo ne sentas dolĉaĵon dolĉa, ne aŭdas muzikon ĝojiga, ne sentas vivon trankvila. Tial do noblulo ne faras tion. Kion vi sentas trankviliga, tion vi faru.”

Zai Wo eliris.

La Majstro diris: “Al Yu mankas bonvoleco. Naskiĝinte, post tri jaroj la infano foriras de la sino de patrino. Trijara funebro estas la subĉiela komuna saĝo. Ĉu Yu ne ĝuis la amon de gepatroj dum la tri jaroj?”

Rim. 1: Zai Wo, t. e. Zai Yu. Disĉiplo de Konfuceo. Opinio de Zai Wo estas sama, kiel de Mozi. Tial do la teksto estas tre grava, kiel la aprobo de Konfuceo pri trijara funebro.

Rim. 2: 今女安、則為之 Unu el la plej gravaj reguloj por konduto ĉe Konfuceo.

1722

La Majstro diris: “Estas malfacile vivi, satmanĝante tutan tagon kaj zorgante pri nenio. Eĉ goistoj kaj vetludantoj estas pli saĝaj je tio, ke estas ion fari.”

1723

Zilu demandis: “Ĉu noblulo taksas kuraĝon alta?”

La Majstro diris: “Noblulo taksas juston plej alta. Noblulo sen justo, havante kuraĝon, ekribelos. Malgrandulo sen justo, havante kuraĝon, ekŝtelos.”

Rim. 1: Por Konfuceo justo kaj lernado ludas ŝlosilan rolon por gvidi la konduton al ĝusta vojo de virtoj.

1724

Zigong demandis: “Ĉu ankaŭ noblulo malamas iam?”

La Majstro diris: “Jes, li malamas iam. Li malamas tiun, kiu laŭdas malbonon de homoj. Li malamas tiun, kiu, estante malalta, kalumnias superulojn. Li malamas tiun, kiu, estante kuraĝa, ne havas decregulojn. Li malamas tiun, kiu, estante sentima, restas fermita en sia propra ŝelo. Ĉu ankaŭ vi, Ci-ĉjo², iam havas malamon?”

Zigong respondis: “Mi malamas tiun, kiu pretendas sciulon, ŝtelante alies opinion. Mi malamas tiun, kiu, estante ne humila, sentas arogantecon kuraĝa. Mi malamas tiun, kiu, malkaŝante sekreton, konsideras sian konduton honesta.”

Rim. 1: Estas interese kompari la tekston kun la famaj frazoj en la Nova Testamento: “Amu viajn malamikojn.”

Rim. 2: Zigong, t. e. Duanmu Ci.

1725

La Majstro diris: “Estas malfacile trakti malgrandulojn kaj virinojn. Se intime, ili iĝas ne modestaj. Se malintime, ili iĝas vengemaj.”

1726

La Majstro diris: “Kiu restas malŝatata en sia 40-jara, al tiu nur finite.”

18 WEI ZI

1801

Wei-zi¹ forlasis lin², Ji-zi³ fariĝis lia sklavo, Bi Gan⁴ faris permortan admonon kaj estis mortigita. Konfuceo diris: “En Yin-dinastio estis tri homoj de bonvoleco.”

Rim. 1: 微子 La vicgrafo Wei, pliĝa frato de la reĝo-tirano Zhou. Pro la tiraneco de Zhou li forlasis lin. Post kiam Yin-dinastio falis, Wei estis feŭdita de Zhou-dinastio en Song-lando.

Rim. 2: 糾 La lasta reĝo de Yin-dinastio. Li estis fama je tiraneco.

Rim. 3: 箕子 Onklo de la reĝo Zhou. Pro tio, ke li faris admonon al Zhou, la lasta faris lin sklavo. Ji-zi estis feŭdita de la reĝo Wu de Zhou-dinastio al Koreio.

Rim. 4: Onklo de la reĝo Zhou. Kiam li faris admonon al Zhou, li estis mortigita.

1802

Liuxia Hui¹ fariĝis juĝisto, kaj trifoje li estadis eksigita. Oni diris: “Ĉu vi ankoraŭ ne povas forlasi la landon?”

Li respondis: “Kiu servas al homoj per sincera vojo, tiu ĉie ajn ne devas ne esti elpelata trifoje. Povas resti nur tiu, kiu servas al homoj laŭ malrekta vojo. Sed se tiel, kial do necesas nepre forlasi la landon de gepatroj?”

Rim. 1: Zhang Huo, saĝulo de Lu-regno, vivis antaŭ 100 jaroj ol Konfuceo. Hui estis lia postmorta nomo. Liuxia estis lokonomo.

1803

La princo Jing de Qi-regno, akceptante Konfuceon, diris: “Mi ne povas trakti tiel, kiel s-ron Ji¹ en Lu-regno. Do mi traktos vin meze de Ji kaj Meng².” Poste la princo diris: “Mi fariĝis jam tro maljuna, ke mi ne povas dungi vin³.”

Konfuceo forlasis Qi-regnon.

Rim. 1: Ji Ping, granda oficisto en Lu-regno, unu el efektivaj regantoj de tiu regno.

Rim. 2: Mengsun, granda oficisto en Lu-regno.

Rim. 3: La princo Jing tiam havis ĉ. 60 jarojn, Konfuceo estis en la fino de tridekaj jaroj. Laŭ *Mozi*, en ĉap. “Kontraŭ konfuceanoj” estas skribite pri tiama traktado de Konfuceo en Qi-regno, ke kontraŭ lia dungo staris la fama ĉefministro Yan Ying.

1804

Qi-regnantoj sendis trupon de muzikistinoj al Lu-regno. Ji Huan-zi¹ akceptis ĝin kaj, droninte en ĝi, ne ĉeestis kortegan matenan kunvenon dum tri tagoj. Konfuceo forlasis Lu-regnon.

Rim. 1: 季桓子 Ji Huan, ĉefministro de Lu-regno. Konfuceo estis 56-jara, kaj postenigita kiel ministro de justico 大司寇.

1805

Iu frenezulo el Chu-regno, nomata Jieyu¹, preterpasis antaŭ Konfuceo, kantante: “Ho, fenikso, fenikso! Kiel degeneris la virto! Ne eblas riproĉi foririntojn, nur eblas ankoraŭ atendi venontojn. Ho ve, ho ve! Estas danĝere sekvi la nunan regadon!”

Konfuceo elvagoniĝis kaj volus interparoli kun li. Ĉi tiu forkuris, evitante, tiel do Konfuceo ne povis paroli kun li.”

Rim. 1: 狂接輿 Ermito, simila al rusa “*jurodivij* юридивый”. Konfuceo tiam havis 63 jarojn, ne povis enoficiĝi en Chu-regno pro interveno de Zi Xi. La sama teksto troviĝas en *Zhuang-zi*. 莊子人間世篇

1806

Changju kaj Jieni¹ kune terkulturis. Tie Konfuceo kun disĉiploj preterpasis. Konfuceo sendis Zilu demandi, kie estas pramejo.

Changju demanis: “Kiu do estas tiu, stiranta kaleŝon?”

Zilu respondis: “Li estas Kong Qiu.”

Changju demandis: “Ĉu tiu estas Kong Qiu el Lu-regno?”

Zilu diris: “Jes.”

Changju diris: “Li scias, kie estas pramejo.”

Zilu demandis Jieni. Ĉi tiu diris: “Kiu vi estas?”

Zilu respondis: “Mi estas Zhong Yu.”

Jieni demandis: “Vi estas lernanto de Konfuceo, ĉu ne?”

Zilu respondis. “Jes.”

Jieni diris: “Ĉio sub la Ĉielo estas en malordo, kvazaŭ en inundo. Kiu do povas ŝanĝi tion? Al vi estas preferinde sekvi ermiton por eviti mondon, ol sekvi evitinton de homoj.”

Jieni kaj Changju, ne ĉesante, daŭrigis terkulturi, kovrante semojn per tero.

Zilu iris reen raporti al Konfuceo pri tio. Konfuceo diris malgaje: “Al ni ne eblas ariĝi kun birdoj kaj bestoj. Se ne kun homoj, kun kiu ni povus kune vivi? Se sub la Ĉielo

regus la ĝusta vojo, mi ne intencus ŝanĝi la mondon.”

Rim. 1: 長沮, 桀溺 du ermitoj. La epizodo rilatas al la tempo, kiam Konfuceo estis 61-jara survoje de Ŝe-lando al Cai-lando.

1807

Kiam Zilu, sekvante Majstron, malfruis, li renkontis iun maljunulon kun bastono kaj korbo. Zilu demandis lin: “Ĉu vi vidis mian Majstron?”

La maljunulo respondis: Ĉu, vere? Kiu ne diligentas labori kun korpomembroj, nek distingas kvinceralojn, tiu povas esti nomata Majstro?”

Li, metinte bastonon, eksarkis herbojn. Zilu staris apude kun manoj kunligitaj, nenion farante. Li gastigis Zilu ĉe si, donis al li manĝi, kuirinte kokon kaj milion. Zilu konatiĝis kun liaj du filoj. En la sekva tago Zilu kuratingis Majstron kaj raportis tion.

La Majstro diris: “Tiu estas ermito.” Konfuceo sendis Zilu returne revidi lin. Sed li jam foriris, kiam Zilu atingis la antaŭan lokon.

Zilu diris: “Neservado ne havas justecon. Oni ne devas forigi la ordon inter la pliaĝa kaj la malpliaĝa. Kiel oni povus forigi ĝustan rilaton inter estroj kaj subuloj. Ermito, dezirante sinpurigon, malordigas la grandan etikon. Nobluloj servas por plenumi la taskon de justo. Estas jam bone sciite, ke nun ne regas la ĝusta vojo.”

1808

Detranĉitoj el popola mondo estis Boyi, Shuqi, Yuzhong, Yiyi, Zhuzhang, Liuxia Hui, Shaolian¹. La Majstro diris: “Tiu, kiuj ne malaltigis sian strebon, nek hontigis sin mem, estis ja Boyi kaj Shuqi. Koncernante Liuxia Hui kaj Shaolian, ili malaltigis sian strebon kaj hontigis sin. Sed ilia parolado estis konforma al moraleco, kaj ilia konduto devenis de profunda konsidero. Nun en tio estas ĉio laŭdinda. Koncerne de Yuzhong kaj Yiyi, ili, detranĉite el mondo kaj ermitiĝinte, libere ekparolis². Ili tenis sin puraj, kaj ilia forlaso konformas al bona dispono. Se temas pri mi, mia vivo estas diferenca de ĉiuj supre menciitaj, nek bona, nek malbona.”

Rim 1: Pri Yuzhong, Yiyi, Zhuzhang kaj Shaolian oni scias nenion. Iuj dubas, ke kelkaj el tiuj vortoj estus ne nomoj, sed adjektivo.

Rim. 2: 放言 du diversaj komprenoj pri tio: 1) ĉesi paroli, 2) libere paroli.

1809

La plej granda muzikisto, la Majstro Zhi, foriris al Qi-regno¹. La dua² Gan foriris al

Chu-regno. Liao, la tria, iris al Cai-regno. Que, la kvara, foriris al Qin-regno. Fang Shu, tamburisto, foriris al regiono laŭ la Flava Rivero. Wu, perkutludisto, foriris al regiono laŭ Han Rivero. Yang, vic-orkestrmajstro, kaj Xiang, ŝtonperkuta ludisto, foriris al ĉemara regino.”

Rim. 1: Iuj konsideris ke en la tempo de la princo Ai de Lu-regno, malordiĝis decreguloj kaj detruigis muziko, kaj muzikistoj ĉiuj foriris. Aliaj opiniis, ke tio okazis en la fino de Yin-dinastio. Talentaj muzikistoj povas forlasi la danĝeran landon, ĉar ilia talento uzeblas ĉie ajn, kiel oni vidis multe da muzikistoj forlasintaj la landon en la epoko de disfalo de Sovetio.

Rim. 2: 亞飯 Originala signifo estas “la majstro de la muziko ludata ĉe la dua manĝo”.

1810

La duko de Zhou¹ admonis al la princo Boqin² de Lu-regno, dirante: “Princo ne devas forlasi siajn gepatrojn kaj parencojn, nek devas igi ministrojn plendi je la traktado, nek devas forĵeti malnovajn sekvantojn sen granda kialo. Oni ne devas postuli de unu persono perfektecon aŭ pretecon je ĉio.”

Rim. 1: 周公旦 Filo de Wen, juna frato de la reĝo Wu en Zhou-dinastio. La praulo de la princo de Lu-regno.

Rim. 2: 伯禽 Boqin, filo de Zhougong Dan.

1811

En Zhou-dinastio estis ok elstaraj personoj. – Boda, Bokuo, Zhongtu, Zhonghu, Shuye, Shuxia, Jisui kaj Jigua.¹

Rim. 1: 伯達、伯适、仲突、仲忽、叔夜、叔夏、季隨、季騶 Pri ĉiuj ok personoj nun oni scias nenion.

19 ZI ZHANG

1901

Zizhang diris: “Nobla persono¹, vidante danĝeron, estas preta oferi sian vivon. Vidante akiritaĵon², li pensas pri ĝia justeco. Ĉe oferfesto li pensas pri ĝia respekto. Ĉe funebro li pensas pri kondolenco. Jen tia li devas esti.”

Rim. 1: Shi 士 Kiel rango, Shi signifas oficiston kaj soldaton. Sed krom rango ĝi esprimas alt-kvalitan klerulon kun alta strebo.

Rim. 2: Pensi, ĉu per justa vojo estas akirita la profito aŭ gajno.

1902

Zizhang diris: “Se iu tenas al si virton ne vasta, kaj kredas je la vojo ne profunda, kia signifo povas esti en lia ekzisto aŭ ne ekzisto?”

1903

Lernantoj de Zixia demandis Zizhang pri homa interrilato.

Zizhang demandis: “Kion diris Zixia?”

Ili respondis: “Nia Majstro diris, ke rilatu kun bonulo kaj rifuzu malbonulon.”

Zizhang diris: “Tia opinio diferencas de tio, kion mi aŭdis¹. Noblulo respektas saĝulojn, kaj ampleksas popolamason, ĝojas je bono kaj kompatas senkapablulojn. Se mi estus granda saĝulo, oni neniel ne akceptus min. Se mi ne estus saĝulo, oni mem rifuzus min. Kiel do mi el mia flanko devus rifuzi aliajn?”

Rim. 1: Inter disĉiploj jam naskiĝis diferencoj je kompreno de konfuceanismo.

1904

Zixia diris: “Malgraŭ malgranda vojo¹, ankaŭ tie nepre troviĝas io vidinda. Sed por atingi malproksimen la malgranda vojo povas esti plena de kotoj. Tiel do noblulo ne prenas ĝin.”

Rim. 1: 小道 malgranda temo de studo. Komparu kun la vojo 朝聞道,夕死可矣.[1408]

1905

Zixia diris: “Ĉiutage scii tion, kio mankas al vi. Ĉiumonate ne forgesu tion, kion vi ellernis. Tio signifas, ke vi ŝatas lernadi.”

1906

Zixia diris: “Vaste lerni kaj fervore strebi, serioze demandi kaj proksime pripensi, – jen en tio kuŝas bonvoleco.”

1907

Zixia diris: “Cent metiistoj faras sian aferon en siaj metiejoj. Nobluloj lernadas, jen per tio atingas la vojon.”

1908

Zixia diris: “Kiam eraras malgrandulo, ĉiam li beligas ĝin per vortoj.”

1909

Zixia diris: “Ŝajnas, ke noblulo trifoje ŝanĝiĝas. De malproksime li ŝajnas majesta. Apude li aperas milda. Oni aŭdas lian paroladon inspira.”

1910

Zixia diris: “Noblulo, nur havigante al si konvinkon, povas altrudi al la popolo laboron. Dum li ne havas konvinkon, li devas severe ekzercadi sin mem. Nur akirinte konvinkon, li povas admoni aliajn. Dum li ne havas konvinkon, li devas severe kritiki sin mem.¹”

Rim. 1: Mi prenas la ideogramon 信 kiel “konvinkon”, ne “fidon”. La lasta frazo estas tradukita de aliaj esploristoj: “Ili ne admonas sian princon, ĝis ili akiras ties fidon, alie tiu pensus, ke ili kalumnias. [WCf93]

1911

Zixia diris: “Granda virto ne trapasus limon, tamen malgranda virto povas transpasadi ĝin.¹”

Rum. 1: Multsignife interpreteblas la teksto. 1) Kion ajn faras virtulo, li ne kulpas; 2) Kion ajn faras virtulo, ĉio konformas al ekzistanta leĝo. Signifo de 1 memorigas nin la eldiron pri “neordinara persono” en “Krimo kaj Punado” de F. M. Dostoevskij.

1912

Ziyou diris: “Lernantoj de Zixia povas fari balaadon, akceptadon de gastoj, etiketon de el- kaj en- irado. Sed tio estas bagatelaĵo. Por kio do tio estas?”

Zixia, aŭdante tion, diris: “Ho ve! Yan You ne pravas. Je la vojo de noblulo, en kion unue inici lernanton? kaj kion poste instrui? Se diri tion, kompare kun herboj kaj arboj, oni devas distingi kaj klasifiki. En la vojo de nobluloj, ĉu proceson oni povus malestimi? Kiu estas perfekta de la komenco ĝis la fino, tiu estas ja nur sanktulo.”¹

Rim. 1: Komenciĝas skismo inter konfuceanoj ĉirkaŭ la ĝusta vojo. Zixia konsideras ĉiutagan kutimon grava por atingi la ĝustan vojon.

1913

Zixia diris: “Por pli bone labori en ŝtato – lernu, por pli bone lerni – laboru¹.”

Rim. 1: 仕 signifas servadon en ŝtatoficejo, sed mi uzas por pli vasta signifo vorton “labori”.

1914

Ziyou diris: “Finiĝas funebro per esprimo de pleja kondolenco.”

1915

Ziyou diris: “Mia amiko Zhang¹ kapablas fari nefareblan. Sed li ankoraŭ ne atingis bonvolecon.”

Rim. 1: Zizhang.

1916

Zeng-zi diris: “Kiel impona estas Zhang! Sed estas malfacile praktiki bonvolecon kune kun li.”

1917

Zeng-zi diris: “Mi iam aŭdis de la Majstro, ke, kvankam oni ne povas per si mem atingi ion, tamen, se povas, tio nepre estas farebla je la funebrado¹ de gepatroj.”

Rim. 1: Jen en tio kuŝas kaŭzo, kial Konfuceo rigardis la funebradon grava. Funebro estas unua praktiko de dereguloj kaj fila pietato.

1918

Zeng-zi diris: “Mi aŭdis de la Majstro jenon. – ‘Fila devo, kiun Meng Zhuan-zi¹

plenumis, estas farebla al aliaj homoj. Sed ke li ne ŝanĝis la subulojn kaj administradon de sia patro, tion estas malfacile fari.’ –”

Rim. 1: 孟莊子、仲孫速 Zhong Sunsu, Filo de Meng Xian 孟獻, grando oficisto de Lu-regno.

1919

S-ro Meng nomumis Yang Fu¹ ĉef-juĝisto de justico kaj la lasta konsultis Zeng-zi.

Zeng-zi diris: “La supro perdis la vojon, kaj la popolo de longe disiĝis inter si. Eĉ se vi sukcese esploras pri situacio, kompatu juĝaton kaj ne ĝoju.”²”

Rim. 1: 陽膚 Yang Fu estis disĉiplo de Zeng-zi.

Rim. 2: 哀矜 Laŭ Lüxing 呂刑 estas skribite: “Kompatu al malfeliĉo de juĝatoj”

1920

Zigong diris: “Malbono de la tirano Zhou povus esti ne tiel ekstrema, kiel estas dirite. Nobluloj nur ne ŝatas meti sin en la malsupra fluo, kien alfluas la tuta malbono de la mondo.”¹

Rim. 1: En historio oni inklina atribui tutan malbonon al tirano. Zigong avertas tian tendencon de homoj.

1921

Zigong diris: “Eraro far de noblulo similas al eklipso de suno kaj luno. Se li eraris, ĉiuj homoj rigardas ĝin. Se li korektis, ĉiuj homoj respektive suprenrigardas ĝin.”

1922

Gongsun Chao¹ de Wei-regno demandis Zigong, dirante: “Kie lernis Zhongni²?”

Zigong respondis: “La vojo de reĝoj Wen kaj Wu ankoraŭ ne falis teren, sed ekzistas en koro de homoj. Saĝuloj scias ilian grandecon, malsaĝuloj scias la parteton malgrandan. Do la vojo de Wen kaj Wu ĉie kaj ĉiam troviĝas. Ĉe la Majstro estis neniu regula instruisto, sed ĉiam estis sekvindaj modeloj.”

Rim. 1: Granda oficisto de Wei-regno. Pri li estis ne sciate.

Rim. 2: Adoltiĝa nomo de Konfuceo.

1923

Iam en ofica kunveno Shusun Wushu¹ parolis pri Konfuceo, dirante: “Zigong estas pli saĝa ol Zhongni.”

Zifu Jingbo² diris pri tio al Zigong. La lasta diris: “Se diri alegorie, komparante kun muro, la muro de Ci³ estas alta je mia ŝultro, do bone travideblas la ĉambro kaj domo. La muro de Konfuceo alta je kelkaj *ren*⁴, do beleco de la maŭzoleo kaj riĉeco de interna ornamaĵo ne videblas, krom se oni ne enirus tra la pordo. Nur malmulte da homoj povas eniri la pordon. Tial do la eldiro de s-ro Shusun ne estas riproĉenda.”

Rim. 1: Granda oficisto de Lu-regno. Pli juna ol Konfuceo.

Rim. 2: Granda oficisto de Lu-regno. Li subtenis Zilu.[vid.1437]

Rim. 3: Zigong

Rim. 4: *Ren*: 1 ren = 7 aŭ 8 chi.

1924

Shusun Wushu insultis Zhongni. Zigong diris: “Nenio farebla! Zhongni estas neriproĉebla. Aliaj saĝuloj estas montetoj, kiuj estas trapaseblaj. Zhongni estas suno aŭ luno, neniel transpasebla. Eĉ se iu mem volus ataki lin, tiu povus neniel vundi la sunon aŭ la lunon. Mi vidas la insulton senscie temerara.”

1925

Chen Ziqin¹ diris al Zigong: “Vi tenas vin humila. Ĉu Zhongni estas pli saĝa ol vi?”

Zigong diris: “Pro unu vorto noblulo estas kalkulita kiel intelekto, pro unu vorto – kiel malintelekto. Je sia eldiro oni ne povas ne teni sin prudenta. La Majstro estas tiom neatingebla, kvazaŭ ne eblas supreniri laŭ ŝtuparo al la Ĉielo. Se la Majstro posedus ŝtaton, estus starigita ĉio starigenda, estus farita ĉio farenda laŭ la vojo. La popolo iĝus feliĉa kaj alvenus de malproksime. La popolo laborus kaj akordiĝus en harmonio. Lia vivo igus la popolon prosperi kaj lia morto – malĝoji. Kiel do mi povus atingi lian nivelon?”

Rim. 1: 陳子禽 Estas diversaj opinioj pri tiu persono: unu konsideras lin Chen Kang, Ziqin [vd. 0010,1613]. la alia –[ambaŭ la sama persono kaj la tria – tute alia persono.

20 YAO YUE

2001

Yao diris: “Ho, vi Shun, laŭ la ordo de la Ĉiela kalendaro sur vi estas donita la destino. Vi prenu sincere la rolon. Se ne tiel, suferplena estos la mondo kun kvar maroj kaj la donaco de la Ĉielo finiĝos por eterne¹.”

Ankaŭ Shun ordonis al Yu per samaj vortoj.

Tang² diris: “Mi, malgranda knabo Lü, aŭdacas oferi nigran virbovon kaj anonci al brilaj sanktaj reĝoj en la Ĉielo. Mi ne pardonas pekulojn kaj krimulojn. Antaŭ Dio ne eblas kaŝiĝi al ministroj-vasaloj. Elekto dependas de la koro de Dio. Se mi estas kulpa, ne punu multajn aliajn. Se multaj aliaj pekas, punu min solan, kiu kulpas je tio. Zhou-dinastio estas dotita per granda donaco, t. e. riĉa je bonuloj, riĉa je parencoj de Zhou, tamen des pli riĉa je homoj de bonvoleco. Se eraras popolanoj, punu min solan, kiu en tio kulpas.”

Se unuigi pesilojn kaj mezurilojn, se klarigi leĝojn kaj regulojn, se ordigi oficojn arkaikajn, estus bone regate ĉie en la ŝtato. Se restarigi pereintajn landojn, se daŭrigi heredon de malaperintaj familioj, se promocii forlasitajn popolanojn, koro de la popolo en la mondo altiriĝos al la regno. Gravas al la popolo – manĝaĵo, funebrado kaj festo. Se tolerema, la reganto akiros popolamson. Kiu estas fidinda, al tiu estos komisiita de la popolo. Kiu estas rapidaga je traktado de aferoj, tiu sukcesos. Kiu estas senpartia, tiu estos akceptata kun ĝojo.

Rim. 1: La alia kompreno estas jena: “Se tiel, disvastiĝas la donaco de la Ĉielo ĝis la fino de Kvar maroj kaj daŭros por eterne.”

Rim. 2: Mankas nomo de Tang, sed citaĵo estas de “Tang Shi 湯誓”. Simila citaĵo estas videbla ankaŭ en *Mozi*.

2002

Zizhang demandis Konfuceon, dirante: “Kiel okupiĝi pri la regado?”

La Majstro diris: “Respektu 5 belecojn kaj evitu 4 malbonojn. Per tio eblas okupiĝi pri la regado.”

Zizhang diris: “Kio estas 5 belecoj?”

La Majstro diris: “Noblulo estas donacema kaj ŝparema, preta rekompencadi kaj ne inciti venĝemon, dezirplena je bonvoleco kaj senavara, trankvila kaj ne aroganta, majesta kaj ne kruela.”

Zizhang diris: “Kion vi signifas per donacemo kaj ŝparemo?”

La Majstro diris: “Oni profitigas sin konforme al tio, ke popolo profitas. Tiu estas ja donema kaj ŝparema, ĉu ne? Elekti tiun, kiun indas rekompenci kaj per tio inciti plendon ĉe neniun. Dezirante bonvolecon kaj ricevas bonvolecon. Kial do necesas avari? Noblulo malestimas neniun, ĉu popolamason, ĉu grandulon, ĉu malgrandulon. Tiu estas trankvila kaj ne aroganta, ĉu ne? Noblulo vestas sin ĝuste en vestaĵo kaj ĉapo, kaj havas dignan okulesprimon, altirantan respekton. Oni, vidante lin rigora, respektplene timas. Tiu estas ja majesta kaj ne kruela, ĉu ne?”

Zizhang demandis: “Kio estas kvar malbonoj?”

La Majstro diris: “Ne instruante, mortigas. – tio estas nomata ‘feroco’. Ne disciplinante, lasas kreski. – tio estas nomata ‘krudaĵo’. Lasi maldiligenti kaj hastigi plenumon. – tio estas nomata ‘leĝrompo’. Kvankam finfine tutegale donos, tamen domaĝas tuj subite doni. – tio estas nomata ‘pedela karaktero’.”

2003

La Majstro diris: “Kiu ne scias la ordonon de la Ĉielo¹, tiu ne povas esti noblulo. Kiu ne scias decregulojn, tiu ne povas stari. Kiu ne scias vortojn, tiu ne povas scii homojn.”

Rim. 1: 命 Ĝenerale oni komprenas tiun vorton kiel “ordonon de la Ĉielo”.

POSTPAROLO

En mia infaneco mi kreskis, ĉirkaŭate de Analektoj kaj sutroj de budhismo. Ili estas skribitaj nur per ĉinaj ideogramoj. Ĉiumatene kaj ĉiuvespere mi recitadis sutrojn per japanlingva prononco kune kun geavoj kaj gepatroj, sidante antaŭ la altaro. En lernejoj ni lernadis kaj recitadis parkere gravajn tekstojn el Analektoj en la leciono de antikva ĉina lingvo.

Mi ekvolis esperantigi la Analektojn, ĉar mi loĝas en Zaozhuang, proksime al Konfucea hejmo. Inspirite de vetro kaj akvo en Lu-regno, mi daŭrigis traduki ĉiunokte. Dank' al antaŭirinto, s-ro Wang Chongfang, mi povis konsulti la fajnan Esperantan tradukon (1). Tio ege helpis al mi pli profundan komprenon de la tekstoj. Ĉefe mi apogis min sur la verko de la japana esploristo pri Analektoj (2) kaj sur la vortaro de Shirakawa(4). Ĉar en tio estas amasigita la rezervo de la riĉaj esploroj en Ĉinio kaj Japanio.

Ankoraŭ ne sufiĉas la rimarkigo, sed tiu laboro daŭros senlime. Historio de rimarkoj al Analektoj estas ja la pens-historio en Ĉinio kaj en Japanio. En la proceso de la traduko mi legis tradukojn per diversaj lingvoj: la angla, la germana, la franca, la hispana, la rusa k. a.(5)

Mi trovas, ke la legado de Analektoj donas al legantoj okazon ellerni diversajn lingvojn. Per la fervora klopodo de s-ro Semio, en Zaozhuang Universitato estas fondita la Espernato-Muzeo kaj en estonteco estos starigita la Esperanta fako. Mia traduko estas la donaco al lernantoj de Esperanto en Zaozhuang Universitato. Mi esperas, ke ili legu Analektojn Esperante, komparante kun la verko de s-ro Wang Chongfang.

SASAKI Teruhiro, d-ro de sociologio

Instruisto en Zaozhuang Universitato

2017-07-02 en Zaozhuang

BIBLIOGRAFIO

- 1) Wang Chongfang, Analektoj de Konfuceo. Tradukita de Wang Chongfang. Ĉina Esperanto-Eldonejo, Beijing, 1996.
- 2) 吉川幸次郎 『論語』上下。中国古典選、朝日選書 1001、2007 年
- 3) 文若愚 编著 『论语』全解 中国华侨出版社, 2013
- 4) 白川静 『字統』 平凡社、東京、2010
- 5) CONFUCIUS Main Menu. www.confucius.org/main